


**VALO**  
**MIGRANTE**  
**TRA METIOJ**



SAT-BROĜURSERVO  
1990 \* 25 FF

**VALO**

**MIGRANTE  
TRA METIOJ**

Al miaj laborkompanoj.

SAT-Broŝurservo  
Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47470 Beauville  
1990 \* 25 FF

La unua eldono de tiu ĉi broŝuro aperis en 1982,  
ĉe SAT-Broŝurservo.

Ĉe la sama eldonanto, de la sama aŭtoro :

...el la kara infaneco (aŭtobiografio, unua volumo)

Kontraŭflue (aŭtobiografio, dua volumo)

Sepdek jaroj sub la verda stelo (aŭtobiografio, 4-a volumo)

Les seize règles de l'espéranto commentées par un espé-  
rantiste français à l'intention des élèves francophones

Falsaj amikoj, falsaj parencoj, fremduloj (aperos en 1990)

Tradukoj de VALO :

Frederi MISTRAL. La Poemo de Rodano

Viktoro HUGO. Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela  
Boldura

LAMARKO. Filozofio zoologia

Maurice TOUCHAIS. Kancero kaj ekologio.

André LORULOT. Kial mi estas ateisto

Han RINER. La Aperoĵoj de Ahasvero. Individuismo en

Antikveco. Individuista Manlibreto. La Kvina Evangelio.

La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes. La Turo de l'Popoloj.

Jean LASSERRE. Ĉu militista nacidefendo estas kredebla?

P. de CAZENOVE. La Migrantoj en Francio nuntempe

Eseo de VALO :

Esperanto kaj literaturo

Artikoloj en la rubriko "Vortoj de Maljunulo" aperas en  
la gazeto "Laŭte!"



Iuj homoj pasigas sian tutan aktivan ekzistadon sekvante rektan kaj glatan karieron ; aŭ en unu loko kaj en unu entrepreno, en kiu ili profundigas sian sperton ; aŭ migrante de loko al loko, sed ĉiam en ununura profesio : tiel ili rikoltas sciojn de diverslandaj samprofesiuloj, kiel la migrantaj meti-"kompanoj", kaj daŭre pliriĉigas sian propran fakulan pakajon.

Mia profesia vivo konsistis el kvazaŭa migrado inter diversaj metioj kaj diversaj regionoj. Ĝi balanciĝadis kiel ŝipo sur maro skuata de hazardaj ventoj. Sed la hazardon, konfesinde, helpis mia propra fantaziemo.

Tia vivo regata de hazardo kaj fantazio eble ne faris el mi grandan spertulon en iu ajn fako. En ĉiu mi restis ia amatoro, se ne diri diletanto. Ĉiu prezentis interesajn flankojn kaj havigis okazojn por renkonti originalajn personojn.

Franca proverbo diras : Ruliĝanta ŝtono ne amasigas muskon\*. Mi almenaŭ kolektis fasketon da rememoroj, pri kiuj mi nun raportos.

Laŭ franclingva kutimo, mi ofte uzis la vorton "maŝino" anstataŭ "lokomotivo", kaj derivaĵojn (maŝinisto, ĉefmaŝinisto). Mi nomas maŝinejo (lokomotivejo) la tuton de lokomotiva garaĝo aŭ - remizo kun riparejo, stokejo, deĵorplana oficejo, ktp.

Mi dankas pri konsiloj de S-ro André Blondeaux, kies Fervoja Leksikono cetere helpis min por solvi plurajn dubajn demandojn.

---

\* Kp : Eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas.  
(Zamenhof - Proverbaro)

## Prologo.

En mia libreto "...el la kara infaneco", mi diris, kiel lokomotivoj flirtadis en miaj revoj de knabeto, nepo kaj pranepo de fervojistoj.

En 1920, mi estis en Aikso-la-Provenca, en la inĝeniera lernejo "pri Artoj kaj Metioj". Granda revoluciema striko preskaŭ paralizis la fervojan trafikon en tuta Francio. En akordo kun la reakcia registaro, iu "Civitana Unio" vokis la teknikajn studentojn al volontuliĝo por anstataŭi la kondukistojn de lokomotivoj. (Nun, kiam mi bone konas tiun metion, mi dubas, ĉu tiuj improvizitaj anstataŭantoj povis efike utili).

La afero estis tenta ; sed ĉu mi povis fariĝi strikrompanto ? Spite fortan moralan premon de la lerneja direkcio, mi kun kvar el miaj kunlernantoj rifuzis volontuliĝi. Pro tiu sinteno mi ricevis ateston de la Aiksa strikkomitato. Tio estis mia unua rilato kun aktivaj fervojistoj.

## I. Miaj lokomotivoj.

1. En la maŝinejo.  
 La "folio". S-ro David.  
 S-ro Lhuillier. Leona.  
 La viktimo de la tiraljoroj.  
 La leŭtenanto de vojpgardanta trupo.  
 La rusa admiralo.  
 Kelvizito en Rüdeshheim.  
 Esplorado de karbostokoj. "Kiu estas lia metio?"  
 "Starken"hotelo. La kantino. Radio.  
 La apartamento de la staciestro. Servistinetoj.  
 Romantikaj promenadoj.

En "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" mi rakontis, kial kaj kiel, en 1923, liberigite el la militservo kaj ne trovinte profesian okupon, mi dungigis en la franca-belga Regio de la fervojoj en la okupataj teritorioj.

Ties ĝenerala direkcio okupis grandan domegon sur la Kaiserstrasse en Majenco. Tie, kondukite en la vastan kabineton de S-ro Henry, ĉefinĝeniero pri trakveturilaro\* kaj trakcio, mi tuj havis specimenon de lia oratora talento : li estis, per telefono, laŭtege riproĉ-admonanta sinsekve du el siaj subuloj, la trakciajn sekciestrojn de Essen kaj Düsseldorf.

Poste, kvietiginte, li afable min akceptis, kaj dungis min kiel trakcian staĝanton kun monatsalajro de 1050 frankoj. Tio estis pli ol mi povis esperi kiel debutanta inĝeniero en franca industrio. Kaj li destinis min al la grava lokomotivejo en Bingerbrück. Neniu restadejo povis pli plaĉi al mi.

---

\* ruliĝanta materialo (PIV)

Mi debutis en majo, funkciante kiel vicĉefo komisiita pri "la folio" (deĵorplano). Tio estis la taga programo reprezentata per granda tabelo kun grafikaĵoj, itineroj kaj horoj de la planitaj trajnoj. Fronte al ĉiu oni skribis la numeron de lokomotivo kaj la nomojn de la maŝinistoj.

En unu el la unuaj vesperoj, mi ĵus pretigis la folion por la morgaŭo. En la oficejon envenas la ĉefmaŝinejestro, S-ro David. Simpla ekrigardo : - Sed ne! Ne tiel! Neniun skip-alternadon\* ! Al ĉiu maŝino ĝian difinitan skipon! Jen, vi tuj vidos!

Ekkaptinte virgan folion, li en kelkaj sekundoj starigas mirinde koheran tabelon, sen kromatribuoj, sen ia misaĵo. Mi sidis en admiro antaŭ tia virtuozece.

Sed poste, reprenante punkton post punkto, mi konstatis : ke iu lokomotivo ĵus revenis difektita sekve de bomb-atenco sur la vojo ; nur kelkaj horoj da riparado efektivigota en la loka laborejo, sed la du maŝinistoj, negrave vunditaj, tamen bezonos plurajn tagojn por resaniĝi ; iu alia maŝino estis jam en riparado, tria estis ĵus sendita por ĝenerala revizio al la laborejoj en Darmstadt ; pluraj skipanoj estis en ripoztempo, en regula forpermeso aŭ en paŭzo pro malsano. Por mallonge diri, la tuta bela konstruaĵo ne tenis sin surpiede. Mi devis refari folion, ho ve ! plenan de tiuj maldezirindaj sed neeviteblaj skip-alternoj.

Tiu S-ro David estis rufa koloso, intenskolora kaj laŭtvoĉa. Pri viroj, kiujn li taksis mol-karakteraj, li diris : "Mi, se mi estus tia, mi manĝus miajn kojonojn!" (Sed, mi pensis, se li ja estus "tia", kie li trovus la necesan energion por ilin fortranĉi ?)

Li diris : "Staciestro estas rilate al maŝinejestro kiel infanteria kapitano rilate al kolonelo de teknika trupo." Li mem portadis uniformon de tia trupo, ĉar li estis kapitano en la 50-a sekcio de operacaj fervojoj.

\* komun-uzadon (Fervoja Leksikono)

Sub malmilda karapaco, S-ro David kaŝis koron el oro ; pri tio mi spertis personan pruvon. Ofte ni ricevis de la stacio telefonajn mesaĝojn : "Ĉu vi povas havigi maŝinon por trajno numero N ?" Temis pri fakultativaj trajnoj, planitaj sed ne ĉiutage programitaj, kiujn oni survoĵigis laŭbezone. Mi ĉiam respondis : "Ni havigos maŝinon por trajno N, horon H en la stacidomo." Escepte de unu fojo : mi ne disponis plu unu maŝinon, devinte forsendi la lastan, kiu estis rezervita en la remizo. Tute senhelpe, ne posedante fean bastonon, mi kun peza ŝarĝo sur la koro rifuzis "havigi maŝinon". Tiu trajno estis rapida varvagonaro transportanta putremajn produkt-ojn de sud-orienta Francio al Nederlando. La afero, portita ĝis la ĝenerala direkcio, kaŭzis tondran bruon. Mi estis - neinformite - akuzita, kondamnebla al punsankcio, aŭ almenaŭ al severa mallaŭdo enskribota en mia dosiero. Patro David ne aŭdis tion per favora orelo. Li povis ne interesiĝi pri la sorto de eta staĝanto, kiun cetere li apenaŭ konis ; sed ne tia estis lia koncepto pri sia estra respondeco : lasi kondamni senkulpan sengradulon, ne estis lia kutimo. Li saltis en la unuan trajnon al Majenco por pledi en mia afero. Li pledis kun tia konvinko kaj tia impeto, ke li eltrudis la juĝdecidon : nek sankcio nek mallaŭdo, mi estis tute senkulpigita. Sed pri tio mi aŭdis nur monatojn poste, per koridora maldiskretaĵo, kiam mi laboris ĉe la direkcio.

Pro la graveco de la lokomotiv-trafiko en Bingerbrück, S-ro David havis la gradon de ĉef-maŝinejestro. Lia adjunkto, la propratitola maŝinejestro, estis S-ro Lhuillier : gajhumora, bonvivema Bordozano, floranta 40-jarulo, kiu sin sentis komforte en sia haŭto. Li tuj amikiĝis al mi, kaj glatigis por mi la debutajn malfacilaĵojn.

S-ro Lhuillier havis junan edzinon, ĉarman, spritan kaj tre belan. Tio ne malhelpis por li la eksteredzecajn aventurojn. Iam li alparolis min aparte :

- Vi sciu, se vi emas fiki, Leona estas tre pura kaj komplezema. Kaj tio ne kostos al vi, ĉar ŝi ne estas sinvendema : ŝi ne estas putino, ŝi faras tion pro nura plezuro.



Leona estis la germana kelnerino de nia kantino. Sana planto, kun vizaĝo ne bela, sed afabla kaj ridema, sur korpo de perfektaj firmaj formoj. Bela plezurbesto, cetere ne malsprita. Kaj ne malcedema. Ŝi volonte konsentus al mi siajn favorojn : tion esprimis elokvente ŝiaj okuloj ; kaj pri tio mi ricevis konfirmon, iom palpante ŝin ; sed ne transmezure, ĉar mi ne volis allasi min ĝis ekstremo. Mi estis fianĉo, tiel ĉasta kiel fianĉino de tiu tempo, en kiu la virgeco de la knabinoj estis alte ŝatata. Simpla konstato, sen juĝo pri morala valoro : fakte mi pli aprobas la nunan liberecon de la seksaj moroj, kaj jam en tiu tempo mi neniel malestimis la facil kondutan Leonan.

Baldaŭ mi majstris la rutinon de la metio, rutino variigata per multaj incidentoj : lokomotivoj en paneo pro nesufiĉa prizorgado (ĉar dum monatoj necesis pri-trakti nur plej urgajn aferojn); lokomotivoj difektitaj kaj skipanoj vunditaj sekve de bomb-atencoj ; malsanoj ne maloftaj ĉe tiu personaro submetita al tro laciga laborstrecado. Dum miaj okhoraj labortagoj aŭ miaj dekhoraj deĵornoktoj laŭ semajna alternado, mi devis ofte improvizi decidojn. Plie la hortabeloj estis perturbitaj per longaj malfruoj. Al mi mem, kelkajn monatojn poste, okazis, ke mi devis atendi trajn-korespondon plurajn horojn en stacidomo ; unu fojon mi restis seninterrompe dudek horojn sur lokomotivo, jen veturante, jen atendante.

Okazis ankaŭ neantaŭviditaj kromaferoj.

Iam iu brava neviglapensa germano venis al mi plendante, ke li estis batita, seksatencita kaj priŝtelita de du nord-afrikaj tiraljoroj el la vojpgardanta trupo. Mi paciencie eksplikis al li, ke la vojpgardado neniel koncernas min, kaj mi instigis lin sin turni al la militistaj instancoj, al la ĝendarmoj aŭ al la polico. Vane : li senlace ripetadis sian historion. Fine, superekscitite, mi devis puŝi lin je la ŝultroj al la pordo, dekan fojon redirante : Iru al la polico !

Iun vesperon mi spertis personan afereton kun la armita forto. Trapaŝante la trakojn por iri al mia deĵoro, mi estis haltigata de patrolo, kiu kondukis min al sia

postenĉefo, juna leŭtenanto kun aroganta mieno. Mi ne estis en tia humoro, ke mi lasu tiun flavbekulon imponi al mi. Mi tre viglatone protestis, minacis plendi ĉe la supera aŭtoritato pri malhelpo kaj malfruigo al mia deĵorado. Li provis senkulpigi siajn subrangulojn, argumentante, ke ili nur aplikas striktajn instrukciojn. Tiam mi severe admonis, ke li instrui al siaj trupanoj rekoni kaj respekti la brakbendon de la Regio, kiun mi portadis en miaj deĵorhoroj. Li tuj ellasis min, preskaŭ balbutante pardonpeton ; mi tre digne foriris, rigide pasante antaŭ la alĝeria serĝento kaj liaj tiraljoroj, mirkons-ternitaj, ke civilulo parolis kun tia tono al ilia oficiro.

En la haveno de Bingen estis ankrita vaporsipeto destinita por traveturi Rejnon al Rudesheim. Ĝi dependis de la fervoja maŝinejo, kaj jam plurajn monatojn ne funkciis. Interkonsente kun la staciestro, mi iniciatis ĝian reaktivigon. Sed, por ĝin konduki, necesis oceanrafika ŝipestro\*: la internacia regularo ja postulas tiun titolon por "navigi sur Rejno, eĉ kiam temas pri simpla traveturo de bordo al bordo.

Mi publikigis anoncon en la loka gazetaro : "Estas serĉata oceanrafika ŝipestro. Oni sin turnu al la lokomotivejo en Bingerbrück".

La postmorgaŭon eniris en la oficejon impona persono : longa griza mantelo, marista kaskedo, griza barbeto. Li haltas fronte al mi je sespaŝa distanco en kalkanuma kunklako, kaj sin prezentas :

- Vic-admiralo Krrasnov\*\*, el la eskadro de la Nigra Maro.

Impresite, mi prezentas al li tekston de la dungokondiĉoj. Li apenaŭ superflugas ĝin per distrita rigardo, kaj tuj, grandsinjore, subskribas.

Tiel mi dungis rusan admiralon.

---

\* fr. capitaine au long cours ; angl. master mariner ; germ. Kapitän des grossen Kauffahrtei.

\*\* Imagita nomo, ĉar mi ne memoras pri lia vera nomo.

La morgaŭon, estis dimanĉe, mi partoprenis en la inaŭgura traveturo de la vaporpramo kun kolego el la trakservo.

Albordiĝinte en Rüdeshheim, ni eniras ĉe gastejestro-vitkulturisto. Ĝojega vidi francojn, laŭdifine kompetentajn pri vino, li tuj invitis nin al kelvizito : li nepre volis gustumigi al ni siajn vinspecojn, kiuj estis ĉiuj tre ŝatindaj : Johannisberga, kompreneble, de diversaj jarrikoltoj, kaj aliaj, inkluzive "Burgunder"\*. Ni afektis gravajn mienojn de spertuloj, kaj ne domaĝis laŭdojn. Plezurige estis vidi la bravulon floranta je nia flata aprecado. Ni resupreniris la ŝtuparon, nu ! en sufiĉe kontentiga ekvilibro.

Mi estas vokita al Majenco. S-ro André, la inĝeniero - regiona trakciestro, ŝargas min per misio : esplori ĉiujn brulaĵajn stokojn de Koblenco ĝis Ludvigshafeno kaj de Wiesbaden ĝis Kirn.

Tutan semajnon, armite per dekametra mezurilo, kalkula ŝovstango, krajono kaj notlibreto, mi, libera kiel birdo aera, trakuris la liniojn, mezurante la karbamasojn ; ili ampleksis de kelkaj tunoj ĝis 5 aŭ 6 mil. La vetero estis bela, la pejzaĝoj mirindaj. Vere, tre agrabla libertempo.

Fine restis por viziti du malgrandaj stacioj proksimaj al Majenco, provizore ne priservataj de la fervoja trafiko. Ne grave : oni disponigas al mi aŭton, longan nigran Rolls-Royce-limuzinon stiratan de rusa princo.

Mia alveno en tiuj du vilaĝaj stacietoj, kun mia nigra mantelo, mia malnova gadzarta\*\* kaskedo kaj mia violkolora brakbendo de la Regio, efektis kiel entrudiĝo de vulpo en kokejon. Mi eltrovis du magrajn karbamasojn de kelkaj tunoj, el kiuj, kredeble, la vilaĝanoj ĉerpadis iomete pro la bezono de sia hĉjma hejtado.

Kaj mi revenis, mision plenuminte.

Iun tagon mi prezentigis en la kabineto de S-ro André, kaj proponis al li kandidatecon de mia amiko Macary. Li abrupte demandis :

\* el vitoj de Burgonja deveno.

\*\* gadzarto : lernanto pri "Artoj kaj Metioj" (aŭ inĝeniero A. k M.)

- Kiu estas lia metio ?
- Nu...
- Jes, mi scias : vi diros al mi, ke li estas inĝeniero...
- Ne, sinjoro : tiu lerneja titolo ne havigas veran metion. Metion fakte li ne havas, kiel ankaŭ mi. Mia opinie la trakciista metio ne estas tiel facila, ĝi necesigas sufiĉe longan spertadon.

Li mildiĝis :

- Jes. Mia demando signifas : ĉu li estas mekanikisto, forĝisto, aŭ kio ?

(Ĉar en niaj lernejoj oni ekzerciĝas unue en la kvar manlaboraj fakoj : forĝado, mekaniko-alĝustigado, fabrikado de lignaj muldiloj, muldado-fandado ; poste oni specialiĝas pri unu el la kvar). Mi respondis :

- Li estas fandisto, sed ne malpli kapabla kaj lerta pri mekaniko.
- Bone. Li venu. Mi destinas al li staĝon en la maŝinejo de Treviro-Ehrang.

Edziĝinte en septembro en Florako, mi revenis kun Ivona. Oni loĝigis nin komence en la belega hotelo Starckenbürger-Hof en Bingen. Nia ĉambro, vasta kaj hela, malfermiĝis sur balkono fronte al plej bela dekoraci-fono : la enirejo en la "neroa trafikado". Meze de la rivero la maldika silueto de la fama Musoj-Turo ; dekstre, sur la deklivo de Taŭnus-monto, la kolosa statuo Germana kun kasko kaj kiraso, staranta sian gardon ĉe Rejno fronte al okcidento ; pli malproksime la impona ruino de burg'o Ehrenfels ; maldekstre la maso de Hunsrück-monto kun burg'o Rheinfels bonguste restaŭrita, ĉapelata per sia ombrelforma platano ; sur la unua plano maldekstraborde la kunfluejo de Nahe inter Bingen kaj Bingerbrück, dekstraborde la ridanta vilaĝo Rüdeshheim kun la fama Johannisberg-vitejo.

Ivona memoras pri iu "Oberingelheimer rot", kiun mi gustumigis al ŝi ĉe la unua vespermanĝo en "Starcken"-hotelo. "Liebfräumlch", "Schwartzter Herrgott" el Worms, "Bacharachter Riesling", mi estis jam familiariĝinta kun ĉiuj Rejnvinoj, kaj mi komencis iniciĝi pri la tre honorindaj Mozelvinoj, eĉ pli aprecataj de la Rejnlandaj spertuloj.

Poste, tiel longe kiel ni loĝis en la hotelo, ni prenadis niajn manĝojn en la fervoja kantino, Ivona ĉiutage, kaj mi kiam mi estis tie : ĉar intertempe mi ricevis la permeson veturi sur la lokomotivoj, kaj miaj laborhoroj estis tre variaj. Ne mankis ĉarmo en la retroviĝoj je diversaj horoj tagaj aŭ noktaj. Mi faris en "Starcken" iom spektaklajn enirojn kun mia blua tolvesto, mia malnova kaskedo, mia ruĝa fulardo kaj mia nigra faŭko.

Mi devas diri, ke en la kantino Leona tuj ĉesis okulumi al mi : mi jam rimarkis, ke ŝi ne estas stulta.

Ni estis tablo da gajaj kompanoj, fraŭloj kaj geedzaj paroj. Ĉe la deserto, iu Bordozano dotita per agrabla voĉo kantis al ni la eksmodajn gloraĵojn de Mercadier, Paulus, Fragon kaj precipe Mayol : "Virinoj, kiel beletaj vi estas", "La manoj de virinoj", ks. Oni scias, ke la Tulona kantisto ne estis tre logata de la "bela sekso", tamen li estis sen-egala por prikanti la inan ĉarmon. Nia amato brilis en tiu repertuaro.

Iun vesperon tiu kantino estis la loko de komika sceno. Ni estis decidintaj iri al spektaklo en la operdomo de Koblenco. Ĉar ni disponis nur mallongan tempon inter mia deĵorfino kaj la forveturo de la trajno, Ivona estis alportinta valizon kun niaj vesperaj kostumoj. Ni estis haste ŝanĝantaj la vestojn en la apudkuirejo, kiam neatendite alvenis la kuiristino. Ŝi kredeble sin demandis, kion faras tie tiu duonnuda juna paro. Ekridegante, ni apenaŭ povis fini nian vestadon ĝustatempe por envagoniĝi en la lasta minuto.

Ankaŭ en la kantino, la elektristo de la trakservo invitis la kolegaron al radio-kunsido.

La granda tablo estis tute kovrita per valvoj, reostatoj, kapacitaĵoj, kaj ĉirkaŭe deko da aŭskultiloj ĉe kablekstremaĵoj. Kiam iu proksimigis manon, oni aŭdis siblojn, krakojn, miaĵojn. Kun aŭdilkaskoj sur la oreloj, ni religie aŭskultis svagan fritbrueton... kaj jen subite, preskaŭ netdistinge, parolon venantan de la Eifelturo. Tia estis nia unua renkonto kun tiu mirinda inventaĵo.

Baldaŭ estis atribuata al ni meblita apartamento : tiu de la elpelita germana staciestro. Tre komforta, je la unua sur la teretaĝo, kun korbelfenestro fronte al larĝa strato. Inter la manĝoĉambro kaj la salono, granda fajenca forno hejtis la tutan apartamenton per bruligado de brunaj lignitaj briketoj.

Ni instaligis luitan pianon. Tiel Ivona, samtempe kiam ŝi debutis kiel hejma kuiristino, povis ekzerciĝi dum la longaj horoj de atendado.

Por la mastrumado kaj la aĉetoj ŝi estis helpata de germana servistino. Ni havis plurajn sinsekve. La unua kaj plej lerta, Paŭla, estis knabino simpata kaj elturniĝema. Ja tro : ni devis rezigni pri ŝia servado, ĉar ŝi forŝtelis de ni monsumon preskaŭ egalan al mia monata salajro. Tiam venis Franciska, tre bela brunulino, kiu baldaŭ lasis nin, ĉar ŝi ploris ĉiuvespere tial ke ŝi ne vidas sian Schatz ("trezoron") ; poste Leni, ridema diketulino, kiu okulumis al ĉiuj niaj fraŭlaj gastoj - tamen ankaŭ ŝi ekŝiĝis ; fine Betti, tre juna knabino prezentita de siaj gepatroj, bravaj malriĉaj homoj, ne tre sperta sed plena de bonvolo kaj afableco.

Mia juna dommastrino, sin riskante je rostitaj kokidoj kaj fruktotortoj, ofte invitis kiel gastojn kelkajn amikojn kaj kolegojn : Bladier, Longeon, staĝantoj en la maŝinejo de Majenco ; Macary, veninta unu fojon de la malproksima Treviro ; Coin, gadzarto el Parizo kaj lia juna edzino, kiu amuzis nin dirante per tono de profunda konvinko : Ni, edzinoj de inĝenieroj... ; kaj Roberto Bernard la Florakano, amiko de la infaneco, elektristo ĉe la Majenca motorvagnejo.

En la belveteraj tagoj, kiam mi estis libera, ni iris promene sur la altaĵo de Bingen, ĝis monaĥinejo transformita en gastejo, de kie vidiĝas admirinda panoramo. Ĉe niaj piedoj la du ĝemelaj urbetoj kunigataj per la ponto super Nahe ; dekstre la vitejoj kovrantaj la montdeklivon kaj la ebenaĵon, sur kiu Rejno pigre serpentas ; maldekstre la kruta valo fosita de la riverego post disfalo de la skista montovolbo, en kiun ĝi muĝante impetas.

Aliajn fojojn, post noktiĝo - ĉar tiel estis pli roman-

tike - ni piede sekvis la vojon, eksan vojeton de bargaj tirĉevaloj laŭlonge de la rivero. Ni pasis preter la sinistra Musoj-turo kaj pluiris ĝis la pacaspekta Klemens-kapelo ĉe la akvobordo, kun ĝia eta tombejo piede de la alte staranta burg'o Rheinstein.

En la dimanĉaj matenoj pasis sub niaj fenestroj trupoj da Wandervogel (Migrobirdoj), gejunuloj piede ekskursantaj. Ili marŝis en gaja paŝotakto, kantante kaj ludante per liuto, gitaro aŭ mandolino. Mi mem estis aĉetinta mandolinon kun portrubando ornamita per broditaj floretoj kaj surskribo : Weg mit den Grillen und Sorgen ! (For la ĥimerojn kaj zorgojn!), unua verso de fama Wander-lido. Ĝi respondis al mia tiama humoro. Jam malproksimiĝis la memoro pri la nigraj jaroj 1914-1918\*. Mi ĝuis la vivon kaj sentis min feliĉa ; tiu sento blindigis min al la signoj, tamen klaraj, kiuj anoncis estontecon de novaj plagoj\*\*.

## 2. Sur la trakoj.

Lokomotivista laboro. Hejtado kaj kondukado.

La ĉefmaŝinisto kaj la ĝeneral-direktoro.

La kalcitra hejtisto.

La dormema kondukisto.

La Rejna Respubliko. La Koblencaj noktoj.

Léonard Constant. La sturmgalopo de spahioj.

Vespero en Koblenco. La estro de la stacioj en Bonno.

Vizito en Euskirchen.

Sturma enveturo en la Remagen-stacio.

Katastrofo evitita.

La frajtopeca vartrajno.

Rejnvalo. La studentoj.

La ĉerizbrando de la kampulo.

La bela knabino en Alzey.

Vintro. Neĝo kaj frosto.

La ekzameno. Kondukisto ! Elreviĝo.

\* Vd. "Kontraŭflue"

\*\* same (Epilogo)

Jen do mi sur lokomotivoj, mia longe karesita revo. Komence triavice, t.e. kiel spektanto observanta la lertan manipulado de la ŝovelilo far la hejtisto, dum la lokomotivestro inicis min al la kondukado de la maŝino. Kondukado pli facila ol tiu de la fajro : la hejtista laboro estas delikata ; ĝi postulas ĝustan ekvidon kaj lertecon por taŭge disŝuti karbon-sterne sur la tuta surfaco de la fajrokrado. Tial necesas unue esti bona hejtisto antaŭ ol fariĝi kondukisto. Kaj kiam la hejtisto spertas malfacilaĵojn pro malbonkvalita brulmaterialo, la respondeca ĉefo prenas mem la ŝovelilon en manoj, dume plu zorgante pri la stirado.

Unu fojón mi estis eĉ kvaravice : sur la lokomotivo, krom la normala skipo kaj mi, estis ĉefmaŝinisto\*. Ni estis jungitaj al speciala vagonaro, kiu transportis Poincaré, la eksprezidenton, tiam ĉefministro.

Ho ve ! estis forgesita nur unu afero : provizi nin per bona brulaĵo. La nia estis tiel malbona, ke ni falis en vaporpreman paneon. Necesis haltigi la trajnon sur dezerta kamparo inter du stacioj.

La ĉefmaŝinisto ordonis al la hejtisto kaj al mi disrompi briketojn konservitajn sur la tendro kiel helpoprovizon. Dum la kondukisto, agante sur la injektoro, kontrolis la variadon de la vaporpremo, la ĉefo prenis la ŝovelilon, kaj penis refari fajron taŭge varman.

Ni vidis veni, marŝanta sur la balasto\*\*, belvestitan sinjoron : la prezidanto-ĉefdirektoro de la Regio. Li heziteme vagis apud la lokomotivo, haltis kaj demandis :  
- Nu, kio okazas ?

La ĉefmaŝinisto strabe rigardis al li, kaj ŝajnis, ke li ne rekonas lin. Li prezentis al li la ŝovelilon :  
- Se vi bonvolas montri al ni, kiel endas fari, ne ĝenu vin !

La alia, ne insistante, foriris.

\* ĉefa kondukisto, ĉefa lokomotivisto (Fervoja Leksikono).

\*\* balasto 2 (PIV) ; balasto, ŝetro (Fervoja Leksikono).



Iun tagon, kiam mi komencis preni en manoj la konduk-rimedojn, la juna hejtisto ekgrumblis :

- Estas eble teni la rapidon, sen tiel premi sur la reguligilon !

Ĉar mi kondukis je alta vaporpremo. Mi respondis :

- Konsentite. Mi malpliialtigas la premon. Sed tio devigas min pli larĝe malfermi la vapor-enfluan en la cilindroj. Rilate al karbo-konsumado, oni tiel neniom gajnas.

Tiam la stiristo ekparolis. Sin turnante al la hejtisto:

- Li estas prava. Ni tro kutimas uzi malaltajn premojn. Lia kondukado estas perfekte ĝusta.

La kompano ne aŭdacis repliki al la parolo de la ĉefo, sed mi sentis lin obstineme spinita. Kion fari ? Venis al mi subita inspiro. Mi iris al li kun etendita mano :  
Ĉu sen ĉagrenresento ?

Lia vizaĝo heliĝis per bela rideto. Li forte premis mian manon. De tiam mi fariĝis bonaj amikoj.

Mi tre deziris, ke miaj kunuloj traktu min kiel unu el ili, sen atento pri mia inĝeniera titolo. Fakte, estis facile : ĉar la trakciistoj ne havas grandan senton pri hierarkio ; ja konsciaj pri sia profesia valoro kaj sia respondeco, ili estas senkompleksaj fronte al laŭpostenaj superuloj. Ili tuj cidiris al mi, kaj reciproke.

Iam mi troviĝis kun Limoĝa lokomotivestro, vinbotelon amanta. Ofte, kondukante, li endormiĝis sur sia seĝo. Kiam mi ekrimarkis tion, mi maltrankvile rigardis la hejtiston. Tiu ĉi aspektis tute senzorga. Li simple diris al mi :

- Rigardu ĉe la venonta signalo.

Efektive, je la alproksimiĝo al ĉiu signalilo, la brava B. per senmanka reflekso malfermis la okulojn, kaj ĝuste reagis. Post paso de la signalo li trankvile reen-dormiĝis.

En printempo ni ĉeestis la ekfloron kaj elvolviĝadon de la Rejna Respubliko. Naskite en facila sento, sube kuraĝigite de la franca registaro, kaj komence renkontinte

nur molan reason de la germanaj aŭtoritatoj kaj de la Schupo\*, ĝi estis finiĝonta en sangobano per masakroj en Aĥeno kaj en Pirmasens, ĉe indiferenta vido de la okupaciaj instancoj.

Ĉiutage la Rejna revolucio etendiĝis kiel olea makulo. Ĉiutage ni vidis laŭlonge de la linioj unu plian stacion, en kiu sur la publikaj konstruaĵoj flirtis la flago kun tri horizontalaj bendoj verda-blanka-ruĝa.

En Koblenco la vastega atendejo-restoracio de la stacidomo fariĝis la ĉefstabejo de la Rejnaj "memdefendaj trupoj". La halo estis plena de junaj viroj en pseŭdo-uniformoj, kun heterogena armilaro, tutan nokton cirkulantaj, laŭtbabilantaj, kantantaj lidojn el la Rejna folkloro kun akompano de liuto aŭ gitaro. Mi tie pasigis kapturnajn horojn en etoso de brua ĝojego, en peza bierodoro kaj densa tabakfumaĵo.

Dume, malgraŭ la momenta supereco de tiu ekzaltita junularo, ne malarmis la germana rezistado en urboj kiel Majenco kaj Saarbruko, ĝiaj tradiciaj bastionoj. Eksplodis stratbataloj inter bandoj da junaj viroj, germanaj patriotoj kontraŭ rejnlandaj patriotoj. La maljunuloj, pli pacemaj, ofte estis sekrete favoraj al la nova respubliko, ĉar ili ĉiam vidis la Prusojn per malŝataj okuloj.

Intermiksiĝinte por helpi al maljunulo batata de grupo da furiozuloj, la juna instruisto Léonard Constant, el la franca liceo en Majenco, estis mortvundita. 35 jarojn poste, en Paŭo, mi loĝis sur strato, kiu ricevis lian nomon.

Iam sur Majenca strato, Ivona kaj mi ĉeestis impresan spektaklon. Kurante por ie dispeli bataleton, plotono da spahi-oj kun elingita sabro sturme galopis kvaropvice sur la tuta larĝo de la strato. Ni apenaŭ povis rifuĝi en pordangulo. La sturmo pasis kiel freneza fantasio, kun la ruĝaj manteloj flirtantaj en la kura vento, kun la sabroj disĵetantaj fulmobrilojn, en la martelado de la hufoj sur la sonora pavimo.

---

\* Schutzpolizei, la germana ĝendarmaro.

La atencoj sur la trakoj fariĝis pli kaj pli maloftaj. La 14-an de julio 1923, kondukante rapidan trajnon al Majenco, ni estis haltigitaj en la malgranda stacio Uhlerborn. La staciestro - mi revidas lin kurantan kun sia komiketa redingoto kaj sia kaskedo de la Sudfrancia Fervojskompanio - informis nin : oni levis bombon metitan sur niaj reloj, kaj garda patrolo esploras, ĉu ne estas iu alia. Ĝi estis la lasta. Bonŝance mi ne estis inter la viktimoj de tiuj atencoj (cetere, neniam grave vunditaj).

En tiu sama 14-a de julio, la pasaĝeroj pasantaj je ektagiĝo tra la malgranda stacio Zülpich, inter Euskirchen kaj Düren, estis subite vekitaj per laŭtega eksplodbruado. La franca staciestro estis metinta sur la relojn ĉenon da kraksignaloj por siamaniere celebri la nacian feston.

Tiu kokardama staciestro estis refarbiginta la fasadojn de sia stacidomo laŭ larĝaj trikoloraj strioj, blu-blank-ruĝaj, kaj simple ŝanĝinta la nomon ZÜLPICH al TOLBIAC. Ĝi estis ja la loko de la batalkampoj, sur kiu Klodvigo venkis la Alemanojn post sia fama vokpreĝo : "Dio de Klotilda, se ci donos al mi la venkon..." Sekvis la konvertiĝo de la "fiera sikambro" sub la episkopa bastono de Sankta Remiĝo, kaj de ĉiuj liaj kumbatalintoj ; konvertiĝo, kiu faris el la Franka Gallujo, poste Francio, la "plejaĝan filinon de la Eklezio".

Mi estis rimarkinta en la malgranda preĝejo de Zülpich latinan surskribon gravuritan sur marmorplato, mencianta pri Tolbiacum kaj pri Francorum incunabula. Se tio ne estis la lulilo (incunabula) de la Frankoj, almenaŭ tie naskiĝis la potenco de tiu Merovida dinastio, la unua de francaj reĝoj.

Klodvigo en Tolbiako, Karlo la Granda en Aĥeno kaj en Rudesheim\*, Rolando ĉe Rolandseck, la aristokratoj el-

\* Laŭ legendo, la montdeklivo ĉe Rudesheim estis priplantita de Karlo la Granda mem per vitoj el la Orleana regiono, kaj ĉiujare en difinita punkto la fantomo de la imperiestro revenas inspekti sian vitejon.

migrintaj en Koblenco, la franca departemento Mont-Tonnerre kun ĉefurbo Majenco, la monumento al Hoche en Neuwied kaj en Andernach\*, la tombo de Marceau en Altenkirchen, ĉie en tiu regiono mi retrovis la historion de Francio.

Eble pro memoro pri Klodvigo, pli kredeble pri Karlo la Granda, la Rejnaj respublikanoj adoptis la sloganon : "Ni Rejnlandanoj estas Rejnfrankoj, kaj volas Rejnfrankoj resti." Al kio la propagando de l'Reich replikis per jena surskribo sur poŝtmarkoj tiuokaze eldonitaj: "la Rejnlandanoj estas germanoj, kaj volas resti en Germanio." Vortaj bataletoj sen graveco, se oni ne estus transpasinta tiun limon.

Aŭtuno venis. En jam frosta nokto, je la 2a matene, Ivona tute sola, tremanta pro maltrankvilo pli ol pro malvarmo, trapaŝis la trakojn por iri al la maŝinejo. Mia trajno estis revenonta vespere je la 11a, kaj ŝi estis sen novaĵo. La telefono, kiu kunligis nin senpere kun la stacidomo kaj la maŝinejo, kaj kiun ni estis uzintaj kelkan tempon, jam ne funkciis sekve de fuŝkontakto.

En la remizo troviĝis lokomotivo sub vaporpremo. En vapornebulo aperis la silueto de la nokta hejtisto. - Ho mia sinjorineto, li diris, kun via edzo sur lokomotivo, ne estos baldaŭa fino al via maltrankvilo... Iru en la oficejon, tie oni informos vin.

Tie la nokte deĵoranta vic-ĉefo sciigis al ŝi, ke mia trajno estis haltigita pro terdisfalo, kiu obstrukcis la vojon. Necesos ankoraŭ pluraj horoj por malimpliki la trakon kaj restarti la trafikon.

Plu tremante, tiam nur pro frosto, kaj serenigite, ŝi reiris por dormi sola sur la larĝa kuŝejo konsistigita per niaj du intertuŝantaj ĝemellitoj.

En Majenco, iun vesperon, mi lasis la lokomotivon en la remizo kun surskribo sur papero : Lasi la fajron estingiĝi, kaj purigi la kradon.

La morgaŭan matenon je la kvara, mi alvenis unu horon antaŭtempe. Feliĉe : ĉar mi trovis la fajrujon ĝisfaŭke

\* Hoche venkis en Neuwied kaj havas tie monumenton ; li mortis en Andernach kaj estis tie entombigita.

plena, plenŝtopita de skorio. La germana noktogarda hejtisto ne komprenis mian mesaĝon.

Neniom da tempo forperdenda ! Demeti la jakon kaj la ĉemizon, pugnekpreni la hokstangon, eltiri unu post alia kaj eksteren ĵeti la inkandeskajn skoriplatojn. Dudek minutojn poste, kun rostita vizaĝo, mi estis malsekega de ŝvito malgraŭ la ekstera malvarmo, sed la krado estis tute pura. Tuj : petrolsorbinta ĉifono, alumeto, brakpleno da seka ligno. La fajro ekkraketas, mi kun malrapida zorgo ŝarĝas ĝin per disrompitaĵoj briketoj, poste per malseketa karbo. Mi vidis la horloĝ-montrilojn turniĝi, sed necesis procedi laŭmetode, senhaste.

Kiam la skipo alvenis, mia fajro estis konstruita, kaj la premo komencis altiĝi. La lokomotivestro vidis la elĵetitajn skoriojn, rigardis la prem-indikilon, kaj diris al mi sian kontentecan. Mi simple respondis :  
- Mi soifas.

Ĝuste li portis al mi boteleton da malvarmeta biero. Mi eltrinkis ĝin per unu gluto el la botelkolo. Poste, ankoraŭ tute malseka, mi resurmetis la ĉemizon kaj la jakon, kaj ek al la stacio ! Kondukinte la lokomotivon al la kapo de la vagonaro, mi mem iris inter la bufroj por aljungi ĝin. Kaj en la precize difinita minuto ni ekstartis.

Iun sabaton ni havis Robertson Bernard kiel vespermanĝan gaston. En mia deĵorplano estis nokta rapidtrajno al Bonno. Mi proponis, ke ni iru fini la vesperon en Koblenco.

Ni ekveturis, Ivona kaj Roberto en unuaklasa vagono, mi sur la lokomotivo, kie mi estis en triavica pozicio. Kvaronhoron antaŭ la stacio, lasante la skipon daŭrigi sen mia kunesto, mi iris laŭlonge de la vagonaro ĝis la kupeo. En la tualetĉambreto mi lavis min kaj ŝanĝis tolaĵojn kaj vestojn. Ni alvenis en Koblenco, kaj tie finpasigis la vesperon en kinejo.

Poste miaj gekunuloj reveturis per rapidtrajno al Sudo. Frumatene, en la Majenca stacidom-atendejo, Ivona atendis korespondtraĵon al Bingerbrück. Apogite sur tablo, ŝi endormiĝis. Roberto ne volis forlasi ŝin, sed poste li kon-

fidencis al mi : - Mi sidiĝis ĉe alia tablo, por ke oni ne vidu, ke ni estas kune : ŝi hontigis min !"

Dume mi veturis al Bonno, kie min atendis la skipo kun la lokomotivo, per ordinara trajno\*. Mi estis tute sola en malnova triaklasa vagono, kies kupeoj inter si komunikigis ; preskaŭ ĉiuj fenestrovitroj estis rompitaĵ; sen hejtado, dum ekstere frostis, neniam en mia vivo mi spertis tian malvarmegon.

Mi estis en sufiĉe malbona humoro, kiam sur la kajo mi renkontis la estron "de la stacioj" de Bonno. Li malpermesis al mi eliri el la stacidomo, pretekste ke mia legitimkarto validas nur sur la teritorio de la Majenca direkcio, do nome ĝis Koblenco. Mi respondis, ke devante atendi ĝis la vespero la forveturon de mia maŝino, mi pretendas laŭplaĉe disponi pri mia tempo, kaj libere cirkuladi.

Tamen, post kiam en la atendejo-restoracio mi englutis varmegan ĉokoladon, mi ne emis viziti la urbon, kiun mi jam konis. Mi sentis min sufiĉe vigla por salti sur lokomotivon trenontan vartrajnon al Düren. Sur tiu linio kun multaj deklivoj, mi ricevis elmontradon pri la laboro de la vagonaj bremsistoj. Streĉante aŭ malstreĉante siajn bremsojn laŭ la trakdeklivoj, ili reguligadis la rapidon sen necesa partopreno de la lokomotivestro, kiu devis interveni nur laŭ la signaloj. Li rimarkigis al mi tiun reguligadon de la veturrapido far la bremsistoj, kiun mi neniam antaŭe havis okazon observi.

Alveninte en Euskirchen, ĉe la vojkruciĝo inter la linioj Bonn - Düren kaj Treviro - Kolonjo, mi adiaŭis al mia cirkonstanca kunulparo kaj eliris en la urbon. Tie mi estis loĝinta dum mia militservo ĉe afabla kvindekjara vidvino. Fraŭ Blahs kaj ŝia filino Maria akceptis min kiel la perditan filon - sen graso bovido, sed kun kafo kaj kukoj - , kaj postulis de mi promeson, ke mi revenos kun Ivona (La promeson ni plenumis en la posta printempo, sekvante ĝis Kolonjo la linion sur la dekstra bordo de Rejno kaj malhastante sur la vojo. Inter du sinsekvaj

\* omnibusa trajno (PIV).

trajnoj ni elvagoniĝis en la stacio St Goarshausen kaj iris laŭ la ŝoseo borderita de florantaj ĉerizarboj ĝis la piedo de Lorelej-rokego).

Reveninte en Majenco, mi havis nenion pli urĝan, ol min prezenti en la kabineto de la ĉefinĝeniero. Mi aplombe petis, ke li anstataŭigu mian legitimkarton per alia valida sur la tuta rejnlanda reto. Tuj konsentite. En la unua okazo, mi ĝuis malican plezuron metante tiun novan karton sub la nazon de la estro de la Bonnaj stacidomoj, tiufoje devigita sendiskute kliniĝi.

Iam sur la linio de Koblenco al Bonno. Mi estis ankoraŭ triavica, ĉar tiun linian sekcion mi ne bone konis. La lokomotivestro konfidis al mi la kondukadon kaj iris laŭlonge de la trajno por esplori, sub kiu vagono troviĝas iu "triobla bremsvalvo", kiu kaŭzis al ni malfacilaĵojn.

Ni proksimiĝis al Remagen, en kies stacio mi devis halti. La hejtisto, juna germano, montris signojn de maltrankvilo, sed li ne aŭdacis ion diri al mi. Subite mi ekvidis, ke mi komencis je 80-kilometra horrapido la trakkurbon eniran en la stacion. Mi tuj faris ĉion necesan por haltigi la trajnon laŭlonge de la kajo. La antaŭo de la lokomotivo haltis ĝuste ĉe la piedo de la elvetura semaforo, kiu estis en stop-ordona pozicio. Certe la pasaĝeroj sentis drastan ekskuon. Revenante al la lokomotivo, la maŝinestro sobre komentis :

- Ci timigis min. Sed fine ci bone elturniĝis. Ekde nun ci ne plu eraros ĉe tiu ĉi stacio.

Ja certe !

Kaj de tiu momento la kalcitrema triobla valvo, malblokite, bone refunkciis.

Iun vesperon je noktigo, en la nebulo, ĉe la enirejo en la disranĝa stacio de Koblenco, mi haltis antaŭ stopordona signalo. De la trafikdirekta posteno venis oficisto portanta paperon : ordono preteriri la signalon. Mi reekstartis tre singardeme, ĉar iu instinkto aŭ intuicio igis min subflari danĝeron.

Malrapide ni antaŭeniris. Mi streĉis la okulojn por sondi la krepuskan duonhelon... Kaj jen, tra la nebulo fantomis nigra maso : tie, sur nia trako, haltigita trajno !

Streĉante la bremsojn ĝis la limo de blokado kaj retroigante la vapor-enfluon, mi sukcesis halti du metrojn antaŭ la fatala kunpuŝiĝo. Pro la inerci-maso de ambaŭ trajnoj, eĉ je malgranda rapido, ĝi povis esti katastrofa.

Tiam venis la trafik-direktisto anhele kuranta, pala kiel kadavro, svinganta novan mesaĝon : Kontraŭ-ordono, la unua estis erara ! Tion mi jam sciis. Kun retrospektiva timo mi ekkonsciis, ke mi ĵus evitis gravegan akcidenton.

Feliĉe, en tiu aktiva vivado ne estis nur dramaj aŭ krizaj momentoj.

Iun matenon mi kondukis sur la ebenvalo inter Bingen kaj Majenco frajtopecan vartrajnon. En ĉiu stacio ni manovris por lasi vagonojn kaj kunpreni aliajn. Dum ĉiu el tiuj manovroj unu el ni tri iris por provizado al la kooperativa vagono. Sardinskatojoj, pasteĉoj, fumaĵitaj haringoj, fromaĝoj, biero, Bordoz-vino, tiu mateno estis longa, bone surtrinkata manĝetado. Tiu metio akriĝas la apetiton kaj vivigas la soifon ; sed, ĉar oni bruligas multe da kalorioj, ĉio tre facile pasas.

Mi konis en ĝiaj plej etaj detaloj tiun linion sur la maldekstra Rejno-bordo de Majenco ĝis Bonno. Al mi parolis ĉiu burg'lo kun prestiĝa nomo kaj romantika legendo ; ĉiu mezepoka urbeto, Oberwesel, Bacharach ; Boppard, kie, de iu preciza loko, oni vidas Rejnon, ŝajne partigitan de alternaj montkabetoj, en la aspekto de kvin lagetoj ; Boppard, de kie, sur dentrela trako, trajneto suprengripas la Hunsrück-deklivon al iu surmonta vilaĝo. Ankaŭ ĉiuj tuneloj, ĉiuj ŝtonegoj, ĉiuj detaloj de la vojo estis de mi konataj. Jam ne estis la tempo, kiam ŝercema kamarado povis diri al mi : "Metu karbon en la fajron" ĝuste en la momento, kiam seka vojturmo ekskuis min transverse, kun unu piedo sur la lokomotiva planko kaj la alia sur



la tendra : tiujn perfidajn vojturnojn mi ĉiujn aparte konis.

Post la orgojla imperiestra kastelo Stolzenfels sekvas de Koblenco al Borno la suprolinio de la Sep Montoj; la burgruino Rolandsbogen, kie, laŭ legendo, la bravega franka heroo, mirakle eskapinte el Roncesvalo, sin al-lasis al morto, post kiam li vidis de sur sia montsupro la entombigon de sia fianĉino retiriginta en la monaĥejo Nonnenswerth sur Rejn-insulo. Ĉe Mehlem, staranta sur sia kruta roko, la sinistra ruino de la Drachenfels-turego najbaras kun la ridanta urbeto Godesberg mole kuŝanta meze de verdaj foliaroj kaj multkoloraj floroj.

Tiun Rejnvalon mi ankaŭ almonte veturis trifoje surŝipe de Kolonjo al Majenco : unuan fojon kun Ivona, ŝia patro kaj mia patrino, kiam ni estis gefianĉoj ; duan fojon kun miaj gepatroj ; trian kun karavano da skandinavo, nederlandanoj, britoj kaj nordgermanoj veturantaj al la universala kongreso en Nurenbergo. Pri tiu ĉi tago mi rakontis en "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo".

La duan fojon mi estis ankoraŭ en oficira uniformo. Sur la ferdeko, grupo da studentoj, evidente sin turnantaj al mi, kantis satirajn kanzonojn mokantajn al francoj. Mi ŝajnis, ke mi ne komprenas.

Ĝis la momento, en kiu, ŝanĝante sian repertuaron, ili ekkantis "Gaudeamus igitur"\*. Kunigante mian voĉon kun iliaj, mi daŭrigis : "Juvenes dum sumus", ktp. Ili mire rigardis min. Kiam la kanto estis finita, unu el ili demandis franclingve : - Ĉu vi estas studento ? Mi respondis germane : - Jes, sed Realist (t.e. lerninto de Realschule, lernejo pri tekniko, inĝenier-arto). Tiam ni interŝanĝis tostojn honore al "Realistan" kaj al "Humanisten". La glacio inter ni estis disrompita : la inter-nacian mal-amikecon venkis la supernacia studenta frateco.

---

\* La latina Kanto de Studentoj (esperantigita de Zamenhof, Fundamenta Krestomatio). Ekĝoju ni do, dum ni junaj estas...

Krom tiu Rejnlinio, mi bone konis ankaŭ tiun, kiu laŭiras la riveron Nahe tra Kreuznach, Bad-Münster-am-Stein, Kirn, Birkenfeld en direkto al Saarbruko, monta linio. Iun tagon mi tie troviĝis kun kamarado Longeon, gadzarto de Cluny, tiam ano de la Majenca maŝinistaro. Vice manipulante la ŝovelilon kaj la regulilon, ni alvenis en Idar-Oberstein, kie ni havis, mi ne scias kial, plurhoran restadon. Promenante sur monto, ni eniris en farmodometon ; tie brava kampulo regalas nin per tre bongusta de li mem fabrikita ĉerizbrando.

Iun vesperon, escepte, mi kondukis ordinaran\* trajnon sur flanka linio de Majenco al la malgranda stacio Alzey, kie ni estis tranoktontaj. En gastejo fronte al la stacidomo priservis nin tre bela juna brunulino kun verdaj okuloj - ĉu servistino, ĉu filino de la mastro ? Demetinte la manĝilaron, ŝi sidiĝis ĉe piano kaj komencis frapi kelkajn akordojn. Mi alproksimiĝis, foliumis ŝian muzik-albumon, kaj elektis kelkajn lidojn, kiujn mi petis, ke ŝi kantu. Ŝi tuj konsentis, kaj kompleze kantis, sin akompanante. Ŝia voĉo estis ĝusta, eble ne tiel bela kiel tiu de Ivona, sed agrabla.

Poste ni ambaŭ longe interparolis. Miaj du kumuloj diskrete fortiriĝis...

Ili ege ekmiris, kiam ili vidis min iri al ili en la dormejo. Ke ilia juna kompano ne restis por pasigi la nokton kun la bela knabino, tio videble superis ilian komprenon.

Sed unue, nenio permesis supozi, ke ŝi estus preta akcepti min en sia lito. Mi povis almenaŭ provi mian ŝancon ? Jes, sendube. Eble mi estis laca post mia labor-tago ?... Sed kial serĉi falsajn senkulpigojn ? La vero estas, ke mi estis fidela juna edzo.

Neniam mi reiris al Alzey. Neniam mi revidis tiun junulinon.

Vintro venis, tiu drasta vintro 1923-24. Ni aŭdis pasi sub niaj fenestroj, kun iliaj sonoriletoj, la sledojn de

\* omnibusan (PIV) : trajno, kiu haltas en ĉiuj stacioj.

kampananoj malsupren veturantaj de Hunsrück-montaro.

Vespere, kiam mi estis libera, ni rekuniĝis kun la kolegoj de la kantino. Trenante niajn luĝojn, ni supreniris la du-kilometran vojdekklivon en lunlumo, ĉe temperaturoj de  $-15$  ĝis  $-20^{\circ}\text{C}$ . Poste ni malsupren glitis sur la ŝoseo tegita de glaciĝinta neĝo, kun freneza rapido, en risko fali en la profundan flankfosajon, aŭ frakasi al ni la kapon per frapego al la pontparapeto ĉe la malsupra fino de la deklivo. Ni plurfoje rekomencadis tiun ekscitan ekzercon ĝis la 1a aŭ 2a matene.

La rapida fluo de Rejno portis dikegajn glaciblokojn, kiuj ĝenis la navigadon; sed Nahe, malpli impeta, estis frostinta ĝis la kunfluejo en sia tuta larĝo, kaj en tia diko, ke peze ŝarĝitaj ĉaroj ĝin traveturis. Memorante pri miaj rulsketadoj\*, mi provis tie miajn unuajn paŝojn kun glitsuoj: ne estas pli malfacile (temas kompreneble pri simpla glitado, ne pri la elegantaj arabeskoj de virtuozaĵ glitdancistoj).

Venis la fino de mia staĝo, kronota per ekzameno.

Mi ne timis la parolan provon. Mi ja funde pristudis la anatomion de vapormaŝinoj, aparte de lokomotivoj, la funkciadon de ties diversaj organoj, ilian prizorgadon, la senpaneigojn: interalie, en okazo de fandiĝinta garnajo de kuplostanga kusineto, kiel malkupli kaj paralizati unu flankon por fini la veturadon per la alia sola\*\*. Ĉio tio estis por mi sensekreta: mi senmanke respondis al ĉiuj demandoj de la juĝantaro konsistanta el du maŝinejestroj kaj unu ĉefmaŝinisto.

Restis la praktika provado. Ĝi okazis meze de neĝo-ŝtormo. Vara, pasaĝeraj trajnoj, ordinara kaj rapida. Ĉe la lasta la ĉefmaŝinisto ordonis al la du skipanoj sidiĝi sur siaj seĝoj, kaj diris al mi:

- Nun ci prizorgos kune la fajron kaj la kondukadon.

Bone. Sed post duonhoru la neĝo, pli kaj pli dense falanta, formis kvazaŭ opakan tremantan kurtenon, tra

\* Vd. "...el la kara infaneco".

\*\* Vaporlokomotivo konsistas fakte el du maŝinoj ambaŭflanke de komuna kaldrono.

kiu la signaliloj apenaŭ videteblis. La afero fariĝis danĝera. Tiam li diris :

- Nun redonu la ŝovelilon al la hejtisto, kaj okupiĝu nur pri la kondukado.

Ni estis kun germana skipo, kiun mi ne konis. De tempo al tempo, la lokomotiv-führer\*, komprenante pri kio temas, donis al mi konsilojn en germana lingvo.

Ĉe la ekstarto de stacio, la pelradoj ekglitis sur la glacitegitaj reloj. Inversigi la vaporfluan, unu metron retroiri, sabli la relojn, milde restarti : ĉio estis tiel rapide farita, ke mia konsilanto ne havis tempon malfermi la buŝon. Tiam, skuante la kapon, li diris al mi :

- Ho! vi estas jam maljuna !...

Neniam iu komplimento tiel fierigis min kiel tiu spontanea omaĝo de spertulo al mia juna sperteco.

Alveninte ĉe la fino de la vojaĝo, la ĉefo ekprenis el sia poŝo presitan karton : "La unuaklasa hejtisto Laval estas rajtigita stiri lokomotivojn sur la linioj anstataŭ lokomotivestroj". Tio estis la kutima formulo : principe oni devis trapasi tiun stadion de "rajtigita hejtisto" antaŭ ol ricevi oficiale la titolon "kondukisto", sed, per sia fontoplumo, li forstrekis "anstataŭ", kaj skribis : "kiel lokomotivestro". Li subskribis, premis mian manon, kaj donis al mi la karton.

Mi estis oficiale promociita al la indo de lokomotiv-kondukisto, armita kavaliro. Mia revo estis realiginta. Al mi kiel mastro estis atribuota propra maŝino...

Ho ve !...

La morgaŭon mi estis vokita al la direkcio en Majenco. Tio estis por aŭdi, ke mi estas nomumita teknika sekretario de la inĝeniero regiona estro de la ruliĝanta materialo\*\*. Forvaporiĝis mia revo pri aktiva laboro : mi fariĝis burokrato !

\* kondukisto, lokomotivestro.

\*\* trak-veturilaro (Fervoja Leksikono).

## 3. Burokrato.

"Gardu vin : estas X!". S-ro de Montigny kaj la kolegoj.

La perdita ŝafkruro.

Franc-germanaj, konversacioj.

Dramo en hotelo.

La Kurhaus. La oficira rondo.

Familia gastejeto.

Kanotado sur Rejno.

Esperantistoj en Wiesbaden.

Inĝeniero André, regiona trakci-estro, informis min pri tiu decido trudita de la supera instanco ekster lia volo - ĉar li estus dezirinta konservi min en sia servo. Parolante pri mia nova ĉefo, li avertis min :  
- Gardu vin : li estas X\*. Estas gadzarto, kiu parolas al vi.

Efektive, S-ro Gilbert Heulard de Montigny estis eks-politeknikano, tre distingita, tre malstreĉita kaj iomete flegma, frapante kontrasta kun la senlace laborema gadzarto André, kiu ne povis toleri lin.

Tamen, kontraŭ mi li montriĝis tre afabla, tuj faciligante min. Li vidis min per favora okulo, kaj li havigis al mi flatajn kaj monprovizajn promociojn.

Ofte mi diskutis kun li tre obstine, ĉar mi estis dediĉinta sufiĉan tempon por funde pristudi iun demandon, kiun li nur de alte superflugis.

- Sed, lignokapa gadzarto !... li diris.

Poste, rapide kompreninte, ke mi tamen estas prava, li konkludis :

- Bone. Faru do kiel vi volas, mi lasas al vi liberan decidon.

Baldaŭ li subkomisiis al mi sian subskribon por multaj negravaj demandoj.

Foĵe, forirante por dusemajna ferio, li instalas min en sia kabineto kun sia telefono kaj sia sekretariino-tajp-istino, juna petolema Tuluzanino.

\* X : ekslernanto de Politekniko.

Du tagojn poste, lia adjunkto pri la vagonoj, kiu estimis min, sed eble estis iom spilita de tiu prefero (kaŭzita sendube nur pro tio, ke en la opinio de la ĉefo mia lokomotiva fako estis pli grava ol la lia) forloĝigis min por refarbigi kaj renovigi la kabineton. Mi senproteste reprenis mian lokon en la komuna sekretarioja ĉambro ; mi nur konektigis mian personan telefonilon kun la cirkvito de la ĉefo.

Mi estis helpata de juna Bordozano, kiu bombaste sin diris mia adjunkto. Li estis inteligenta, vigla knabo kun vivkolora, ofte rabeza parolo. Se iu uzis maldecan esprimon, li, ludante pri la franca vorto "poli", kiu signifas "glata, polurita" kaj ankaŭ "ĝentila", rimarkigis :

- Ci estas ĝentila kiel urso penis !

Pri fuŝa laboraĵo li diris :

- Ĝi estas farita kiel ŝankro !

Mia steno-daktilografisto estis juna Strasburgano, Roger Salardenne, kiu lerte verkis satirajn kanzonojn pri nia ĉiutaga vivo. Li estis vere tre sprita. Kelkajn jarojn poste mi legis de li naturistan romanon-reporteraĵon. Totalnudisto, estas li, kiu inventis por la naturistoj kun bankalsoneto la moknomon "palaj gluteoj" (fesses pâles, analoge al faces pâles, palaj vizaĝoj, nomo donita de nordamerikaj indianoj al la blankhaŭtuloj). Li estis dum kelkaj jaroj kutima kunverkanto de la Katenita Anaso, en kiu li subskribis siajn artikolojn "fakiro Denn Salar".

Ni havis kiel buro-ĉefon sendanĝeran maniulon, kiu ĉiutemene enskribigis ĉiun en kajereton. Mi rifuzis submetiĝi al tiu ceremonio - cetere mi ĉiam alvenis ĝustatempe. Li ne insistis ; sed, ĉar li nepre volis montri sian kajereton al S-ro de Montigny (tute indiferenta pri tio), mi konstatis, ke li kutimiĝis enskribi mian nomon anstataŭ mi.

Komence mi veturadis ir-reire inter Bingerbrück kaj Majenco, lasante Ivonan sola dum la tuta tago, sed ofte ŝi venis al mi.

Foje, atendante viziton de miaj gepatroj, kiujn ŝi volis aparte regali, ŝi aĉetis kaj pagis belan ŝaffemuraĵon en viandvendejo de la malnova kvartalo en Majenco. Ŝi foriris por aliaj aĉetoj, lasante sian korbon en la vendejo. Kiam ŝi volis reveni por repreni ĝin, erarvaginte en la labirinto de la stratetoj de la malnova urbo, tiel komplikita kiel tiu de la suk'oj en la Medina de Tunizo, estis al ŝi neeble trovi sian viandbutikon. Ŝi devis rezigni : la pagita ŝaffemuraĵo kun la korbo restis ĉe la vendisto, kiu verŝajne neniom komprenis.

En la matena aŭ la vespera trajno, mi troviĝis kelkfoje kun Saarlandanino venanta de Kreuznach, kie ŝi loĝis, kaj laboranta en la Régia ĉefdirekcio kiel tradukistino. Ŝi estis tiel hejme en la franca lingvo, kiun ŝi parolis tre pure, sen ia fremda tono, kiel en la germana, ŝia nacia lingvo. Tiun ĉi lingvon mi praktikis sufiĉe flue por havigi iluzion almenaŭ al ne-germanoj. Pro amuzo kaj ekzercado mi parolis germane kun la Saarlandanino, kiu kompleze korektis miajn erarojn.

Iun vesperon ni troviĝis en sama kupeo kun kapitano kaj leŭtenanto. Ili estis tro ĝentilaj por rekte admoni nin, sed ili laŭte rimarkis inter si, ke "tiuj boŝoj" (germanaĉoj) perdis ĉian deteniĝemon, kaj nun eniras senĝene en la kupeojn rezervitajn por oficiroj. Venas kontrolisto. Ni montras al li niajn legitimkartojn de agentoj egalrajtaj kiel oficiroj, kaj interŝanĝas kun li kelkajn vortojn. Poste, sekvante nian impeton, ni daŭrigas inter ni la konversacion en bona franca lingvo. La du galonuloj ŝajnis sufiĉe konfuzitaj.

Ne trovinte loĝejon en Majenco, ni estis instalitaj en Wiesbaden, distanca je 18 km, en la luksa hotelo Grüner Wald, sur vasta placo de tiu bela banurbo. De sur nia balkono estis videbla la ĉiutaga ceremonio de la gardantara ŝanĝo ĉe la ĉefstabo loĝanta en la imperiestra palaco. Ĝi estis granda spektaklo kun la spahi-oj, la tipa muziko de la nordafrikaĵo tiraljoroj kaj tiu, nervostreĉa, de la anamanoj elvolvanta la volvaĵojn de sia granda bunta paperdrako. En la horo de la gardoŝanĝo la placo malpleniĝis je ĉiuj germanaj civiluloj, krom kelkaj buboj, ĉiam

frandemaj pri militistaj paradoj, kiuj sin forŝtelis el la atento de siaj gepatroj.

En tiu "Grüner Wald" ni travivis dramon tempon. Eĉ tiaklasaj hoteloj tiam ne havis apartamentojn kun banĉambro. Estis nur unu ĉe ĉiu etaĝo, tre bela, kun bankavo, en kiun oni malsupreniris per marmora ŝtuparo. Tie mia edzino, graveda, prenis banon eble tro varman. Ŝi estis trafita de nerezistebla vomemo. Baldaŭ ŝi reĵetis ĉiun nutraĵon, ĉu solidan ĉu likvan.

Necesis nutri ŝin per supozitorioj, kaj tamen ŝi daŭre maldikiĝis. La germana kuracisto diris: "Tio estas ofte tre malagraba, kaj iafoje oni devas interrompi la gravedecon. Por tion decidi, necesus konsento de du francaj kuracistoj."

Tiam Ivonan ekkaptis malespera krizo. Post plorego ŝi vigle reagis en neantaŭvidebla maniero: Ŝi petis, ke mi portu al ŝi skatolon da sardinoj en oleo kaj botelon da ĉampano. Kaj la tuto kvazaŭ mirakle englutiĝis! Ŝi rekomencis manĝi. Feliĉigita de la retrovita espero pri naskota ido, ŝi baldaŭ reakiris forton kaj normalan pezon, povis leviĝi kaj eliri.

Ĉar ŝi havis nenion por fari, ŝi pasigis ĉiutage plurajn horojn en la Kurhaus-parko. Estis bela printempa vetero. Bona orkestro ludis en ĝardeno kiosko. Vespere, en salonego kun bona akustiko, ni ĉeestis kelkajn simfoniajn koncertojn. Tiujare la bonega orkestro de la banstacio estis metita sub la alta aŭtoritato de la granda Otto Klemperer. Mi jam konis lin: la antaŭan jaron, en la Kolonja operdomo, mi estis tie kun mia patro, kiam li direktis majstran interpretadon de la Oka kaj Naŭa Simfonioj de Betoveno.

En Wiesbaden Klemperer ne aperis antaŭ la publiko. Li konfidis la direktan bastoneton al junaj ĉefoj de granda talento. Unu el ili donis iun vesperon brilegan Naŭan\*. Ni alvenis ĵus antaŭ la ŝlosa de la pordoj, en la lasta sekundo. La orkestrestro, kun la bastoneto jam levita, atendis ĝis ni estis eksidintaj, por ĝin mallevi ĉe la

\* La Naŭa Simfonio kun Ĥoro de Betoveno.



unuaj akordoj. Ni estis konfuzitaj, sed sekvis por ni neforgesebla vespero.

Ni prenadis niajn manĝojn ĉe la Oficira Klubo. Nia tablo de gadzartoj estis kiel makuleto inter la brilaj uniformoj, la elegantaj tualetoj, la ceremoniaj kliniĝoj, la mankisoj. Ankaŭ Ivona estis elegante vestita, sed ŝi senafekte sidiĝis inter la kamaradoj, kiuj familiare ŝin salutis "Sinjorino Oskar" (Oskar estis mia kromnomo en la lernejo). Tie estis Bertrand, Oberli, Gilles, Brot, Ambert la fantoma promociano : enskribite en la Aiksa lernejo, li pasigis sian trijaran lernadon en Cluny, kaj nur poste en Wiesbaden ni ekkonis lin. Ankaŭ de Cluny, Dépalle, turmentata amanto de du tre belaj ĝemelinaj, tiel perfekte similaj, ke li ne povis decidi pri unu aŭ alia. Kaj la milda Lanard el Angers-lernejo, la eterne mistraktata, kiu estis tie iom fraŭde, ĉar li, pro nekomprenebla motivo, ricevis nur legitimkarton de sub-agento, kiu lin egalrajtigis nur al sub-oficiroj. Ivona suferis ankoraŭ kelkajn ekvomojn, kiuj venis ne-atendite. Estis sufiĉe ĝene, kiam ŝi devis haste forlasi la tablön por kuri al la tualetejo, iafoje meze de dancantaj paröj. Dank'al Roberto, ni trovis en Majenco familian manĝotablön.

S-ino Monestier, edzino de modesta fervojisto el Avejrono, rondigadis siajn monatfinajn enspezojn servante al kelkaj gastoj bonan familian manĝon. Ivona venis ĉiumatene per trajno, kaj ni retroviĝis tagmeze en la simpatia etoso de la Monestier-apartamento, kun Roberto kaj pluraj nekonatoj, kun kiuj ni baldaŭ agrable rilatiĝis.

Vespere ni iris kelkafoje ĉe amiko Bladier. Ivona sidiĝis ĉe la piano kaj kantis ; aŭ Renato kaj mi ekzerciĝis je mandolinaj ducpoj. Li estis pli kapabla ol mi pri solfeĝo, havis ĝustan oreksentön, kaj facile deĉifris presitajn muzikpecojn.

Ricevinte la kondukistan diplomon proksimume samtempe kiel mi, li estis tuj enoficiita en la direkcia organizo por la provizado. Li do ne forlasis Majencon, kaj konservis sian loĝejon ĉe Fraŭ Gunder, afabla vidvino samaĝa

kiel Frau Blahs. En posttagmezoj iafoje ŝin vizitis Ivona. Ŝi konversaciis kun ŝi en franc-germana ĵargono, iom dormis sur ŝia sofo, aŭ pianludis.

Ofte Renato veturis al Düsseldorf, sia antaŭa garnizono, por pasigi semajnofinon. Kiam li loĝis tie kaj mi en Euskirchen kiel armeanoj, mi foje vizitis lin en tiu bela urbo, kaj mi konis tion, aŭ pli ĝuste tiun, kiu lin tie logis.

Iun dimanĉon li tamen restis en Majenco. Ni kune suriris kanoton sur Rejno, li kaj mi ĉe la remiloj, Ivona malantaŭe, lasanta siajn fingrojn tuŝeti la akvosurfacon. Estis bela printempa vetero, la aero estis malvarmeta, la mevoj flirtante preskaŭ tuŝis nin per la ekstremaĵoj de siaj flugiloj. Ĉio iris glate ĝis la mezo de la riverego. Tie, nia muksoŝelo ekdancis sur la ondoj levitaj per la spuro de remorkantaj motorŝipoj. Mia fragila edzineto estis ekkaptita de subita timo. Ni devis viglege remi por rekonduki ŝin al la bordo, palan, tremantan, dentklakantan, je la limo de konvulsio. Mi devas konfesi, ke ne estis tre prudente tiel iri per boateto sur Rejno kun graveda virino.

En Wiesbaden loĝis Lili Montfajon, filino de pastoro en Pont-de-Montvert, proksime de Florako. Ŝi estis sekretariino ĉe la Alta Interalianca Komisiono, la civila okupacia organizo. Ŝia onklo, kolonelo Atger, ankaŭ Lozerano, estis garnizonestro. Iun vesperon li akceptis nin en sia luksega vilao, en vasta salono - vintra ĝardeno. La okupanta armeo prince loĝigis siajn altgradajn oficirojn.

Ni asidue vizitadis la kunvenojn de la esperantista klubo. Mi pli detale parolis en "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" pri tiu grupo kaj ties sekretario-animanto Kurt Schönrich. Schönrich mortis en 1979 en la aĝo de 92 jaroj, droninte en rivero. Iuj pensis pri ebla sinmortigo, sed tiuj, kiuj lin bone konis, ne povas kredi pri tiu ebleco. Ĝis siaj lastaj vivotagoj, li estis konservinta sian aktivecon, sian entuziasmon kaj sian sindonemon al la esperanta afero.

La tempo pasis, kaj la buroa laboro pli kaj pli pezis al mi. Tiom pli, ke S-ro de Montigny, reirinte al sia franca reto, estis anstataŭita de patro Tap, maljuna pensiita gadzarto, kiu tie reaktiviĝis. Viro de granda kompetento, sed iomete ripetema. Ĉiuvespere, ĝuste en la momento, kiam mi devis foriri al mia trajno, li venis en la oficejon kaj faris al mi longajn paroladojn, ĉiam samajn kaj seninteresajn - almenaŭ por mi : li kritikadis la administradon kaj la financon mastrumadon de la Regio, dum mi interesiĝis nur pri teknikaj demandoj. Mi aŭskultis kun la atento kaj la pacienco dece ŝuldataj al tiel respektinda veterano. Feliĉe la trajnoj al Wiesbaden sin sekvas je mallongaj intertempoj. Mordante mian buŝbremson, mi atendis la venontan.

Mi multobligadis klopodojn por ricevi aktivan respondecan postenon en iu laborejo por grandaj riparadoj. Fine la ĉefinĝeniero, S-ro Reure, alia politeknikano, kiu ŝatis min, nomumis min sub-laborejestro, respondeca pri la lokomotiv-muntejo en la riparejoj de Ludwigshafen.

Kun ĝojo mi retrovis miajn karajn lokomotivojn, kiujn mi ja ne tute pretervidis, sed kiujn mi, dum kelkaj monatoj, prizorgis de tro malproksime laŭ mia gusto.

#### 4. En grandripara laborejo.

La blutola vesto kaj la prestiĝo de ĉefo.

La germanoj revenas.

La transrejnaj kolegoj.

La Ruĝa Bloko.

Fino de la Regio.

Epilogo.

La unuan tagon en mia nova funkcio, mi komence surmetis mian bluan tolverston de hejtisto, zorge lavitan kaj gladitan por tiu cirkonstanco. Sed mia adjunkto, veterano el Montluçon, diris al mi, ke tiel mi kompromitas mian prestiĝon de ĉefo ; precipe de la germana personaro (kiu estis jam sufiĉe multa), kutimigita al hierarkiaj signoj videblaj en la vestaro. Eĉ sur siaj maŝinoj la lokomotivestroj portis kolumon kun kravato, kaj gantojn. Ili lasis al la hejtistoj la zorgon pri la lubrikado, dum la francaj neprevolis plenumi tiun malpurigan taskon per propraj manoj.

Sekve de longa traktado, interkonsento estis atingita inter Regio kaj Reichsbahn por la iompostioma reenoficigo de la germanaj fervojistoj. Jam estis revenintaj ĉiuj simplaj laboristoj, kaj unu post alia la submastroj reprenis siajn postenojn. Konsciencaj kaj kompetentaj, laboristoj kaj submastroj bone plenumis siajn taskojn. La nia pli kaj pli limiĝis al superreviziado.

Tiun materialon, kium ili estis lasintaj al ni pli-malpli sabotita, kaj kiun monatoj da improvizado estis difektintaj, ni redonis al ili en bona stato, zorge prizorgita. Ili nur bezonis reekpreni kaj daŭrigi sian rutinan laboradon kiel antaŭe.

Iun tagon, kun alzata kamarado, gadzarto el Châlons, mi fraŭde vizitis en neokupata teritorio la grandajn riparejojn de Frankfurto-ĉe-Majno. La germanaj kolegoj afable akceptis nin. Kun sento de fiereco ni aŭdis ilin deklari: "Ĝustas hontige por ni vidi ĉion, kion vi efektivigis en tiel mallonga tempo, per tiel malfortaj rimedoj." Ĉe ili, ĉiu laborejo simila al la mia havis ĉekape direktoron superestratan por la tuto de ĝenerala "Oberdirektor", ĉiuj helpataj de adjunktaj inĝenieroj. Ĉiuj tiuj kadroj estis alte diplomitaj homoj kaj spertuloj - ne junaj freŝbakitoj el lernejoj kiel ni. Ni tamen estis kunlaborintaj laŭ niaj ebloj al tiu restarigado, kaj la rezulto estis efektive rimarkinda.

Por ekzemplo, dum mia teknika sekretarieco, mi reviziigis kaj refunkciigis ĉiujn pes-instalaĵojn\* sur la trakoj de la Majenca teritorio. La trakservo, kiu eĉ pli ol ni estis trovinta sabotitajn materialojn, ĉie refunkciigis la signalaron, la trakforkojn, la bloksistemon. La trafikservo estis plene reorganizinta la trajno-cirkuladon; ĉiuj vagonaroj estis plene okupitaj kaj alvenis akurate laŭ la hortabelo. Malproksima estis la tempo de la incidentoj kaj malfruigoj kutimaj ĉe mia debuto. Ni povis transdoni la instrukciojn al niaj germanaj kolegoj, ni redonis al ili ilian vojreton en vere perfekta funkciŝtato. Dum mi laboris ĉe la direkto, ni eĉ anstataŭigis en la lokomotivaj kaldronoj la ŝtalajn tuboladojn, surogatojn el la

\* Pontoforma pesmaŝino (Fervoja Leksikono).

milita tempo, per belaj tute novaj platoj el ruĝa kupro.

Je mia alveno en Bingerbrück mi estis trovinta en mur-ŝranko de la oficejo libron "Also sprach Zarathustra"\* markitan per la nomo de ĝia posedanto, iu von Io, vic-maŝinejestro. Mi prenis la libron, promesante al mi, ke iam mi redonos ĝin al ĝia proprulo. Tion mi faris, kiam mi eksciis pri lia reveno. Li varme dankis min, dirante, ke li taksas tiun libron altvalora, kaj ke li kredis ĝin senespere perdita.

Ekster la laborhoroj, miaj unuaj semajnoj en Ludvigs-hafeno estis malĝojaj. La farto de mia edzino min plu maltrankviligis, kvankam ĝi plifirmiĝis dum progresis ŝia gravedeco. Sola en malgaja hotelĉambro, mi sopiris al loĝejo, kiu nin rekunigos.

Feliĉe tiu industria urbo, feŭdo de la Badische-Anilin-und-Soda-Fabrik (kerno de la estonta kemia giganto I.G.Farbenindustrie), kiel Essen estis la feŭdo de Krupp, oferis pli da loĝrimedoj ol Majenco aŭ Wiesbaden. Baldaŭ mi ricevis apartamenton sur la tria etaĝo\*\* de la Ruĝa Bloko, granda konstruaĵo el brikoj, de modesta aspekto, sed komforta kaj agrabla. Ĉe rando de la urbo, for de la uzinoj starantaj ĉe la bordo de Rejno, de niaj fenestroj ni ĝuis vastan vidaĵon super la kamparo, okcidente, kun belegaj sunsubiroj. Ni rekomencis kiel en Bingerbrück nian ekzistadon de instalita geedza paro.

Najbare estis kvartalo en libera aero kun lerneja grupo : juninfanaj klasoj en apartaj dometoj dissemitaj sur verda etendaĵo el razeno kaj arboj.

Kelkfoje, trairante la urbon kaj la riveregon, ni iris promene al la bela moderna urbo Mannheim, en neokupata teritorio : Ludwigshefen ja ne havis "pontokapon" sur la dekstra Rejno-bordo kiel Majenco, Koblenco, Bonno, Kolonjo, Duseldorf. Ni transiris la riveron sub la rigardo de indiferenta gardostaranto, kaj ni troviĝis fraŭde en malpermesita teritorio ; riskante, se tie nin kaptus la

\* Tiel parolis Zaratustro, de Niĉeo.

\*\* kvara etaĝo laŭ la germana kalkulo.

germana polico, esti kelkajn tagojn tenataj en observado, antaŭ reheimigo tra Nederlando. Sed tio okazis neniam, aŭ tiel malofte...

La reveno de la germanaj kadroj akceliĝis. Oni vidis veni la tagon de la likvidado de la franca-belga Regio. Ĝi estis proksimume koincidonta kun la tempolimo por Ivona. Ŝi estis projektinta akuŝi en Majenco, kie la franca hospitalo havis akuŝan sekcion ; sed ni estis en danĝero, ke ni devu forvojaĝi en la plej kriza momento. Ŝajnis al ni pli prudente, ke ŝi antaŭe veturu por akuŝi en Florako. Tiel nia filo Franko, koncipita en Rejnlando, naskiĝis Lozerano.

Necesis komenci serĉadon pri situacio. En tiu jarŝanĝo 1924-25, ne estis facile. Mi adresis dungopeton, interalie, al fervoja trakcia servo, nome ĉe la Orlean-reta kompanio, laŭ konsilo de gadzarto ĉefinĝeniero en tiu kompanio, kiun mi vizitis en lia kabineto en Parizo.

Mi ricevis nomumon kiel staĝanto en la maŝinejo de Turo-St Pierre-des-Corps. 700 f-a monatsalajro. Mi perlaboris 1800 ĉe la Regio, ne enkalkulante diversajn senpagajn avantaĝojn : loĝejo, hejtado, aĉetado de senimpostaj varoj ĉe la militista kooperativo. Mi estus tamen akceptinta tiun magran salajron - cetere egalan al tiu, kiu estis al mi proponita kiel instruanto en la teknika liceo de Fourmies en Nordo, aŭ kiel debutanta inĝeniero en la kemia uzino de Péchiney en Salindres apud Aleso. Post preskaŭ du jaroj da vivo larĝa sed iomete eksternorma kaj fantazia, de kiu ni entute bone profitis, ni devis konsenti pri travivado de periodo de malgrasaj bovinoj.

Sed aliaj kondiĉoj mallogis min. Necesis rekomenci je nulo : ses monatojn en la riparejo, gratadante kusinetojn ; poste, almenaŭ ses pliajn monatojn ĉe ŝovelilo kaj fumkesto, antaŭ ol repreni en manoj la kondukadon de lokomotivo. Post du jaroj, la tempo pasigita ĉe la Regio estus al mi kalkulota kiel faktoro por promocio. Sed mi taksis tiujn kondiĉojn humiligaj, dum mi havas en poŝo mian kondukistan diplomon akiritan konforme al la normoj de la francaj fervojon kaj validitan de kvalifikitaj reprezentantoj de la francaj retkompanioj. Post nelonga hezito mi rifuzis.

Tiel, pro troa memestimo kaj stulta fiereco, mi fermis al mi karieron tute antaŭsignitan. Mi rifuzis ankaŭ la instruistan profesion, same sekuran, kaj la proponon de la granda kemia industrio. Momente restis al mi neniu alia perspektivo. Mi decideme dediĉis min al aventuroj.

Mi rezignis por ĉiam mian belan metion. Pri ĝi mi kunportadis senfinan nostalgion.

Adiaŭ, miaj karaj lokomotivoj !

\* \*  
\*

## II. Pariza Foiro

1. Debuto en la ĉefurbo.  
 Sonorilbutonoj.  
 Bonvena koverto.  
 Kvindekfranka bankbileto.
  2. Sizifa laboro.  
 La fabrikestra sindikato.  
 La fuŝa mapo.
  3. Longeon kaj la hazardo.  
 Ĉinia fervojo kaj pariza kinoindustrio.
  4. Georgo Vidal.  
 Rememoroj pri Aikso.  
 Le Libertaire. La morto de Philippe Daudet.  
 Le Grenier de Gringoire. Helena. Le Lapin agile.  
 Cecilia. "Macho" en Kosta-Riko.  
 Literaturo.
1. Jen do mi 25-jara kun edzino kaj infano - kaj senlabora.  
 Mi decidis esplori la parizan labormerkaton.

Ĉe kiom da pordoj mi premis sonorilbutonon ! En kiom da vastaj kabinetoj mi enpaŝis timide sur la piedfingroj, kun ĉapelo en la mano, kiel almozetanto ! Sur kiom da fotel-randoj mi apenaŭ metis duonon el miaj sidvangoj, fronte al imponaj sinjoroj tronantaj malantaŭ luksaj skribotabloj ! Ĉiuj akceptis min ĝentile, eĉ afable - sed neniu dungis min.

Fine mi vizitis amikon de mia patro, S-ron Martel, aŭskultanton, direktoron de la Foiro de Parizo. Tiu eminenta persono havis multajn rilatojn en la industriestra medio. Li diris :  
 - Mi ne konas nuntempe iun vakan postenon, kiu povus konveni al vi, sed mi mem povas proponi al vi provizoran laboron ĉe la Foiro. Se vi ĝin akceptos, vi okupiĝos pri la fako de agrikulturaj maŝinoj, kaj ricevos mil frankojn kiel monatan



salajron. Tio daŭros tri monatojn ĝis la malfermo de la foiro en majo.

Alloga afero ! Mil frankoj estis ja bona pago por debutanta inĝeniero, kaj precipe la perspektivo pri senpera rilatiĝo kun mastroj de agromaŝinaj fabrikoj, kiuj ĉiuj situas en provincoj, naskis en mia imago plaĉan esperon : labori por paca industrio, kaj vivi sur kamparo. Mi entuziasme akceptis.

En la daŭro de tiuj tri monatoj okazis miaj preskaŭ unuaj renkontoj kun parizaj esperantistoj, interalie kun S-ro Baudet, tiama vicprezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro. Pri ĉio ĉi mi detale raportis en "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo".

Komencinte la 20an de februaro, mi estis vokita je la monatfino en la kabineton de S-ro Martel. Li donis al mi fermitan koverton. Ĝin malferminte, mi trovis kvincent frankojn, egalvaloron de duonmonata salajro. Mi reiris al li :

- Sed, sinjoro, mi laboris apenaŭ unu semajnon...
- Akceptu tion kiel bonvenan ateston.

Mia tasko konsistis el tio : oni donis al mi mapon de la nova areo okupota de la agromaŝina fako, kun la tuta dosiero de la mendoj de la koncernaj firmoj : mi devis plani la dispartigon inter ili de la disponebla surfaco.

Mi komencis. Kelkajn tagojn poste okazis eta incidento, pri kiu mi raportos. En la ĉambro, en kiu mi laboris sola, eniris sinjoro, unu el la ekspoziciotaj firmomastroj.

- Cent frankoj por vi, kvindek tuj, se vi havigos al mi favoran lokon.

Cent frankoj, dekonon de mia monata enspezo, tio ne estis neglektinda. Mi rifuzis, kaj, por ne spiti lin per kruda elmontro de ofendita virto, mi aldonis :

- Cetere, mi ne povus garantii al vi favoran lokon : mi ne estas decidanto, nur proponanto.
- Nu do, proponu bone !

Li ŝovis en mian manon kvindekfrankan bankbileton, kaj rapidege forŝteliĝis. Mi devis kuri laŭlonge de la koridoro por atingi lin kaj redoni al li la monon. Lia mieno esprimis sinceran miron - kaj tiu miro mem mirkonsternis

min : ĉu do tiom da homoj estas korupteblaj ?

2. Baldaŭ mi finis projekton, kaj prezentis ĝin al la direktoro. S-ro Martel ekzamenis ĝin, kaj min gratulis.  
- Tre bone, li diris... Sed estas kelkaj etaj detaloj, kiujn vi devos ŝanĝi : vi ja ne povas koni la ekspozici-ontojn. Tiuj du estas konkurencantoj, kiuj ne povas reciproke sin toleri : ni ne metu ilin apud-apude. Male, tiuj ĉi du tre bone interrilatas : ili estos ravitaj troviĝi flank-ĉe-flanke... Jen unu fidela kliento, kiun ni favoru per aparte bona loko...

Ktp, ktp. Mia "tre bona projekto estis tute disbatita.

Mi do rekomencis. Kelkajn tagojn poste, la direktoro anoncis al mi baldaŭnan viziton : la estraro de la sindikato de agromaŝinaj fabrikestroj venos esplori mian projekton.

- Mi estas preta.

Ili trarigardis mian rebakitan projekton, kaj konkludis:

- Perfekte ! Certe tiuj sinjoroj estos kontentaj.

Venis la sindikata estraro. Efektive, tiuj gravaj sinjoroj komencis per varmaj laŭdoj. Ili taksis mian planon senripoĉa... sed mi fariĝis nefidema. Prave : ĉar jen komenciĝis la kritikoj :

- Bonege !...sed... La firmo Albaret, kiu prezentas altajn maŝinojn, devas okupi lokon malantaŭ aliaj... Tiu jena... ktp.

Duafoje mia "bonega" verko kuŝis popece sur la tereno kiel rubamaso.

Triafoje mi atakis la Sizifan taskon.

Fininte, mi devis paŝi al pli teknika laboro : desegni la akvokondukilojn kaj la elektran reton, difini la akvokvantojn kaj la elektran potencon laŭ la bezonoj de la diversaj ekspoziciantaj firmoj, diskuti kun la koncernaj urbaj administracioj. Sed antaŭe, mi volis vidi sur la tereno la nivelan konsiston de la ekspozicia areo, ĉar mi sciis, ke ĝi ne estas tute ebena. Mi do iris kun helpanto kaj topografaj instrumentoj al la Versajla Pordego.

Tie min atendis surprizo : la dokumento, sur kiu dekomence mi laboris, estis falsa ! Mi devis korekte redesegni

la konturon de la areo, antaŭ ol surmeti sur ĝin la nivelkurbojn - kaj poste, kompreneble, ankoraŭfoje retuŝi mian projekton.

Du tagojn antaŭ la malfermo de la Foiro, ĉio estis reordigita kaj finpreta. Ĉiuj standoj staris bonorde, ĉiuj estis normale provizitaj per akvo kaj kurento, ĉiuj maŝinoj glate funkciis, ĉiuj prezentantoj ŝajnis kontentaj. Ankaŭ la direktoro.

3. Tiam, en la hotelĉambro, kie mi provizore loĝis, vizitis min mia kamarado Longeon. Li anoncis :

- Mi iras al Ĉinio.
- Por kion fari ?
- Mi ricevis proponon pri alta posteno en la fervoja kompanio de Orienta Ĉinio. Kompreneble mi akceptis.
- Kompreneble ! Ci bonŝanculo !
- Kaj mi pensis pri ci por anstataŭi min en mia nuna ofico ĉe Pathé-Cinéma en Joinville. Interesa laboro. Mil cent frankojn monate. Se ci konsentas, mi prezentos cin morgaŭ. Certe ci estos akceptata.

La morgaŭon mi estis dungita. Kondiĉe nur, ke mi enoficiĝu tre baldaŭ. Mia tasko ĉe la Foiro estis praktike finita. Por ne ĝeni min, la afabla S-ro Martel akceptis mian tujan ekŝiĝon.

Tiel la hazardo forflugigis mian revon pri agrikulturo kaj kamparo : mi laboros en pariza antaŭurbo, pri kinto-tekniko.

4. Mi estis sola en Parizo. Mia edzino kun nia ĵusnaskita bebo restis en Florako ĉe siaj gepatroj aŭ en Aleso ĉe la miaj.

Mi retrovis mian amikon Georgo Vidal, ekkonita en Aikso, kiam mi estis dudekjara kaj li dekkvinjara liceano. Tiam ni estis membroj de la "Respublikana Junularo", en kiu kunigis studentoj de diversaj maldekstraj tendencoj : de progresemaj "radikalistoj" ĝis socialistoj revolucianaj (oni dirus nun "goŝistoj") kaj liberecanoj. Iam la juna filo de nia instruisto pri franca lingvo, S-ro André Hesse, proponis ŝanĝi la nomon de nia grupo al "Socialista Junularo". Vidal respondis mildavoĉe :

- Mi proponas : Anarkista Junularo.

La afero restis sensekva.

Georgo estis delikata junulo kun anĝela vizaĝo enkadrigita de blondaj haroj, kiujn li portis longaj - kio tiam ne estis laŭmoda. Tial ke li dismetis anarkistajn flugfoliojn en leterkatoloj, li estis eksigita el la Aiksa liceo ; li iris al la alpa urbeto Briançon, kie li farigis abituriento.

Sukcesinte en konkurso por ŝipkomisaro, li faris staĝon en la pariza sidejo de la Ĝenerala Transatlantika Kompanio. Li rakontis al mi :

- Por tiu konkurso mi estis rekomendita de la senatano-urbestro de Marsejlo. Dum mia staĝo mi havis okazon esplori la dosierojn de la aliaj (nesukcesintaj) kunkonkursintoj. En ĉiu mi trovis tute saman rekomendleteron de la sama senatano-urbestro : tiel la ŝanc-egaleco estis konservita.

Kiam ni retroviĝis en 1925, li estis 20-jara administranto de la anarkista gazeto Le Libertaire. Li ricevis ian famon en la pariza gazetaro okaze de proceso pri la mistera morto de Filipino Daudet, filo de la fama monarkista pamfletisto Léon Daudet. Tiu tre juna filo aliĝis al la liberecanaj ideoj, kaj sin mortigis. Laŭ iuj tamen, temas ne pri sinmortigo, sed ja pri murdo. La patro akuzis la policon, kaj suspektis iujn anarkistojn pri komplikeco. Vidal, vokite kiel atestanto, rifuzis ĵuri antaŭ la tribunalo. Li deklaris :

- Mi diros kion mi volos, ĉu veron, ĉu malveron.

En Le Journal, la fama ĵurnalisto Geo London, en sia tribunal-kroniko, priskribis lin kiel enigman, maltrankviligan personon. Kelkajn tagojn poste, ili renkontiĝis en iu koktel-kunveno. London diris al Vidal :

- Se mi estus jam koninta vin, mi ne estus verkinta tiun malfavoran "paperon".

- Ne grave, respondis Georgo. Kaj ili amikiĝis.

Iam, pro iu artikolo aperinta en Le Libertaire, li estis kondamnita al kvarmonata mallibereco. Tiun tempon li pasigis kiel politika malliberulo en la prizono "La Santé".

Li diris :

- Neniam mi ĝuis tiel grandan liberecon : mi disponis mian tutan tempon por legi, verki kaj diskuti kun vizitantoj.

Mi iris al li ĉe la sidejo de la gazeto, kaj ni ren-  
devis por la sama vespero en la kabareto "Le grenier  
de Gringoire", en Montmartre, kie kunvenis la anarkistaj  
poetoj. Li venis kun sia tiama kunvivantino, la poetino  
Helena Hardant, fratino de la talenta juna poeto Georges  
Bannerot, frue mortigita en la milito. Helena estis al-  
loga knabino kun bela korpo kaj agraba vizago, kiu  
sperte diris versojn per profunda emocia voĉo. Georgo  
prezentis ŝin al mi, ni triope interbabilis, kaj baldaŭ  
li lasis nin ambaŭ solaj, irante al sia nokta laboro  
(li estis preskorektisto).

Helena kaj mi iris fini la vesperon en la fama kaba-  
reto "Lapin Agile". De tiu tago, preskaŭ ĉiuvespere ni  
same retroviĝis. Iam ŝi diris al mi :

- Ni iru ĉe Fredy (la kabaretestro de Lapin Agile). Mi  
deklamos poemojn de mia frato.

Sed tie troviĝis bruema aro da festantaj turistoj.  
Ŝi diris :

- Mi ne deklamos. La etoso ne estas simpatia.

Ŝi traktis kun granda respekto la verkojn de la amata  
frato.

Kelkan tempon poste mi loĝis kun mia edzino en  
Champigny-ĉe-Marno. Georgo vizitis nin. Li estis sola.

Mi demandis :

- Kial Helena ne venis ?
- Ŝi edziniĝis kun hungara profesoro, kaj ni ne plu  
vidas nin.

Poste li revenis kun nova kunulino, Cecilia. Ni reci-  
prokis la viziton en Juvisy; kie ili luprenis grandan  
vilaon kune kun Andreo Colomer, alia anarkisto, kaj ties  
kunvivantino.

Iam li revenis al ni sola, kaj diris :

- Cecilia komencis tedi min. Mi foriras al Kosta-Riko.

Li kun kelkaj geamikoj tie fondis liberecanan komun-

umon. Ili vivis for de la civilizacio, tre proksime de la naturo. En tiu lando tute ne ekzistas armeo, kaj la polico sin manifestas nur per disdonado de kinino kaj de serumo kontraŭ serpenta veneno. La indianaj indiĝenoj nomis "machos" (maskloj) tiujn blankhaŭtajn enmigrantojn, kiuj venis por dividi ilian primitivan ekzistadon, faligante arbojn kaj plantante bananujojn.

Sed baldaŭ la machos ne rezistis al la forlogo de tiuj hardaj vivkondiĉoj. Unuj post aliaj foriris, komence la edziĝintaj. Fine Vidal restis sola, adaptita al la lando kaj al ties loĝantaro. Li vivis kvazaŭ edzece kun juna indianino, kiu naskis al li idon.

Post du jaroj, tamen, li sentis la mankon de la pariza etoso ; iun nokton li forŝteliĝis, lasante la etan Socorro'n kaj la ideton. Sen konsciencripoĉo, ĉar en tiu popolo la infanoj estas adoptataj kaj vartataj de la tuta tribo, kaj ili kreskas senprobleme. Georgo revenis kun libro "Mia edzino kaj mia arbaro", en kiu li rakontis sian kostarikan sperton.

Antaŭ sia foriro li estis publikiginta kelkajn poemojn eseojn, biografiojn (pri J.H.Fabre la entomologo, pri Han Riner), historian libreton pri sia naskiĝa vilaĝego Six-Fours en Provenco. Poste li verkis kelkajn detektivromanojn, kaj fine li specialiĝis pri libroj por infanoj.

Mi longe parolis pri Georgo Vidal. Oni povos riproĉi, ke tio estas erarvago ekster la temo elektita por tiu ĉi libreto. Prave. Sed mi ne povis preterlasi okazon por omaĝi al tiu bonega amiko, mortinta antaŭ kelkaj jaroj.

Cetere, tio ne estas la unua, kaj ne estos la lasta parentezo en tiu ĉi rakonto pri mia trametia migrado : ĉar la vivo etendiĝas vaste ekster la profesia aktiveco.

\* \*  
\*

### III. Serve al la Sepa Arto.

1. Debuto en kinotekniko.  
Ĉefoj, kolegoj, kunlaborantoj.  
La veteranoj.  
En la najbara studio.  
La sonfilma revolucio.

La uzino, aŭ "laboratorio", agrable situas ĉe la beleta bordo de Marno, apud famaj naĝejoj kaj plongejoj. Ĉe la enirejo etendiĝas gazono kaj bedoj kun belaj floroj. Sur la vasta malantaŭa areo diŝe staras grandaj konstruaĵoj : laborejoj plejparte mallumaj pro la manipulado de ankoraŭ ne rivelitaj filmoj. Tie oni pritrakas la bendojn registritajn en la najbara studio. Oni rivelas la negativojn, kopias ilin, rivelas la pozitivajn kaj la negativajn kopiojn de kopioj ("kontraŭtipojn"), elektas la scenopartojn, muntas, ktp. La plimulto el tiuj taskoj estas farata de virinoj en ĉambregoj lumigataj nur per tre malintensa ruĝa aŭ verda lumo.

Tie funkcias multaj diversaj maŝinoj, kiuj bezonas konstantan prizorgadon. Elia bontenado estas la tasko de la mekanika fako, kies vicestro mi fariĝis. Poste, ĉar necesis ankaŭ krei novajn aparatojn kaj maŝinojn, mi estis nomumita estro de la t.n. studburoo, t.e. la teknika fako. En ĝi laboris kun mi kvin junaj inĝenieroj kaj pluraj desegnistoj ; dume mi konservis superrigardon super la mekanika laborejo, kaj super la prizorgado de la konstruaĵoj (riparado, novaj instalaĵoj) : masonistoj, plumbistoj, lignaĵistoj, elektristoj, kc.

Unu el miaj samaĝaj kolegoj estris la kemian fakon, du aliaj la fabrikadon de normalformataj resp. etformataj

filmoj. Nin ĉiujn supermastris la uzindirektoro, tre kompetenta viro, helpata de vicdirektoro, sperta kemiisto. Krome la teknika direktoro de la tuta firmo, kiu posedis ankaŭ uzinon en Vincennes : fabrikon de la filmobazo kun emulsio (la "virgaj" filmoj). Kun ĉiuj, kolegoj kaj superuloj, mi havis glatajn, eĉ agrablajn rilatojn.

Ankaŭ kun la subuloj : gelaboristoj, teknikistoj, submastroj. Inter tiuj ĉi estis pluraj veteranoj, laborantaj en tiu uzino de post la "heroa tempo" de ĝia fondiĝo far la patriarko Charles Pathé (mi iom konis lin kiel ankoraŭ aktivan supermastron). Ĉiufoje, kiam mi proponis iun novaĵon, tiuj spertuloj respondis :

- Tio estis jam provita antaŭ dudek jaroj - sensukcese.

Mi tamen obstinis, kaj ĝenerale realigis la aferon. Tiam ili preskaŭ rigardis min kiel magiiston. Mi deklaris al ili :

- Ke al mi prosperis tio, kion vi estis vane provintaj siatempe, estas simpla konsekvenco de la progresoj realigitaj en la daŭro de jaroj dank'al via inteligenta laboro : vi mem kreadis la kondiĉojn por tiu sukceso.

Tio estis ne flato, sed sincera opinio, ĉar ĝi estis ja vero.

Je la tagmanĝa horo, sur la larĝa Verdun-avenuo, mi ofte renkontiĝis kun filmaktoroj el la studio : figurantoj en historiaj vestoj, similaj al indianoj pro la okrakolora ŝminkobazo ; foje ankaŭ pli-malpli famaj ĉefroluloj, steloj : Raimu, Charpin, Gaby Morlay, Louise Brooks, Marie Glory, Fernandel, Joséphine Baker, Charles Vanel (kiu dum monatoj loĝis en ŝipo ankrita ĉe la Marno-bordo), ktp.

Kiam, malofte, la necesoj de mia laboro venigis min al la studio, mi vidis ilin ludantaj sur la scenejoj. Mi memoras pri sceno kun iu stelo, kiu ludis rolon de junulino. Ĉar la sinjorino (mi ne diros ŝian nomon) estis iom pli ol maturaĝa, la foto en unua plano prezentis riskon pri katasstrofo. Tial, en la minuto ĵus antaŭ la filmado, ŝia ŝminkistino venis por lasta retuŝo. Mirinda rezulto : kiam poste mi spektis la finitan filmon, sur la ekrano ridetis glata vizaĝo de juna virgulino.



Alian fojon, la bela Gina Manès kun mirindaj verdaj okuloj staris apud kaĝo, en kiu ŝia rolo devigis ŝin eniri kun granda Bengala tigro. Ŝi intense rigardis la imponan felison, kaj ŝajnis fascinata. Aŭ ĉu eble ŝi mem fascinis ĝin? Kelkajn jarojn poste (sendube sekve de tiu epizoda rolo), ŝi fariĝis efektive dresistino en cirko. Kaj iun tagon, ŝi estis gravege vundita de furioza leono, kiu skrapegis ŝian belan vizagon.

Iam mi ĉeestis la filmadon de amasa sceno gvidata de Abel Gance. Multopa figurantaro evoluis laŭ liaj precizaj indikoj. Mi admiris, kun kia pacienco kaj kia ĝentileco la majstro, famega reĝisoro, parolis al tiu sennoma kolektivo.

En 1927 okazis revolucio en la usona kinoindustrio. Elektroteknikistoj, reprenante malnovan inventon de senfama franca inĝeniero, kreis la sonfilmon. La movbildoj, kiuj per gestoj kaj mimikoj tiel bone esprimis ideojn kaj sentojn, kaj atingis en tiu esprimado neegaleblan supron per la genio de Karlo Chaplin, subite fariĝis bruantaj, parolantaj, babilantaj. Devis pasi longa tempo antaŭ ol la Sepa Arto, tiel masakrita, retrovos vere artan vojon.

Vane la ĉefaj kinoartistoj provis rezisti al tiu novaĵo, kiu ekskuegis la fundamenton mem de ilia arto: senespera ariergarda batalo. La potenca elektra industrio trudis sian diktaton, kun komplikeco de la grandaj filmoproduktistoj Warner fratoj, kiuj nur per tiu aŭdaca paŝo evitis minacantan bankroton. Vole-nevole, ĉiu mastro de kinoteatro devis investi grandajn monsumojn por instali multekostajn aparatojn kaj tegi siajn murojn kaj plafonojn per sonobtuzigaj materialoj. Baldaŭ ĉiuj kinejoj en la mondo estis ekipitaj por sonfilmoj.

Iun matenon vokis min la direktoro, S-ro Mayer. Apud li, en lia vasta kabineto, sidis korpulenta sinjoro, kiu flue parolis france kun mikso el tipe amerika naztono kaj ne malpli tipa judgermana prononco. S-ro Mayer diris: - Jen S-ro Salomon portis al ni kontraŭtipon de la unua france parolanta filmo realigita en Usono: La Kanzono de Parizo, kun Maŭrico Chevalier kiel ĉefrolulo. Kiom

da tempo vi bezonos por pretigi projekcieblan kopion ?

Rapida mensa kalkulo.

- Nu, necesos du tagoj por la transformado de kopimaŝino. Certe al mia amiko Aucher (la kemiisto) sufiĉos tiu tempo por prepari taŭgan rivelilon. La trian tagon okupos la kopiado, la rivelado, la muntado. La definitiva kopio devus esti preta je tiu tempolimo. Hodiaŭ estas lundo. Ni diru : vendredon matene por la kontrolo projekcio.
- Bone. Prenu la skatolon, kaj diligentu. S-ro Salomon, ni rendevuu vendredon matene je la dek-unua. Ĉar ni ankoraŭ ne havas ĉi tie sonfilman projekciilon, ni iros ĉe Nathan, strato Francoeur en Montmartre, kiu ĵus instalis tian aparaton.

Vendredon matene ĉio estis preta. En la aŭto de S-ro Mayer, de li stirata, mute sidis Aucher kaj mi, portantaj subbrake la kopion en skatoloj. En la projekci-ĉambrego jam nin atendis S-ro Salomon. Post transdono de la filmo al la projekciisto, ni eksidis en silento, ni kvar solaj. Kun batanta koro ni rigardis la titolon kaj la prezentan tekston, en muzik-akompano. Subite sur la ekrano aperis la konata figuro de Maŭrico, lia familiara rideta vizaĝo, tre usonmode movanta la makzelojn. Li proksimiĝis per balanca marŝo, ni aŭdis ĉiun lian paŝon sur la pargeto. Haltinte, li demetis sian faman pajlan ĉapelon, prenis el sia buŝo maĉgumon, ĵetis ĝin internen de la ĉapelo ; ĝi tie frapis kun seka brueto, klak! kaj: - Haha ! bonan tagon, gesinjoroj. Mi estas kontenta vidi vin, hojujujuj !

Li daŭrigis sian monologon, poste li kantis "Valentine". La voĉo sonis nete, klare, oni rekonis la faman pariz-buban prononcon fidele reproduktatan. Aucher kaj mi nin sentis senpezigitaj. Sin turnante al ni, S-ro Salomon deklaris la rezulton plene kontentiga, "tiel bona kiel en Ameriko". Ni kvazaŭ gajnis batalon : jen aperis la unua parolfilmo prilaborita en kontinenta Eŭropo (antaŭis la britinsulaj kolegoj).

Tiam komenciĝis granda laboro : transformi ĉiujn kopi- maŝinojn, adapti sonlegilojn al ĉiuj kontrol-projekciiloj,

krei specialajn muntotablojn por aŭtomate certigi la sinkronigadon de bildoj kaj sonoj, inventi dispoziciojn por korekti kelkajn detalajn difektojn, pri kiuj ni ne dronu en teknikaj precizaĵoj. Por la aktualajaj filmoj ni disponis kvaroblajn kopimaŝinojn ; mi modifis ilin tiamaniere, ke ili kopiu la bildojn kontinue kiel la sonbendon : tio ebligis duobligon de ilia rapideco, sekve plimultigon de la aktualaj-eldono en la merkreda-ĵaŭda nokto de ĉiu semajno. Al tiu duobligita rapido ne bone respondis la tro inerciaj lumŝanĝiloj, kiuj variigas la lumintenson por ĝin adapti al la diversdensaj negativ-partoj. Mi kreis novajn pliperfektigitajn. Paralele al la sonfilma revolucio, la daŭra evoluado de la kinoarto igis min ellabori trukmaŝinojn, ktp. Tiuj aferoj okupis min dum pluraj jaroj.

## 2. Batalado kontraŭ teknikaj malfacilaĵoj.

Intertempe prezentiĝis kelkaj problemoj, kiujn mi alfrontis pli-malpli sukcese.

Unu el ili estis "scintilado", kiu aperis subite sur la pozitivaj filmoj. Ĝia deveno ne estis nova, sed ĝin rivelis la pli granda kaj pli fajna impresiĝemo de la novaj emulsioj.

Mi suspektis sinsekve plurajn eblajn kaŭzojn, sed tiuj suspektoj evidentiĝis eraraj. Fine mi konstatis, pere de simpla stroboskopo, ke la rapido de la kopimaŝinoj havas periodan variadon ; la periodo koincidis kun la paso sur pulio de metala agrafilo kuniganta la du ekstremaĵojn de ledrimeno. Mi do anstataŭigis tiujn rimenojn per aliaj senagrafaj, de trapeza transversa sekcio, kaj la difekto tuj ĉesis.

En tiuj bataloj, ne ĉiam mi venkis. Iam aperis nova epidemio. Sur la rivelitaj pozitiv-filmoj desegniĝis kiel superimpresajo nigraj fulmobildoj. La kaŭzo estis facile diagnozebla : elektrostatakaj malŝarĝoj ; sed kiu estis la kaŭzo de la kaŭzo ?

Mi cerbumis, imagis sinsekve multajn hipotezojn, elpensis kaj provis multajn rimedojn, per kies detala priskribo mi ne volas tedi vin. Preskaŭ ĉiufoje, la difekto ŝajne malaperis, kaj mi povis kredi, ke mi solvis la

tiklan demandon. Kelkajn tagojn poste, kvazaŭ por spitmoki min, reaperis la fulmobildoj.

Fine, iun tagon, ili tute malaperis, kaj mi ne povis scii, kial ili estis venintaj, kiel ili foriĝis. Ili ne kuŝis latente en la virgaj filmoj : se mi pasigis tiajn filmojn en rivelbanoj, neniam vidiĝis fulmobildoj. Do, ja en iu angulo de nia uzino sin kuŝis tiu malica koboldo, kiun mi vane provis persekutadi.

Dum kelka tempo mi vivis en konstanta timo, ke ĝi ree manifestos sian ĉeston, sed tio ne okazis. La epidemio estis definitive foriĝinta, kaj mi devis konfesi mian plenan nescion pri ĝia kaŭzo. Plej akra fiasko en mia profesia vivo !

### 3. Intermezoj en Parizo.

Nungesser kaj Coli.

La triumfo de Lindbergh.

La Societo de Fotografio kaj la Filomatika Asocio.

La fidela trampo-lernanto.

Ĉar la mekanika fako de la uzino ne povis sufiĉi por ĉiuj necesaj laboroj, mi serĉis kaj trovis helpon ĉe tiuj ege kapablaj parizaj metiistoj, kiuj laboras en nekredible arkaikaj kondiĉoj, en primitivaj budoj aŭ keeloj, precipe en la 11a arondismento. Tial mi ofte veturis per tramo aŭ taksio al la proksima ĉefurbo.

Iun posttagmezon mi troviĝis sur la Grandaj Bulvaroj. Multegaj homoj amasiĝis ĉirkaŭ gazetvendistoj kiantaj kaj ĝestantaj, kun freŝe presitaj folioj grandlitere proklamantaj : "ILI SUKCESIS !". Ili, tio estis la du francaj aviadistoj Nungesser kaj Coli, kiuj aŭdacis la frenezan vetprovon por unua transflugo de Eŭropo al Ameriko.

Ili forveturis de Normandia strando en la frua mateno de la antaŭa tago. Post longa silento ekvenis la novaĵo :  
- La Blanka Birdo estas vidita fluganta super Novtero.

Kaj nun la krie disvastigata gazeto anoncis :

- En nepriskribebla entuziasmo de la usona popolo, Nungesser kaj Coli feliĉe almariĝis sur la akvebeno de la Nov-Jorka haveno.

Nepriskribebla estis ankaŭ la entuziasmo de la pariza popolamaso. Tian mi neniam spektis de post la milita venko

en novembro 1918.

Tamen, la serioza ĵurnalo Le Matin, sur sia ruĝa fasado ornamita per francaj kaj usonaj flagoj, daŭre afiŝis :

- Ni ankoraŭ ne ricevis konfirmon pri novaĵoj koncerne la transoceanan flugon de la du heroaj aviadistoj.

Histerie furioza, la ŝovinista amaso minacis frakasi la fenestrovitrojn de tiu defetista ĵurnalfirmo.

Bedaŭrinde, tiu ĉi estis prava : falsa estis la mirinda informo..La du heroaj flugistoj neniam atingis Amerikon. Neniam oni retrovis certajn spurojn pri ilia sublime freneza vetprovo.

Nelonge poste, en tiu sama jaro, la juna Lindbergh, la "fluganta frenezulo", sola dum trideko da horoj sur sia fragila maŝino, sukcesis la unuan transflugon de kontinento al kontinento super Atlantiko. Sur la Bourget-aerodromo, li ricevis deliran akcepton de la popolo. Sed tie mi ne estis.

Pri freŝadataj esploroj kaj efektiviĝoj en la tekniko mi faris prelegojn ĉe la Franca Societo de Fotografio. Tie mi renkontis kelkajn scienculojn kaj famajn pionirojn, kiel Gaumont, Continsouza, kaj la gloran patron de kinematografo, Louis Lumière.

La Filomatika Asocio organizis diverstemajn prelegojn kaj vesperajn kursojn en amfiteatro de la Lernejo pri Artoj-kaj-Metioj. Tie mi prezentis ĉiusemajne kurson pri kinotekniko. La centon da sidlokoj plenigis la aŭskultantaro. Ĝi konsistis precipe el gejunuloj scivolaj pri tiu tekniko kaj dezirantaj perfektigi en la metio. Kelkaj, tromplogitaj de la titolo de la kurso, imagis, ke per ĝi ili povos envojiĝi sur filmaktoran karieron ; tiuj ĉi venis unu fojon, kaj ni ne revidis ilin. Krome estis kelkaj personoj de diversaj aĝoj, kiuj kutime sekvas tiajn kursojn sen profitcela intereso.

Sed mi havis unu fidelan, plej asiduan "lernanton". Li estis simpatia trampo, ne maljuna, ne malpura, ne tro ĉifone vestita, ĉiam razita de antaŭ maksimume tri aŭ kvar tagoj.

Li alvenis akurate inter la unuaj. Li sidiĝis en

elektita loko, etendis sur la tableton puran blankan buŝtukon, zorge metis sur ĝin faldeblan tranĉilon, panon, salamon aŭ porkokapan pasteĉon kun litrobotelo da ruĝa vino, kaj komencis trankvile manĝi. Li maĉadis malrapide, de tempo al tempo trinkis gluton el la kolo de la botelo, kaj viŝis sian buŝon per mandorso. Fininte sian vespermanĝeton, li kun diskreta rukto refaldis sian tranĉilon kaj empoŝigis ĝin, reŝtopis la botelon, refaldis la buŝtukon. Poste, li kiel eble plej komforte sin aranĝis sur la lignoseĝo kaj ĉe la malmola dorsapogilo, kaj kviete endormiĝis. Feliĉe li ne ronkis, aŭ nur tiel delikate, ke la bruo tute ne ĝenis la kurson.

Kiam, post fino de la leciono, mi estis respondinta al demando de la aŭskultintoj, estis almenaŭ la 23a. La ĉeestantaro komencis eliri. Mia fidelulo malfermis la okulojn, etendis la brakojn, oscedis. Kun bedaŭra kaj resignacia mieno, li foriris inter la lastaj. Estis preskaŭ noktomeze. Kie li estis finonta sian nokton : ĉu en amasdormejo, ĉu sub iu Sejno-ponto ?

#### 4. Al Berlino ?

Venis du reprezentantoj de germana filindustria firmo. Mi estis komisiita por montri kaj klarigi al ili ĉiujn novaĵojn en la laboratoria tekniko. Min helpis mia ankoraŭ freŝa praktiko de ilia lingvo, ĉar ili malmulte komprenis el la franca.

Post tritaga restado, ili demandis al mi :

- Ĉu vi volas veni kun ni al Berlino kiel laboratoriestro?
- Principe jes, volonte. Dependus nur de la kondiĉoj.
- Pri tio ni certe interkonsentos. Sed vi komprenas, pro la bonaj rilatoj inter niaj du firmoj, ni devas antaŭe ricevi konsenton de via teknika direktoro. Hodiaŭ ni parolos al li.

Ili foriris, kaj mi ne aŭdis plu pri tiu propono. Evidente la direkcio ne konsentis.

Ĉu bedaŭrinde ? Kelkajn jarojn poste, en la hitlera Germanio, kiajn travivaĵojn mi estus alfrontinta ?

## 5. Batalado kontraŭ meteoĵ. Inundo. Frosto.

Ŝvelegis la rivero Marno. Tuta malalta parto de la uzino, ĉe la riverbordo, estis subakvigita. Por eviti halton en la fabrikado, ni devis translokigi la maŝinojn de la filmokopia kaj de la mekanika laborejoj, kaj haste konstrui ponteton inter la granda ponto super Marno kaj la supra etaĝo de unu el la plej altaj konstruaĵoj. Mi kun pluraj aliaj laboris 36 horojn sendorme, kaptante nur mallongajn tempojn por manĝetoj.

En malvarmega vintro la frosto paralizis la bargo-  
trafikon sur ĉiuj riveroj kaj kanaloj de la regiono. Ne  
venis plu karbo el la nordaj minejoj, kaj la fervoja  
transportado tute ne sufiĉis.

La uzino estis hejtata per vapor-radiatoroj, kaj uz-  
adis kontinuan elektrokurenton produktatan per vapor-  
energia generatoro. La vaporon liveris du grandaj kal-  
dronegoj, kiuj kutime glate funkciadis, karbon konsumante.  
Sen brulaĵo, la situacio fariĝis kriza.

Mi vokis al helpo mian hejtistan sperton. Mi ja sci-  
povis elturniĝi per pli-malpli malbona karbo, sed sen ia  
karbo, kiel fari? Mi provizis la hejtistojn per suroga-  
toj: ni bruligis lignon, kartonon, pajlon, akvumitan  
kunpremitan paperon.

Tiu streĉa batalado daŭris du semajnojn, ĝis fine ni  
ricevis iom da karbo. Feliĉe, ĉar miaj fontoj de malbon-  
kvalitaj brulmaterioj estis baldaŭ elĉerpataj.

## 6. Kampanjoj.

Sacco-Vanzetti. La mitingo en Vintra Cirko.  
Joseph Caillaux. Sébastien Faure kaj anarkismo.  
Manifestacio en Vincennes. Aŭdaca etburĝo.  
Insurekcia nokto.  
Ascaso, Durutti, Jover.  
Leretour, konscienc-obĵetantoj. Mi perdas miajn  
galonojn. Aŭtografo de Marŝalo Pétain.

Okazis longa kampanjo por la defendo de Sacco kaj  
Vanzetti, senkulpaĵ viktimoj de la kapitalista juĝistaro  
en Usono.

Mi, ofte kun mia edzino, ĉeestis multajn mitingojn, interalie unu grandiozan en la vastega Vintra Cirko. Parolis la usona advokato de la du italaj kondamnitaj, kaj pluraj reprezentantoj de diversaj organizoj de maldekstra tendenco. Nome de la anarkistoj parolis Chazoff. Prezidis Séverine, la fama militantino por ĉiuj grandanimaj aferoj. Kiam ŝi volis doni la parolvicon al Jouhaux, tiama ĉefsekretario de la Ĝenerala Laborista Konfederacio (CGT), ankoraŭ ne gvidata kiel nun de komunistoj, la komunistoj brue ekkriis :  
- Ne Jouhaux ! Ne Jouhaux !

Rezultis granda tumulto, ĉar ili estis multaj en la ĉeestantaro. Malgraŭ klopodoj de Séverine kaj de ĉiuj aliaj organizintoj kaj oratoroj, Jouhaux ne povis aŭdigi sian voĉon, kaj devis rezigni.

Alian fojon okazis mitingo en la Sindikata Domo ĉe strato "Grange-aux-Belles". Post Le Meillour kaj aliaj anarkistoj venis al la tribuno la eks-ĉefministro Joseph Caillaux. Li komencis sian paroladon per jenaj vortoj :  
- Certe iuj ekmiros, vidante min, riĉulon, grandan burĝon, en anarkista kunveno. Sed mi demandas : Kia homo mi estus, se mi ne estus tie ĉi ?

Ĉar li ne forgesis, ke dum kaj post la milito, li mem troviĝis en karceroj, akuzite pri interkonsento kun la malamika potenco, viktimo de la partia justico je servo al la registaro de Clemenceau. Kaj tiam la anarkistoj estis inter liaj plej fervoraj kaj aktivaj defendantoj.

Tio memorigis min pri vortoj de Sébastien Faure, kiujn mi iam aŭdis en la samaejo. Iu ĵurnalisto demandis lin pri moto, kiu resumus la anarkistan doktrinon. Li respondis unue per la devizo de la CGT (komence gviditan de anarko-sindikatoj) : "Bonstato kaj Libero". Poste per la frazo ekzerge metita apud la titolo de la gazeto Le Libertaire :

"La anarkistoj volas starigi socian medion, kiu certigu al ĉiu individuo la maksimumon da bonstato kaj da libero adekvata al ĉiu epoko".

Sed li rimarkis, ke pri tiel difinita celo kaj pri tiel svaga programo volonte konsentas ĉiuj politikaj partioj : nur pri la rimedoj ili diferencas inter si, kaj pri



preciza interpreto de la vortoj : adekvata al ĉiu epoko. Do, iom cerbuminte, li eldiris tute alian formulon. Anstataŭ idealan programon, li difinis konkretan regulon por konstanta praktika agado :

"Kun la subprematoj ; kontraŭ la subpremantoj ; ĉiam kaj ĉie."

Krom tiuj vesperaj mitingoj okazis ankaŭ grandegaj manifestacioj. La plej impona en Vincennes-arbaro.

Post la disiĝo mi troviĝis en grupo, kiun alparolis maljuna viro. Lia vesto kaj lia tuta aspekto signis lin kiel paceman etburĝon. Li diris :

- Mi aŭdis, ke ni estis kvincentmil... Mi estis tie...

El la tono, kiun li metis en tiuj vortoj, oni sentis, ke li miras kaj samtempe fieras pri sia propra nekutima aŭdaco.

Malgraŭ la mitingoj kaj manifestacioj en ĉiuj landoj, malgraŭ la peticioj, spite la petojn kaj la vokojn de multaj eminentuloj kaj registoj, inkluzive de la papo, jarojn longe la usona justico daŭrigis sian abomenan suspenson. Kaj fine...

Elirante je tagiĝo, mi renkontis du disvendantojn de Le Libertaire. La speciala eldono anoncis per grandegaj literoj : ILI MURDIS ILIN !

Sacco kaj Vanzetti mortis ekzekutite sur la elektra seĝo.

Dum la tago haste organiziĝis la plej granda manifestacio. Vespere la tuta pariza laboristaro eliris sur la stratojn. Ĝia ĉefa celo estis la ambasadorejo de Usono. Ŝirmate de escepte fortika armita polico, ĝi ne estis atingita. En multaj kvartaloj eksplodis vera insurekcio, kiu submergis la policajn taĉmentojn. En aliaj, male, la potenca polico venke okupis la terenon.

Unu el la difinitaj kunvenpunktoj estis la metrostacio Réaumur-Sébastopol. Kiam mi tie alvenis kun mia edzino, la pordaj kradoj de la stacio estis ŝlositaj. Veturinte ĝis la posta stacio en direkto al Orienta Stacidomo, ni revenis piede sur trotuaro de la Strasburga Bulvardo. Tie la manifestacio retrofluis pelate de nigra armeo. Ni vidis maljunulojn kaj virinojn sovaĝe batataj, ni

vidis junan soldaton malsupren ĵetata en la metrostacia ŝtuparo.

Ni paŝis trankvile. Renkonte al ni venis en rapida kurado, kiel nerezistebla tajdo, trupo da policianoj en uniformo gvidataj de civilvestita ĉefo. Per pugno, bastono aŭ ruligita pelerino, ili disdonis batojn dekstre kaj maldekstre. Mi ricevis de la ĉefo fortan frapon sur la nukon : la "kuniklomortiga bato", tiu sama, per kiu en 1921 la boksa mondĉampiono Dempsey nokaŭtis la francon Carpentier.

Kelkajn jarojn poste, kiam regis trans Pireneoj la generalo-diktatoro Primo de Rivera, la hispanaj instancoj postulis de Francio ekstradicion de tri rifuĝintaj anarkistoj el Katalunio. Mi ĉeestis multajn mitingojn por ilia defendo. Inter la kutimaj defendantoj en similaj aferoj, ofte parolis la grandtalenta advokato Henri Torrès, kies forta voĉo havis belegan tembron, kaj kies retoriko estis potence konvinka.

La kampanjo sukcesis, la trio ne estis ekstradiciita. Post falo de la Rivera-diktaturo, dum la efemera Dua Respubliko, ili reiris en Hispanion. En la unua tago de la civilmilito, Ascaso estis mortigita en stratbatalo en Barcelono. Durutti fariĝis milita ĉefo, kaj estis murdita en Madrido. Ĉu de la "kvina kolono" ? De komunistoj, akuzis la anarkistoj ; sed la komunistoj rebatis : de siaj anarkistaj kompanoj, kiuj ne pardonis lian kunligitecon kun la komunista partio por la komuna kontraŭfaŝista lukto. La afero restis mistera. Nur la tria, Jover, pluvivis. Dum la milito li organizis kaj funkciigis liberecanan komunumon en la pirenea urbeto Puigcerda. Post la fina venko de "Franco" li sukcesis eskapi, kaj denove trovis rifuĝejojn en Francio.

Aliloke\* mi rakontis pri la popolfrento en 1936, kaj aludis pri mitingoj kaj manifestacioj favore al la hispana popolo en batalado kontraŭ la frankismo.

En unu el tiuj mitingoj estis anoncita probable partopreno de *Durruti*, kaj tiu anonco venigis multajn simpatiantojn. *Durruti* tamen ne venis. Ĉeestis lia edzino, kiu

\* Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo.

klarigis : li estas tro okupata pri la milita afero.

Kelkan tempon poste, en Belleville-teatro, Sébastien Faure, okdekjara, parolis. Sen mikrofono, lia voĉo, tamen ne rimarkinde laŭta, estis nete aŭdebla en la tuta salonego. Li rakontis :

- Antaŭ du monatoj, en Madrido, adiaŭante al Durutti, mi diris : "Ni interkisu nin, ĉar eble estas nia lasta renkonto". Mi pensis pri mia propra morto, evidente baldaŭ - tute ne pri lia : li estis tiel sana, fortika kiel plenkreska kverko, nedetruebla forto de la naturo. Nun mi kadukulo estas inter vi, kaj Durruti ne plu vivas...

Lia voĉo rompiĝis en singulto.

En 1933, Gérard Leretour kaj kelkaj aliaj estis tenataj en karceroj kiel militrifuzantoj ("konscienc-obĵetantoj"). Por ilia defendo la semajna gazeto La Patrie Humaine organizis vastan kampanjon. Oni eldonis presitajn kartojn sendotajn persone al la ministro pri nacia defendo, tiam S-ro Daladier. La teksto denuncis la danĝeron pri "aerokemia milito", t.e. peraviadila venengas-bombardado. Mi manskribe aldonis jenan komenton : "Ĉu aerokemia ĉu alia, milito estas milito, kaj en sia principo mem ĝi estas kondamninda". Post mia subskribo mi almetis la mencion : rezerv-oficiro.

Baldaŭ poste mi estis vokita en kazernon de pariza fajrobrigado. Min akceptis tre afabla majoro. Li estis ŝarĝita pri raporto al enket-komisiono ekzamenonta mian aferon. Li klarigis, ke mi riskas perdi miajn galonojn, kaj aldonis :

- Temas pri nura disciplina sankcio, kiu havas nenion komunan kun malhonora degradado. Tamen estus domaĝe. Imagu : en okazo de milito, vi kiel simpla soldato troviĝus sub komando de stultaj brutoj, kiuj sciis nur ordoni al vi : Antaŭen ! kaj sendi vin al buĉejo.

Mi ĵuras, ke tiuj estis precize liaj vortoj, nekred-blaj el la buŝo de supera oficiro - sed fajrobrigadisto ne estas verë militisto. Li aldonis praktikan konsilon :  
- Sufiĉos al vi deklari, ke vi ne atribuis tian gravecon al via gesto, ke vi agis senpripense, pro momenta impulso. La komisiono indulgos, kaj vi konservos vian

gradon.

Mi dankis lin, sed mi ne volis malkonfesi mian kulpan konvinkon. Cetere mi ne nepre deziris resti oficiro.

Venis la tago de mia prezentiĝo antaŭ la komisiono. Ĝi konsistis el du superaj oficiroj de la aktiva armeo : unu kolonelo, profesoro en la Alta Militista Lernejo, prezidanto, kaj la fajrobrigada majoro, raportisto ; kaj tri rezerv-oficiroj, kapitanoj, videble zorge elektitaj, kiuj por la cirkonstanco surmetis siajn uniformojn. Mi sola estis civilvestita. La kolonelo prezidanto, ĝentile, eĉ milde, klarigis al mi la motivon de la enketo. Sekvis dialogo :

La prezidanto : - Kial vi, oficiro, faris tiun kontraŭmilitistan geston ?

Mi : - Sinjoroj, oficiro estas tamen homo kaj civitano. Mi lernis en la Deklaracio pri la rajtoj de homo kaj civitano, ke neniu devas esti persekutata pro siaj opinioj kondiĉe nur, ke la manifestado de tiuj opinioj ne perturbu la publikan ordon starigitan de la leĝo. Nu, mi ne vidas, en kio nome la sendo de poŝtkarto al ministro povus endanĝerigi tiun publikan ordon.

La prezidanto, videble impresita per la argumento :

- La komisiono juĝos pri tio.

Unu el la rezerv-oficiroj, afektanta sukeran mildon, sed severmiena kiel prokuroro :

- Sed ĉu vi opinias, ke tia sinteno estas en akordo kun la kvalito de oficiro ?

Mi, min turnante al la prezidanto :

- Estu al mi permesate ne respondi al tiu demando.

La komisiono retiriĝis, lasante min sola. Post kelkaj minutoj ĝi revenis. La prezidanto (li ne ŝajnis tre kontenta) anoncis al mi la verdikton :

- Per tri voĉoj kontraŭ du, la komisiono proponas vian eksigon.

Mi dankis, kaj, min turnante al la demandinta rezervisto - Nun, sinjoro, mi respondos al via demando : mi tute samopinias kiel vi. Mia konvinko, efektive, estas neakordigebla kun la oficira kvalito.

Poste la majoro, prenante min aparte, konfidence :

- Vi povas facile diveni, kiuj estas la tri, kiuj vin kondamnis, kaj kiuj du deziris, ke vi konservu vian gradon.

Mi estis jam kompreninta, ke tiuj ĉi du estis la kolonelo kaj li.

Mi konfesas, ke mi tre amuziĝis ĉe tiu komedieto.

Unu monaton poste, mi ricevis oficialan konfirmon pri mia eksigo. Intertempe la registaro estis ŝanĝita. La dokumento estis mane subskribita de la nova ministro, marŝalo Pétain, la laŭfama "venkinto de Verduno", la estonta "ĉefo de la franca ŝtato" kunlaboranta kun Hitler. Mi bedaŭras, ke mi ne konservis tiun paperon, ĉar nun la aŭtografo "Philippe Pétain" havus altan komercan valoron.

#### 7. La polusa ekspedicio de Nobile.

La tragika ekspedicio de generalo Nobile al Norda poluso per la direktebla balono Italia havigis al mi okazon por unuafoja efektivigo.

La postvivantoj de tiu tragedio revenis kun amatora malgrandformata filmo, altvalora dokumento. Oni deziris projekcii ĝin antaŭ la amasa publiko de kinoteatroj. Por tio necesis reprodukti ĝin sur normalformata bendo. Ni havis specialajn aparatojn por redukti normalajn filmojn al etformataj kopioj, sed ne inverse. Jam longe oni sciopovis pligrandigi unuopajn fotojn, sed, miascie, neniam oni pligrandigis kinobendojn. Por tiu celo mi rapide aranĝis specialan kopimaŝinon; en la tujposta semajno la filmo estis projekciata sur ĉiuj grandaj ekranoj en la kadro de la aktualajaj magazinoj.

Mi kredas, ke ne okazis simila efektivigo ĝis, multajn jarojn poste, la ekspedicio de Kon-Tiki, de kiu Thor Heyerdahl kaj liaj kompanoj revenis kun longa interesplena amatorfilmo.

#### 8. En Londono.

Revo pri Japanio.

Korp-ekzercoj.

Mi pasigis semajnon en Londono ĉe la filio "Pathé of France". Mi loĝis en hotelo apud Piccadilly Circus, kie mi manĝis per porigo, ovoj kun rostita lardo, toaŝtoj, marmelado kaj teo. Aliajn manĝojn mi prenis en Lyon's restoracio; tie mi gustumis diversajn tipe anglajn

kuirajojn : en ĉiuj landoj mi deziras kiel eble plej ekoni la lokajn kutimojn.

La juna direktoro kaj lia ĉarma edzino regalis min per pli klasika vespermanĝo en la franca restoracio "Trocadéro". Ili ankaŭ veturigis min promene al kampara gastejo en tiu mirinde verda regiono de Sud-Anglio.

Laborante en la direkcio, mi tuj simpatiis kun la ĉefkontisto, gaja londonano. Ofte li diris al mi :  
- Ĉu ni iru trinki Guinness ?

Li surmetis sian melonĉapelon, ni malsupreniris al fronte situanta "pub", kaj trinkis boteleton da malhela biero, kiun mi vere frandis.

Kiam mi estis en la "laboratorio", en ekstera kvartalo, observante la laboron kaj donante teknikajn konsilojn, mi ĉeestis la ĉiutagan ceremonion de la "five o'clock tea". Je la 17a, la laboro ekhaltis, kaj teo kun kukoj estis servata al la laboristinoj kaj al la tuta personaro. Mi ŝatas tiun anglan kutimon, kiu agrable interrompas la tagan laboradon, kaj oportune memorigas, ke la laboro ne konsistigas la tutan vivon.

Ne kredu tamen, ke en tiu lando, kies kuirarto, laŭ francaj palatoj, estas barbara kaj sengusta, min interesis nur manĝado kaj trinkado. Mi trovis tempon por viziti la ĉefajn vidindaĵojn de la monda urbego : ne nur la famajn monumentojn kaj la luksajn kvartalojn, sed ankaŭ la mizerajn, tiel aĉajn kiel en la priskriboj de Dickens. Mi vizitis ankaŭ British Museum : la riĉajn belartajn galeriojn kaj la same riĉan natursciencan parton, en kiu mi aparte admiris la klare didaktikan prezenton de la paleontologiaj kolektoj (mi ne forgesis mian amatan ĉevaleton).

Mia semajna restado en Londono okazis en novembro. Mi ofte aŭdis pri la nebula atmosfero, kiu kovras kaj plenigas tiun urbon. Fakte, ĉe la alveno, la flugmaŝino devis traflugi densan nebulon, kiu malfaciligis la alteriĝon ; sed dum la sekvantaj tagoj, la suno brilis konstante en bela blua ĉielo, kaj la temperaturo estis kvazaŭ printempa. Do eble mi ne ĝuis la veran londonan etoson, sed tiu vetero, eĉ se escepta, estis tre agrabla.

Jacques Pathé, nevo de la patriarko-supermastro Charles, estis direktoro de la amatorfilma fako "Pathé-Baby". Iam

li diris al mi :

- Via rivelmaŝino por niaj etformataj filmoj nun glate funkcias. Tuj ekkonstruu ses aliajn ekzemplerojn.
- Sed, sinjoro, vi scias : ĝi estas nur prototipo, kaj mi jam komencis konstrui novan pli perfektigitan modelon...
- Nu, vi daŭrigu, sed ni bezonas tuj ses pretajn maŝinojn por niaj filioj kaj eksterlandaj klientoj. Ni jam vendis unu al japana firmo. Tuj kiam ĝi estos preta, vi sendos ĝin al Japanio, kaj vi mem tien iros por ĝin ekfunkciigi kaj instrui la lokajn teknikistojn.

Jen estis por mi tre agrabla perspektivo. Sed, ho ve! kiel por Berlino, la teknika direktoro kontraŭmetis vetoon.

Li diris :

- Vi havas nun tro da gravaj projektoj en elvolva prilaborado, kiuj nepre necesigas vian personan ĉeeston ĉi tie. Do sendu al Japanio vian ĉefan kunlaboranton.

Tiel mia kolego kaj amiko Boulot anstataŭis min en tiu reva vojaĝo. Kam sia edzino kaj ilia juna filo, li veturis per la transsiberia fervojo, pasigis tri monatojn en la Lando de la Leviĝanta Suno, revenis tra Pacifiko, Ameriko, Atlantiko. Ili vizitis San Franciskon, Ĉikagon, Nov-Jorkon, la Kolorado-kanjonon, la Niagaro-falojn, kaj reportis ampleksan rikolton da belaj filmdokumentoj.

Mi ne foriĝis de la Marno-bordo.

Mi loĝis en Champigny ĉe la limo de Joinville, du kilometrojn for de la uzino kaj de la apudaj riverbanejoj.

Ĉiumatene antaŭ la laboro, mi kuris laŭlonge de la rivero, kaj, varmigite per la kurado, mi plonĝis kaj naĝis, en ĉiu sezono. Vintre mi estis ofte sola, aŭ preskaŭ sola.

Vespere post la laboro, po du fojoj ĉiusemajne, mi partoprenis en gimnastika ekzerco de la firma sportasocio sub gvidado de instruanto el la fama militista fizik-eduka lernejo de Joinville.

Poste, kiam mi loĝis en Parizo, en Belleville-kuartalo, mi ĉiumatene rondkuradis ĉirkaŭ la vasta parko Buttes-Chaumont. Ofte mi renkontis la faman boks-ĉampionon Marcel Thil, kiu same ekzerciĝis en kontraŭa direkto. Neniun alian : ankoraŭ ne furoris la modo pri "jogging".

Tiun guston pri korpa kulturo mi sukcesis komuniki al miaj gefiloj kaj genepoj, ankaŭ, pli modere, al mia edzino. Mi mem konservis ĝin. Ankoraŭ nun mi amas longe marŝi, supreniri montojn, kaj naĝi en la malvarmeta klara akvo de niaj Cevenaj riveroj.

## 9. La granda krizo.

En la jaroj 1934-35, la ekonomia krizo atingis en Eŭropo sian akmeon. Komerca marasmo, bankrotoj, senlabor-eco, mizero. Ĉe Pathé kiel en multaj aliaj firmoj oni reduktis la labortempon de la pohore salajrata personaro, kaj la kadroj ne ricevis la "dektrian monatpagon", kiu tamen estis akirita avantaĝo, sed ne oficiala (ĉar ankoraŭ ne ekzistis kolektivaj interkonsentoj).

La firma, ŝuldanta al bankistoj, pasis sub ilian superregadon, poste sub la fuŝan administradon de Nathan, aventuristo, kiu kondukis ĝin al bankrota situacio. La komerca tribunalo nomumis provizoran jur-administranton. Tiu ĉi decidis drastajn ŝparojn - kiel kutime, je kosto de la laboristoj. Ni protestis, provis lukti por defendi niajn salajrojn; sed tradicie la kadroj ne uzadis strikon, kaj ankaŭ la laboristoj, sub minaco de la vastiĝanta senlabor-eco, ne kuraĝis striki. La cirkonstancoj ankoraŭ ne estis maturaj: nenio antaŭvidigis la popolan eksplodon de 1936.

Antaŭ apliko de la decido malplialtigi la salajrojn mi kum miaj du kolegoj fabrikestroj, pro persona konflikto kun la nova direktoro de la uzino, estis eksigitaj. Sed mi jam sciis, ke alia perdo estas al mi malferrnita.

\* \*  
\*



#### IV. Trapaso en optiko.

##### 1. Ciferoj, ciferoj !

Mi povis dungiĝi ĉe konkurenca firmo, sed post dek jaroj pasigitaj en la kino-industrio mi sopiris al novaj horizontoj.

Mia juna kamarado Pierre Angénieux, kiu estis kelkan tempon laborinta kun mi, nun mastris malgrandan optikan uzinon en Parizo. Li diris al mi :

- Nia kamarado Vidal, mia ĉefa kunlaboranto, iras por dujara restado al Okcidenta Afriko. Mi promesis konservi lian postenon por li je lia reveno. Se ci volas, mi volonte dungos cin por anstataŭi lin dum tiu tempo.

Mi tuj konsentis : post du jaroj, ni vidos !

Angénieux estas inĝeniero de Artoj-kaj-Metioj kiel mi, kaj diplomito de la Optika Instituto. En tiu tempo li komencis prilabori tiujn fotografajn objektivojn kun granda diafragma-malfermo kaj variebla fokuslongo, per kiuj li mondscale famiĝos.

Tiam la ellaborado de objektivo estis longdaŭra afero. En antaŭprojekto oni elektis lensojn de diversaj formoj, el vitroj de difinita refrakt-indico. Per palpa provado oni kalkulis la kurbsurfacajn radiusojn de ĉiu lenso por atingi la deziratan rezulton kun kontentiga korekto de la aberacioj. Ĉar ne ekzistis komputeroj, tiu trigonometria kalkulado estis monatojn longedaŭra. Kiam ĝi estis finita, oni mendis vitroblokojn ĉe specialaj uzinoj. Kiam tiuj blokoj estis fanditaj, oni mezuris ilian realan refrakt-indicon. Neniam ĝi estis tute precize konforma al la mendo : necesis do korekti konsekvence la kalkulojn, t.e. tute refari ilin. Nur poste oni povis tajli kaj

poluri la lensojn, munti kaj provi la objektivajn. La tuta afero necesigis plenan jaron.

Angénieux estis komencinta kun helpo de juna kalkulisto, kiu uzis komputmaŝinon. Sed tiu ofte eraris. Li do decidis provi alian rimedon, nome man kalkuladon per logaritmoj. Li mem kaj mi kalkulis samtempe, paralele, por reciproka kontrolado. Tiel la afero iris glate, pli rapide kaj fidinde. Tagojn longe ni ambaŭ tabeligis ciferkolumojn ; en noktaj sonoj mi vidis dancantajn arojn da nombroj kaj ciferoj.

## 2. Optika Instituto.

Renkonto kun Costes.

Poste mia juna mastro-kolego komisiis al mi projekton kaj efektivigon de "aeroteodolito". Tio estis speciala aparato por mezuri de surtera fiksa pozicio la flugrapidon de aviadilo, sendepende de la vento, per fotado en pluraj sinsekvaj punktoj de la flugtrajektorio. Tio estis delikata tasko, por kiu mi kelkafoje bezonis uzi la mezurrimedojn de la Optika Instituto, ĉe Pasteur-bulvardo. Tio havigis al mi okazajn renkontiĝi kaj interparoli kun ties direktoro, la fama scienculo Charles Fabry, kun profesoroj Chrétien, Arnulf kaj Roux kaj iliaj gekunlaborantoj, ĉiuj tre afablaj.

Kiam la aparato estis finmuntita, mi eksperimentis ĝin sur la aerodromo de Villacoublay. Iam mi vidis veni al mi sinjoron, kiun mi tuj rekonis laŭ liaj fotoj : la populara Dieudonné Costes, la heroo kun Bellonte de la unua transatlantika flugo de oriento al okcidento, taksata kiel pli malfacila ol en inversa direkto. Tri jarojn post la lamentinda malapero de Nungesser kaj Coli, kaj la admireginda sukceso de Lindbergh, tiuj du ricevis de la novjorka popolo tiel entuziasman akcepton, kiel la "fluganta frenezulo" estis ricevinta de la pariza.

Costes proksimiĝis, scivole rigardis la aparaton, faris al mi plurajn sagacajn demandojn, kaj sin montris tre interesita.

## 3. Laborista venko sen batalo.

En 1936 okazis la granda ĝenerala striko kun okupado de la uzinoj.

La laboristoj de la firmeto prezentis al Angénieux siajn depostulojn, kiuj estis tiuj de la tuta franca laboristaro : kvardekhora laborsemajno en kvin tagoj, 20-procenta plialtigo de la horsalajroj, dusemajna liber-tempo salajre pagata en ĉiu jaro.

La juna mastro petis duhoran tempolimon por respondi.

Li vokis min kaj demandis :

- Kion ci konsilas al mi ?
- Tuj akcepti. Post pli-malpli longa rezistado, la tuta mastraro devos cedi. Senprokraste konsentante, ci evitos strikon, kaj gajnos pli grandan estimon de ciaj kunlaborantoj.

Li ne plu hezitis : li kurvokis la delegitojn, kaj informis ilin pri sia plena konsento. Ĉio okazis, kiel mi antaŭdiris.

#### 4. Lanti, Han Riner, Henry Marx.

En la daŭro de mia restado en la pariza regiono, mi persone konatiĝis kun du homoj, kies penso multe influis al mi : nome Han Riner kaj Lanti. Pri la dua mi jam longe traktis en diversaj skriboj (artikoloj en Sennaciulo kaj Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo).

La penso de Han Riner estis jam de mi konata per liaj presitaj verkoj kaj per la biografia broŝuro de Georgo Vidal. Plurfoje mi vidis kaj aŭdis lin en publikaj paroladoj kaj debatoj. Tial mi facile rekonis lin, kiam mi hazarde lin renkontis sur Strasburg-bulvardo. Mi kuraĝis alparoli lin, li respondis afable, kun bonvolema rideto. Sekvis korespondado. Ni invitis lin al vespermanĝoj en nia hejmo, kaj li reciprokis per tagmanĝo en itala restoracio en Marly-le-Roi, kie li somere restadis apud bela arbaro.

Li nomis nin "karaj grandaj amikoj". Mi suspektas, ke li malavare disdonis tiun titolon al multaj, sed lia korvarmo estis tia, ke ni ne dubis pri lia sincereco. Kiam li venis al ni, niaj gefiloj sidiĝis sur la planko fronte al li, por aŭskulti lian brilan, ĉiam interesplenan konversacion.

Li mortis 76-jara en 1938. Tiam ni loĝis en Klermonto. Mia edzino ricevis la informon dum mia foresto. Kun larmoj

en la okuloj ŝi sciigis al mi la malgajigan novaĵon, kiam mi revenis de la laboro.

Alia persono de eminenta mensa staturato estis Henry Marx, fama oratoro, kian iuj nomis "princo de la parolo", kiel Han Riner estis kronita "princo de la filozofiaj rakontistoj". Henry Marx estas nun forgesita; tamen en tiu tempo unu teatraĵo de li estis prezentita en la Franca Komedio, kaj li plenigis salonegojn per amasoj da aŭskultantoj logitaj kaj ravitaj per lia belega voĉo kaj lia rara elokvento. Krom publikaj prelegoj pri kulturaj temoj, li animadis grupon de geamikoj ĉirkaŭ li kunigitaj per la moto de Blazio Paskalo: "Koni estas serĉi".

Lia viva inteligento estis pli intuicia ol racia. Mi ne dividis ĉiujn liajn opiniojn, por ekzemplo lian kredon pri "sciencia" astrologio. Pri artoj li havis delikatan senton kaj seneraran guston. Li estis, kiel multaj artistoj, senkaŝe samseksema, sed ne ekskluzive: li amis virojn, ankaŭ virinojn. En sia meza aĝo li fariĝis blinda, sed lia interna vido rekreis ravajn belaĵojn, kiujn lia parolo potence elvokis por la ĝuo de la aŭskultantoj.

Henry Marx estis parizano naskita en juda familio. Alta, kun regulaj trajtoj, preskaŭ blonda, li estis pli "arja"-aspekta ol judtipa, sed li estis fiera pri sia judeco. En 1941 li skribis al mi: "Mi portas mian flavan stelon kiel mian vizaĝon". Juda, socialista, kontraŭfaŝista, li havis la ĝojon ĝisvivi la disfalon de la hitlera fireĝimo. Li mortis en 1947, en malriĉeco proksima je mizero, plej digne elportita.

Henry Marx konatigis nin kun sia amiko Raymond Duncan, frato de la bela dancistino Isadora, grek-amerikano, kiu pasigadis sian tempon duone en Francio, duone en Usono, kaj eldonis revuon sub titolo "Paris-New-York". Li estis ĉiam vestita per blanka klamido el lanaĵo de li mem tekstita, kiun li portis kun granda eleganteco en sinteno kaj gestoj. Li tenis kun Henry Marx, iafoje ankaŭ kun Han Riner, "sokratecajn dialogojn", kiuj estis por la aŭskultantoj spirita kaj sprita frandaĵo.

Iam ĉe Duncan, ĉe Sejno-strato, en amika kunveno, ni troviĝis kun Yvette Guilbert, fama kantistino el la "Bela Epoko", kiu tiel sprite kantis. Ŝi estis maljuna, sed ŝia

voĉo kaj ŝia sprito neniom perdis el ŝia juneco.

### 5. Fino de mallonga epizodo.

Mi "putinas".

Adiaŭ al Parizo.

Je la fiksita tempolimo revenis mia kolego kaj kamarado Vidal ; mi do retransdonis al li la postenon.

Mi komencis serĉi novan dungigon. Dume mi aĉetis desegnotablon, kaj instaliĝis hejme kiel sendependa teknika konsilanto, imite al pli maljuna kamarado Sébastien Thomas, kiun mi ekkonis, kiam mi laboris ĉe Pathé. Li estis simpatia originalulo kun tre libera karaktero. Nigra barbo enkadrigis lian regultrajtan vizaĝon, en kiu la belagaj okuloj brilis de inteligenteco. Li ne estis ligita kun iu mastro, li luis siajn servojn por limigita tempo al diversaj firmoj, zorgante nur ke ili ne estu konkurencaj inter si. Tion li esprimis per jena formulo :

"Mi ne estas edziĝinta, mi putinas".

Mi do same "putinis" dum du monatoj, kaj mi devas konfesi, ke tio havigis al mi sufiĉe bonan profiton. Sed mia opinie, tia iom hazarda okupiĝado konvenis al fraŭlo kiel Thomas, ne al mi kun ŝarĝo de familio. Mi aspiris al pli stabila situacio. Iam poste mi devis kompreni, kiel iluzia povas esti "stabileco" en kapitalista industrio.

Mi ricevis tri proponojn, inter kiuj mi devis elekti. La unua venis de granda optika firmo en Parizo, sed mi ne volis konkurenci kontraŭ Angénieux. La dua de Bronzavia, kiu fabrikas akcesoreĵojn por aviadiloj, en pariza antaŭurbo, sed mi deziris pli malproksimiĝi de Parizo. La tria de Michelin en Klermonto (Clermond-Ferrand).

Jam longe pluraĵ kamaradoj kaj amikoj laborantaj en tiu grandega pneŭmatika fabriko konsilis, ke mi imitu ilin. Kial ne ? Mi do veturis al Klermonto. Ekde tiu tago, mi definitive forlasis la ĉefurbon.

\* \*  
\*

## V. En la ĉefurbo de kaŭĉuk-industrio

1. Unua kontakto. Fakestroj. Sekretoj.
2. Diversaj efektivigoj.
3. La hispanaj rifuĝintoj.  
Militminaco. Senespera lukto.  
1938. La katastrofa evitita.  
1939. La eksplodo.  
Polica esploro. Hobio savas min.  
Persekutitaj kamaradoj.
4. Dumilitaj vivkondiĉoj en mezgranda urbo.  
Adiaŭ al Klermonto.

1. Mi prezentis min ĉe la malnova uzino sur Karmelanoj-placo. Ĝi konsistas el diversaj konstruaĵoj sinsekve kreskintaj laŭ senplana ordo. Oni enirigis min en ĉambreton pompe nomitan salono, kun nudaj kalke farbitaj muroj, meblita per tablo el kruda ligno kaj du simplaj seĝoj. Envenis 50-jara viro en kitelo el blua tolaĵo (mi poste eksciis, ke tio estas kutima, kvazaŭ oficiala uniformo de ĉiuj Michelin-anoj, ĉu manlaboristoj ĉu inĝenieroj). Tiu ĉi estis S-ro Picaut, la personalĉefo, t.e. la estro de la dungofako. Li sidiĝis, kaj invitis min sidiĝi fronte al li. Kaj ni komencis interparoli.

Mi tuj avertis lin :

- Mi aŭdis, ke en via firmo oni interesiĝas pri la privata vivo de la kunlaborantoj.

Li trankviligis min :

- Vi povos mem konstati, ke ni plene respektas vian privatan vivon, kaj tute ne priatentas ĝin.

Mi insistis :

- Mi estis rezerv-oficiro. Mi estis eksigita, tial ke mi manifestis solidarecon kun la enkarcerigitaj militrifuzantoj.

Respondo :

- Tio estas via privata afero. Ĝi neniel koncernas la firmon. Nek via politika aparteneco, nek via religio aŭ filozofia opinio ; kaj se vi estas sindikatano, tio estas via plena rajto.

Post kelkaj demandoj pri mia antaŭa profesia vivo, li abrupte demandis :

- Kioman salajron vi deziras ?

Surprizite, mi eldiris iom pli grandan monsumon, ol mi antaŭe ricevis :

- Bone. Ĉi tie vi multe plidikiĝos tion. (Ĉu mi estis mallerta, nesufiĉe postulema ?)

En tiu momento mi estis dungita por trimonata provado.

Mia amiko Bertrand, kiu laboris en tiu firmo jam ok jarojn, akiris altan postenon kaj grandan konfidon de la mastro, estis rekomendinta min. Post tiu intervido S-ro Picaut diris al Bertrand :

- Vi avertis min, ke via amiko havas ne ordinaran karakteron. Nun mi estas ja konvinkita pri tio. Cetere li estas al mi simpatia.

Post S-ro Picaut venis alia bluestito : S-ro Beets, estro de la "studfako". Li diris :

- Vi debutos kun mi. En tiu fako ni rikoltas ĉiujn "kvinpiedajn bovidojn" (t.e. malfacilaj, malagrablaj problemoj), kiujn aliaj ne volas mem pritrakti, kaj grandanime allasas al ni.

Unu monaton poste.

En tiu uzino, kiu okupas pli ol dekmil laboristojn kaj plurajn centojn da inĝenieroj, estas kelkaj sekretaj partoj, en kiuj oni ellaboras inventaĵojn. Por ŝirmi la novaĵojn kontraŭ eventuala industria spionado, la eniro en tiujn lokojn estas severe malpermesata al ĉiu persono fremda al la koncerna fako.

Laŭ rakonto (ĉu legenda ?), iam la mastro de la firmo, sin prezentante sen rajtiga karto, ne povis eniri en iun el tiuj sanktejoj. Al la gardisto li vane diris :

- Sed mi estas la mastro, Edvardo Michelin. La alia restis neŝancelebla. Poste la kolegoj diris al tiu cerberoj :
- Ĉu do vi ne rekonis lin ? Li estas ja la mastro !

Kaj tiu ektimis.

Unu horon poste, kuriero portis al li koverton :  
"Komisie de la mastro".

La povrulo tremante ŝiris la koverton, konvinkite, ke ĝi enhavas eksig-leteron. Kaj li trovis bankbileton kaj manskribitan karton : "Kun gratulo, Edouard Michelin".

Similan rakonton mi iam legis pri Napoleono, sed mi opinias ĝin kredinda : ĝi ja kongruas kun la karaktero kaj la maniero de "la maljunulo".

Do, unu monaton post mia dungo, S-ro Beets sendis min al la estro de unu el tiuj sekretaj laborejoj, por esplori kun li problemon proponitan al la studfako. La vizitato afable min akceptis, sed li tuj telefonis :

- S-ro Beets, vi sendis al mi S-ron L., sed, mi scie, li ankoraŭ ne finis sian trimonatan provtempon. Ĉu mi tamen povas inici lin pri la sekreto ?

La respondo estis jesa. Mia ĉefo garantiis por mi, kaj aldonis, ke la restanta parto de mia prova staĝo estas nur formalajo. Tiel mi eksciis, ke fakte mi estas jam definitive enoficigita.

2. En tiu firmo, sub persona influo de "patro Edvardo", regis originalaj labormetodoj, samtempe raciaj kaj pragmataj. Ili plaĉis al mi, kaj mi rapide adaptiĝis al tiuj aparte efikaj metodoj. Ili stampis min por la tuta sekvo de mia profesia vivo.

Post la staĝo en la studfako mi pasis en la fizikan. Tie mi servis al fizikistoj, realigante diversajn mezuraparatojn por iliaj bezonoj.

Poste mi laboris en la fako pri "michelines". Tio estis malpezaj memtrakciataj fervojvagonoj sur radoj kun pneŭmatikoj. La ruliĝado sur la reloj estis multe malpli brua ol tiu de la kutimaj feraj radoj. Sed ĝuste pro tiu relativa silento, la bruo de la dizelo aŭ la siblo de la elektra motoro fariĝis ĝena. Mi devis eltrovi akustikajn rimedojn por dampi tiun bruon.

Malgraŭ siaj avantaĝoj, la "michelines" ne transvivis multajn jarojn, ĉar ili havis principan difekton. La fervoja politiko estis jam orientita al pli kaj pli grandaj rapidecoj ; nu, pro efiko de la centrifuga forto, la pneŭmatikoj ne rezistis al rapidecoj super 115 km-hore.



Sed tiu esplorado en la fervoja kampo estis okazo por du gravaj novaĵoj : la "metala" pneŭmatiko, en kiu ŝtalkingaletoj anstataŭas la kotonon aŭ nilonon de la klasikaj gumteksaĵoj, kaj la "radia", en kiu la kabletoj estas metitaj ne oblikve, sed perpendikle al la akso de la relo.

La metala pneŭmatiko, kreita de Michelin unuafoje en la mondo, estis la granda novaĵo de tiuj jaroj.

Mi konstruis maŝinon por pritrakti ŝtaldratojn per elektorezista (ĵul-efika) hejtado, kaj trempado en bano de likva plumbo.

Mia lasta efektivigo estis tiu de grand-dimensia maŝino por kontinua fabrikado de ŝtalkingaleta gumteksaĵo. La prototipo estis reproduktita je pluraj ekzempleroj en la moderna uzino de Cataroux apud Montferrand. Ili tie funkciadis ĝis ilia detruo per bombardado de tiu uzino far angla aereskadro en 1942.

3. Post la venka sturmo de la armeo de "Franco" en la civilmilito, alvenis el Hispanio aro da rifuĝintoj. Ili estis akceptataj de trupo da policanoj, kiuj enfermis ilin en vasta tendejo. Mi trovis tie du esperantistojn el Valencio, kun kiuj mi babilis kaj promenis tra la urbo ; sed ili ricevis nur malmultajn kaj mallongajn elirpermesojn. La franca respubliko traktis tiujn respublikanojn kiel malliberulojn aŭ kiel pestulojn.

Inter ili estis unu dekokjara katalunino nomita Montserrat. Mia kamarado Marret, dudekjara anarkisto, deziris oficiale edziĝi kun ŝi, por havigi al ŝi la francan civitanecon : dank'al tiu formalajo ŝi povus tuj eliri libere el tiu koncentrejo. Sed, ĉar la knabino estis juna kaj bela, tiu intenco ne plaĉis al lia amantino, kiu estis ankaŭ juna kaj bela - kaj ĵaluza.

En aŭgusto 1938 aperis militminaco pro la pretendo de Hitler aneksi la germangentan parton de Ĉekoslovakio.

La Ĝenerala Laborkonfederacio CGT, jam estrata de komunistoj, favoris militemon. Interne de ĝi escepte kontraŭstaris la Federacio de Teknikistoj, al kiu mi apartenis. Nia doktrino estis jena : ne per nacia armeo oni ofike kontraŭbatalas armean agreson, sed per klasbatalo. Faŝismo nun regas en Italio kaj en Germanio ; tamen en 1936, imite al la franca laboristaro, la labor-

istoj de FIAT en Torino kaj tiuj de Siemens en Dresdno ekstrikiĝis kaj okupis siajn uzinojn spite al nigraj kaj brunaj ĉemizuloj. Jen estas la vojo : anstataŭ interbuĉado de proletoj sur batalkampoj por la nura profito de ambaŭflankaj kapitalistoj, neperforta rezistado kaj organizado sur klasbatala bazo, kafe se necese.

La milito ŝajnis tuj eksplodonta ; mi ekkontaktis kun kelkaj kamaradoj, federaciaĵoj kaj aliaj, liberecanoj kaj diverstendencaj pacistoj. Ni surrajdis biciklojn kaj iris tra la urbo kaj la ĉirkaŭurbo por alarmi ĉiujn konatajn simpatiantojn. Ni kunvokis por vesperkunveno en la sindikata domo. Venis diverstendencaj homoj, inkluzive dekstruloj, kiuj diris : "la francoj ne volas morti pro la ĉekoj". Mia amiko Pierre Bernard, klera kaj elokventa sekretario de nia sindikata sekcio, diris :

- Kontraŭ la milito, ni alianciĝu kun la diablo, kun la papo, kun kiu ajn !

En tiu kunsido estis fondita "Unio de pacistaj fortoj" - ja fortoj malfortaj laŭ nombro, sed agemaj. Ni presigis afiŝojn en la sekvanta tago, kaj nokte surgluis ilin sur la murojn de la urbo. En tiu nokta tasko mi skipe laboris kun la juna kamarado Marret, entuziasma knabo. (Kelkajn jarojn poste li fariĝis unu el la fidelaj kunuloj de Paul-Emile Victor en polusaj ekspedicioj).

Tiufoje la milito estis evitita per la interŝtata konferenco iniciatita de Mussolini, en Munkeno. Provizore. Unu jaron poste, haste preparita dum la laboristoj ĝuis somerferion, ĝi senreziste eksplodis.

Ĉi-foje la "Unio de Pacistaj Fortoj", diserigite, eĉ ne provis reagi. Ni sentis la batalon por ni jam perdita. Okazis nur kelkaj individuaj protestoj. Mia amiko Antonio Fonfraid, anarkista CGT-ano, diris al siaj militemaj kolegoj : - Vi volas iri al la amasbuĉejo ? Do iru, kaj krevu!

Bernard mendis stokon da kontraŭmilitaj flugfolioj eldonitaj de la teknikista federacio. Ni eĉ ne havis tempon por ilin disdoni : kiam ni ricevis ilin, la milito estis jam proklamita.

En unu el la unuaj tagoj de septembro, mi estis vokita en la kabineton de S-ro Picaut. Tie min atendis du sinjoroj

kun mola ĉapelo kaj mastik-kolora pluvmantelo. Ili montris al mi paperon kun oficiala stampo, kaj petis, ke mi sekvu ilin.

- Mi supozas, ke vi intencas esplori en mia hejmo ?
- Vi vidos.
- Mi devas averti vin, ke mia pordo estas ŝlosita, kaj la ŝloŝilon tenas ne mi, sed mia edzino, kiu nun ne estas hejme.
- Ni ja malŝlosos.
- Kiel vi volas. Mi nur permesas al mi sugesti, ke vi unue pasu ĉe seruristo, kaj kunvenigu lin.

Tiel ili faris.

Mia edzino estis en Klermonto nur trapase. De post la unua tago de la mobilizado, ŝi kun niaj gefiloj loĝis en Aleso ĉe mia patro. Ni vicluigis nian apartamenton al protestanta familio de profesoro el la strasburga teologia fakultato, rifuĝinta en Centra Francio kiel multaj alzacanoj. Mi okupis ĉambreton "por servistino" (servistinon ni ne havis) sur la supra etaĝo.

La seruristo malŝlosis la pordon. La ĉambreto estis obstrukcita per multaj aferoj. La atento de la du polic-inspektoroj estis tuj kaptita de du grandaj kofroj, kiujn ili malfermis. La kofroj estis plenaj de samformataj skatoletoj.

- Kio estas tio ?
- Mineralogiaj kaj geologiaj pecoj, fosilioj. Vidu mem.

Ili vidis, kaj ne insistis. Certe tio sufiĉis por konvinki ilin, ke ili frontas al sendanĝera idealisto, intelekta maniulo. Ne plu traserĉante, ili retiriĝis. Mi respondis samatone al ilia formale ĝentila saluto, kaj flegme petis la seruriston, ke li bonvolu reŝlosi la pordon.

Sed post nia disigo, malvarma ŝvito fluis sur mia dorso, dum mi liberigite ekspiris. En la ĉambreto, krom personaj vestaĵoj kaj la du benindaj kofroj, estis dikaj pakoj da kontraŭmilitaj flugfolioj, kiujn ili preterpasis.

La saman vesperon, post forveturo de mia edzino, mi malaperigis tiujn danĝerajn, kaj de tiam senutilajn paperojn, forbruligante ilin.

Subite, tra la densa fumaĵo, aperis silueto kun kepo.

Mi ekpensis : "Ĉi-foje mi ne eskapos." Sed ĝi estis nur mia ludonanto, mobilizita kiel armea kuracisto, kiu sen-ceremonie vizitis min.

La morgaŭon mi eksciis pri aresto de pluraj kamaradoj. Bernard : ankaŭ ĉe li la polico trovis nenion, sed li estis konata pro sia politika tendenco kaj sia efika agado, kredeble ankaŭ denunciata. Fonfraid, pro malsingardaj paroloj en kafejo, "ekscito de militistoj al malobeo". Instruisto Ravel, milda anarkisto, sen ia preciza motivo.

Bernard estis kondamnita al trijara mallibereco. En la tempo de la "franca ŝtato" de marŝalo Pétain, kun sindikatanano Belin kiel labor-ministro, ni, familio kaj amikoj, multigis klopodojn por lia liberigo. Fine lia puntempo estis reduktita al dek ok monatoj. Kiam li eliris el la prizono de Riom, li, altstatura, kun normala pezo de 86 kg, pezis nur 46. Kelkan tempon poste, arestita de la Gestapo, li estis transportita al Aŭschwitz. Fine de la milito li revenis, vi povas imagi en kia stato. Li diris al mi :

- Mi refortigos, sed mia koro ricevis neresanigeblan baton : certe mi ne vivos longe plu.

Tamen li ankoraŭ nun vivas, malfortika kaj fizike suferanta, sed mense ĉiam tiel vigla.

Pri Fonfraid niaj klopodoj estis senefikaj. Li finis tutan sian trijaran malliberecon. Li estis plie kondamnita al kvin jaroj da "restada malpermeso" : tio signifas, ke li rajtis loĝi nur en kelkaj urboj difinitaj por tiaj kondamnitaj. Unu el tiuj urboj estis Nimo. Tie mi revidis lin dekon da jaroj poste ĉe la granda kunveno kun Gary Davis\*. Antaŭe li estis presisto en la bankilet-fabriko en Chamalières apud Klermonto. En Nimo li fariĝis putfosisto. En tiu metio li bone perlaboris siajn vivrimedojn, ĝis li mortis pro pulmo-kancero.

Ankaŭ pri Ravel niaj klopodoj restis vanaj. Sen proceso, sen jura kondamno, li estis sendita unue al koncentrejo en Lozero, kreita de la Daladier-registaro por diverstendencaj pacistoj kaj kontraŭfaŝistoj. Poste, kaptita de la Gestapo, li mortis en Germania koncentrejo.

\* Vd. Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo.

Mi postvivis tiujn du malfeliĉajn kamaradojn, kiuj estis, kiel Bernard, multe pli junaj ol mi. Al kio mi ŝuldas mian bonan ŝancon ?

Alia bonŝanco venis de mia militista sengradigo. Male al la profetaĵo de la fajrobrigada majoro, mi ne estis sendita al buĉejo. Dum miaj samaĝaj kolegoj rezerv-oficiroj batalis ĉe la fronto, kaj pluraj estis militkaptitaj, mi estis mobilizita en Nimo en februaro 1940 kaj liberigita en julio. Mi reprenis mian postenon en la uzino.

#### 4. Dumilitaj vivkondiĉoj en mezgranda urbo. Adiaŭ al Klermonto.

Baldaŭ mankis importitaj krudmaterioj por la fabrikado de pneŭmatikoj. Ni laboris nur 20 horojn ĉiusemajne, kaj ricevis duonan salajron.

Mi kultivis legomĝardenon, kiu havigis al ni kelkajn nutraĵojn. Feliĉe, ĉar nutraĵoj fariĝis malfacile akireblaj, eĉ post longa vicatendo, en la urba marketo : magazenoj kaj bazaro. Iun tagon ni havis por manĝi nur asparagojn kun malgrasa surogato de oleo ; alian tagon, en la bazarhalo estis nur urtikfolioj, per kiuj oni faris maldensan supon. La familia vivtenado fariĝis ĉiutaga problemo. La "nigra merkato" ankoraŭ ne estis organizita. Kune kun du kolegoj mi aĉetis terpeceton, sur kiu ni komunume kultivis terpomojn.

Post kelkaj monatoj, ĉar la kaŭĉuk-produktado pli kaj pli asfiksiiĝis, la firmo decidis redukti la nombron de la inĝenieroj, komencante per la pli freŝdate dungitaj. Mi estis el tiuj ĉi. Sed oni ne maldungis min. Kelkaj kolegoj estis senditaj tra la tuta neokupata parto de Francio por esplori liberajn inĝenier-postenojn, kiujn oni proponis al ni. Post akcepto, ni estis metitaj en pozicio de senlima forpermeso. Ni konservis kelkajn avantaĝojn, kiel la eblecon aĉeti je favora prezo difinitan kvanton da biciklo-pneŭoj, superan al niaj personaj bezonoj. Tiu varo fariĝis rara, kaj konsistigis altvaloran intersanĝilon kontraŭ nutraĵoj ĉe kamparanoj.

Al mi estis proponita posteno en pirenea uzino, fabriko de kompresoroj por aviadilaj motoroj. Tien mi iris por prova renkonto, estis akceptita, kaj mem tuj akceptis. Tiel mi forlasis Klermonton provizore - fakte neniam revenonte.

En 1947, kiam la situacio estis normaligita, la firmo proponis al mi elekton : aŭ repreni mian postenon, aŭ definitive ekŝiĝi. Tiam mi havis decan situacion en mia naskiĝurbo Aleso : mi elektis resti tie, kaj subskribis ekŝiĝleteron al Michelin.

Sed antaŭe mi rakontos pri mia pirenea restado.

\* \* \*

## VI. Ĉe Pirenea montpiedo.

1. Kamparano. Vivkondiĉoj en vilaĝoj.
2. Milita etoso en uzino.  
Kunlaboristoj kaj rezistanoj.  
La socia komitato.  
Pola rifuĝinto kaj Gestapo.  
La deviga laborservo. Filo fervojisto.
3. Mastro Ŝidlovski. Inĝeniero Planiol.  
La sonmuro. Ĉu krii aŭ labori ? "Eterna movado".  
Fuĝo al Ĝenevo.  
La leĝo de la pli forta.
4. Germana taĉmento.  
Ŝidlovski dungas jetfakulojn.  
Charles Tillon.  
La germanoj alvenas.  
Plurnacia kolegaro. Travivaĵoj de Tupalski.  
"Herr Praesident".
5. S-ro Jung kaj lia recepto.  
S-ro Bruhl kaj la mandareno.  
La neĝokampoj liberigitaj.  
La filinoj de la mastro.
6. Eksiĝo.  
La profetaĵo de S-ro Crémieux.

1. Mi loĝis unue en Saint-Pé de Bigorre, altpirenea vilaĝo apud Lurdo, ĉe bakisto de panoj kaj biskvitoj, kiu tenis ankaŭ hotel-restoracion mastrumatan de lia edzino. Tie manĝis kutime kelkaj ĝendarmoj kaj oficiroj de la "Junularaj Labortrupoj", kiuj anstataŭis por la junaj francoj la armean servadon. Malgraŭ la malpermesoj kaj la oficiala "senvianda tago", la mastrino ne povis imagi, ke estus en la semajno eĉ unu senvianda tag- aŭ vespermanĝo.

Tiu vilaĝo situas 20 kmjn for de la uzino. Ĉiumatene mi devis forveturi pli frue ol levigis la hotel-restoracia personaro. Oni diris al mi :

- Vi trovos en la kuirejo ĉion necesan por via matenmanĝo. Vi mem preparu ĝin, kaj servu vin laŭplaĉe.

Kiam mi vidis en nelimigita kvanto panon kaj buteron, mielon, konfitaĵojn, sukeron, lakton kun dika kremtavolo, kafon, mi preskaŭ ploris pensante pri miaj gefiloj en Klermonto, kaj pri ilia patrino, kiu domaĝis al si la necesan nutraĵon por lasi iom pli al ili. Mi ne povis venigi ilin tuj, ĉar ili devis fini la lernojaron en la urbaj liceoj ; cetere necesis antaŭe trovi familian loĝejon ; sed mi tuj komencis sendi al mia edzino buteron, ovojn kaj aliajn manĝaĵojn.

Baldaŭ mi luis malgrandan vilaon sur la ebenvalo de la rivero Gave de Pau, fronte al la belega Pirenea montaro, ok kilometrojn for de la uzino, al kiu mi matene biciklis, kaj same revenis vespere. Mi meblis la vilaon per kelkaj mebloj senditaj de Klermonto, kaj instaligis provizore sola.

Tiu dometo estis tute izolita meze de kamparo, kaj ĝi restis la tutan tagon neokupata. Trifoje en la daŭro de monato, vespere revenante, mi konstatis, ke ĝi ricevis viziton de ŝtelistoj. Ili rompis fenestroklapojn, kaj forrabis kelkajn objektojn : lanvestaĵojn, ĉemizojn, ŝuojn - raraj kaj altvaloraj varoj en tiu tempo. Mi devis forlasi tiun tro malsekuran loĝejon.

Mi instaligis en najbara vilaĝo ĉe ŝuriparisto, kies konversacio estis interesa kaj amuza. Ofte, nokte en la unua aŭ dua matenhoru, tiu originalulo ellitiĝis, ekbruligis lignon en sia granda kameno, preparis kafon, kaj, ĝin trinkinte, komencis frapadi per martelo sur ŝuplandojn. Mi aŭdis la klakbatadon dum unu aŭ du horoj, poste li rekuŝiĝis.

Li havis multajn klientojn inter najbaraj kampuloj. Por la riparado de iliaj ŝuoj aŭ botoj, li postulis ne monon, sed maizon, tritikon aŭ ansergrason. Ankaŭ tie mi estis bone nutrata, kaj, krom la bruo de la noktaj ŝupland-marteladoj, sufiĉe komforte loĝigata. Sed tio povis esti nur provizora, ĉar proksimiĝis la tempo, en kiu povos veni mia familio.



Ĝustatempe mi trovis en alia vilaĝo, pli proksima al la uzino, grandan meblitan vilaon en vasta ĝardeno apud stacidomo. La luprezo estis tre alta, ĝi forprenis kvaronon de mia salajro, tamen mi senhezite ĝin luis.

Vespere alvenis mia familio. Estis jam nokte. Pluvis, kiel povas pluvi en Bearno. Larĝaj gutoj falis de la arboj. Ni marŝis sur aleoj jam longe ne prizorgitaj, en altkreska malseka herbo. La granda domo en maŭlumo aspektis kiel vizaĝo de malafabla persono.

Meze de la nokto mia edzino vokis min :

- Mi ne povos resti tie ĉi.

- Bone. Sed nun dormu : morgaŭ ni reparolos pri tio.

Matene, kiam ŝi malfermis la fenestro-klapojn, gaja sunlumo plenigis la ĉambron. Ĉe la balkono brilis ruĝaj floroj de kamelio kreskanta de la grundo ĝis la etaĝo. Ĉirkaŭ la domo floris rozoj kaj jasmenoj. Maldekstre staris granda cedro, en kies foliaro pepis birdoj. Dekstre en malproksimo aperis nete post la pluvo la mirinde bela profilo de Pireneoj. Manbatante Ivona vokis la gefilojn :

- Venu vidi, kiel rave !

- Nu, mi demandis flegmatone : kiam ci foriros ?

Pri foriro ja ne temis plu.

Ni kutimiĝis al kunvivado kun najbaraj vilaĝanoj. Ne riĉaj, sed komforte vivantaj per kultivado de malvastaj tritik- kaj maizkampoj, kelkaj vitoj por la familia vino, legomĝardeno kultivata de la virinoj, bredado de malmultaj bovinoj, porkoj, anseroj, anasoj, kokoj kaj meleagroj. Ni partoprenis en la fojnrinkoltado, en la komuna draŝado de greno per maŝino laŭvice uzata de ĉiu bienulo kun helpo de la tuta vilaĝo, rikoltado de maizo kaj fazeoloj, senfoliigado de maizo-spikoj. Oni kunvenis laŭvice en la grajnohalo de ĉiu vilaĝano kaj, kune laborante, kelkaj kantis popolkanzonojn aŭ rakontis fabelojn kaj anekdotojn. Fine oni manĝis rostitajn kaŝtanojn kaj trinkis blankan vinon, antaŭ ol hejmen reiri.

Nia 16-jara filino preparis sian abiturientan ekzamenon paŝtante nian gregeton da anseroj. Mi provizis kampulojn per biciklaj pneŭmatikoj. Mia edzino trikis

lanvestojn per belkvalita lano, kiun la virinoj facile havigis al si ĉe la nigra merkato. Per interŝanĝado kun urbaj komercistoj, ili ricevis ĉiajn rarajn varojn ; aparte rimarkindaj estis iliaj silkaj ŝtrumpoj. Kompense por la lantrikado ni ricevis lakton, buteron, fromaĝon, ansergrason, maizon, ovojn. Al la viandvendisto mi donis miajn tabak-kartojn ; rekompence li provizis nin per bova graso ; per ĝi kaj kemiaj ingrediencoj, sodo kaj rezino, ni fabrikis hejman sapon. Fine de la milito, ni, konsiderataj kiel kamparanoj, ne rajtis plu pri pankartoj, sed la bakisto donis al ni panon kontraŭ niaj vin-kartoj. Ni devis barakti por terpomoj - la bearnaj vilaĝanoj kultivis da ili nur por la familia bezono - sed en la apuda departemento Altaj-Pireneoj oni facile trovis ilin. Ankaŭ ledŝuojn, dum ledo preskaŭ tute mankis. Fine ni malhavis nenion esence necesan, kondiĉe nur, ke mia edzino trikaŭu, kaj ke mi trakuru la kamparon sur vojoj kaj padoj.

Iun nokton, biciklante kun dorsosako plena de sekaj fazeoloj, ovoj kaj lakto, mi estis haltigita de du ĝendarmoj. Ili lumigis mian vizaĝon per elektra poŝlampo kaj demandis :

- Kiu estas vi ?

- Laval !

Ili rigardis min kun suspekta mieno, eble supozante, ke mi ŝerce mistifikas ilin. Laval estis la nomo de la tiama ĉefministro, la ĉiopova mastro de Francio sub la ŝildo de la ŝtatestro marŝalo Pétain. Mi devis montri miajn paperojn. Konstatinte mian identecon, ili lasis min daŭrigi mian vojon, ne esplorante la enhavon de mia sako.

Ni ne rajtis plu ricevi karbon, sed kiel vilaĝanoj ni ricevis parton el ligno de la komunuma arbaro. Ni devis nur dehaki ĝin, fendi per kojnoj la faligitajn trunkojn, dissegi branĉojn, kaj transporti per ĉarumo la ŝtipojn kaj la faskojn.

2. En la uzino estis kelkaj "kunlaboristoj", t.e. aprobantoj de kunlaborado kun la hitlera reĝimo, kaj pli multaj "rezistanoj" : golistoj, diversaj kontraŭfaŝistoj kaj komunistoj, anoj de perforta rezistado.

Tiuj ĉi komence malfidis min, ĉar mi venis de Klermonto kaj de Michelin-firmo, rigardata kiel nesto de faŝistaj

komplotistoj. Baldaŭ unuj kaj aliaj ekkonsciis, ke mi estas nek por nek kontraŭ ili, kaj rifuzas elekti partion. Ĉiuj fidis al mi, kaj mi ricevis de ambaŭ flankoj konfidencojn, kiuj povus esti danĝeraj por ili. Ĉiuj sciis, ke mi almenaŭ ne estas denunciisto, kaj la pli junaj petis de mi konsilojn. Iam juna juda inĝeniero, timante esti arestota, kaŝe tranoktis en mia hejmo.

Tio estis en la dua periodo de la milito, kiam la germana armeo estis invadinta la ĝis tiam neokupatan regionon. Ĝustatempe avertita, la firmomastro, juda polo ricevinta la francan civitanecan, fuĝis kaj rifuĝis en Ĝenevo, kie li restis ĝis la fino de la milito.

La firmo, "juda entrepreno", ricevis de la ŝtato provizoran administranton: S-ro Martinot-Lagarde, maljuna politeknikano, inĝenier-general-inspektoro de la aerarmeo. Tiu ĉi fakte favoris la mastron Ŝidlovski, kaj efike klopodadis por konservi al li la uzinon en kiel eble plej bona stato de aktiveco (tio ne estis facila tasko sub la germana superregado).

S-ro Martinot-Lagarde regule kunvenigis la komitaton, iel similan al la nunaj entrepren-komitatoj, starigitan konforme al la instrukcioj de la Pétain-registaro en la kadro de la "kunlaborado inter kapitalo kaj laboro". Mi per propra iniciato senmandate enŝovigis en tiun komitaton.

- Kiun vi reprezentas? demandis al mi la administranto-prezidanto.

- Nur min mem. Sed mi opinias, ke mi povas utile helpi.

- Ha! bone...

Kaj mi daŭre kunsidis, kun aprobo de la laboristaj reprezentantoj.

Sub la aŭtoritato de tiu administranto restis (per kiu mistera protekto?) la estro de la studfako, S-ro Crémieux, juda franco. Li eĉ fariĝis administra direktoro, kaj tiam mi ricevis lian antaŭan postenon. La estro de la kontrol-fako estis anglo, S-ro Gardner, kiu poste fariĝis produkto-direktoro.

Iun tagon la uzino estis vizitata de gestapanoj. Ni estis informitaj de franca policano, kaŝe favora al rezistado, ke ili serĉas polan inĝenieron persekutatan

pro estinta rezistado en sia lando. Ĝis tiam li sukcesis kaŝi sin en nia suda regiono. La direktoro avertis lin, kaj indikis al li kaŝan pasejon, tra kiu li facile forŝteliĝus. Sed li, lacigite de tro longa kaŝa fuĝado, rifuzis tiun certan saviĝon. Li propravole sin liveris, kaj estis forkaptita. Neniam plu ni aŭdis pri li.

Venis la tempo de la "Deviga Laborservo". Francaj laboristoj inter la pli junaj estis rekrutitaj kaj senditaj en germaniajn laborejojn. Ĉiu uzina administracio estis devigita starigi liston de rekrutebla personaro. La nia, kiel multaj aliaj, sekrete avertis la enlistigitojn, ke ili povu ĝustatempe eskapi. Iuj sin kaŝis en la "makiso", aliaj transpasis la proksiman limon al Hispanio, kun fina celo Britio. Kompreneble la ŝtato postulis, ke oni elektu aliajn por anstataŭigi la forfuĝintojn, sed oni gajnis tempon : sufiĉan tempon, fine, por ke neniu foriru al Germanio.

Mia filo, 19-jara studento, estis en danĝero pri deviga rekrutiĝo. Mi prezentis lin al sekciestro de la voja fako ĉe la fervojstacio en Paŭo. Ĉi tiu tuj dungis lin kiel helpanton en taĉmento por la riparado de difektitaj katarajaj fostoj. Li troviĝis en kompanio de fortaj viroj, kiuj nokte difektis la fostojn per eksplodaĵoj, kaj tage tre meti-konsciencie riparis ilin. Ili amike akceptis tiun junan kunulon, kaj rezervis por li malplej lacigajn taskojn ; tamen al ili plaĉis, ke li, sporte hardita, ne timis grimpi ĝis la supra pinto de la fostoj. Tiel mia filo estis dumtempa fervojisto kiel la patro, sed en alia fako.

3. Mi ankoraŭ ne parolis pri la firmomastro, S-ro Ŝidlovski, tre originala persono. Kvankam naskite en Polio, li, laŭ samdevenaj kolegoj, ne bone parolis pole. Verŝajne lia hejma lingvo estis la jida ; krome, li travivis sian junecon en Germanio kaj en Zuriko, kie li estis studento en la "Polytechnikum". Li parolis germane plibone ol france.

Li komencis sian inĝenieran karieron en Boulogne-Billancourt, en lokaletto de la aŭto-uzino Salmson, kun kvar laboristoj. Tie li kreis sian unuan kompresoron. Li asociiĝis kun S-ro Planiol, franca inĝeniero. Tiu ĉi, en 1940, migris al Usono. Mi ekkonis lin, kiam li revenis en 1945.

Tiuj du kleruloj frukte kunlaboris, sed ili havis fulmontondrajn karakterojn. Ofte eksplodis inter ili, pri teknikaj demandoj, homeraj disputoj, dum kiuj ili interŝanĝis tiel dolĉajn epitetojn kiel "stultulaĉo" aŭ "azeno". Baldaŭ S-ro Planiol reiris definitive al Ameriko.

Kiam mi ekkonis S-ron Ŝidlovski, li mastris entreprenon kun 200 laboristoj. De tiam ĝi kreskis ĝis granda amplekso.

Ofte vizitis la uzinon inĝenieroj delegitaj de la aerministerio (la ĉefa kliento) por inspekti nian laboron kaj pritrakti novajn mendojn. Iam unu el tiuj junaj teknokratoj venis al mi, dum mi desegnis novan kompresoron. Li demandis :

- Kiun diametron havas via rotoro ?
- Ducent okdek milimetroj.
- Kaj je kiu rapido ĝi rotacias ?
- 28 000 revolucioj en minuto.
- Do proksimume 477 en sekundo ?
- Jes.

Rapida menskalkulo.

- Sed, ĉe la ekstremo de la padeloj vi do transos la sonrapidon, la tuta mondo krius !

Ŝidlovski tiam grumblis :

- Ne la homoj kiuj krias faras progresojn : ja la homoj kiuj laboras !

Ni memoru, ke en tiu tempo, krom kugloj kaj obusoj, neniu homa efektivaĵo atingis tian rapidon. La "sonmuro" estis rigardata kiel limo netransebla de iu mekanika organo sen nepra kaj tuja detruigo. Spite tiun antaŭjuĝon, ni konstruis nian kompresoron ; ĝi turniĝis je la difinita rapido, kaj sendifekte funkciis.

Iun tagon S-ro Ŝidlovski kaj mi cerbumis pri malfacila mekanika problemo. Mi eltrovis revolucionan solvon, kium li entuziasme adoptis. Dum li estis foririnta al sia tutapuda vilao, mi ekkonsciis, ke mia solvo enhavas principan rezon-eraron, kaj estas tute nebla.

Subite, tra fenestro mi vidis lin eliri el sia domo kaj veni al mi per grandaj paŝoj. Kaj li diris :

- Vi inokulis al mi azenaĵon !

Mi trankvile respondis :

- Jes, sinjoro, mi scias : mi simple inventis la eternan movadon !

Ni ambaŭ ekridegis. Ni longe reesploris la demandon, ĝis fine ni trafis ĝustan solvon. Ĉu li, ĉu mi ĉi-foje ricevis la bonan inspiron - mi ne memoras. Sed mi bone scias, ke ofte lin vizitis geniaj ekfulmoj. Li estis aparte kapabla pri termodinamiko kaj aerodinamiko.

Dum li restadis en Ĝenevo, ni kaŝe fabrikis kompresorojn, kiujn ni sendis al Britio tra Svisio. Iam gestapanoj eltrovis la kelan laborejon, en kiu estis muntataj tiuj kompresoroj. Ne sekvis ia punsankcio, sed kelkan tempon poste venis alta germana ŝtatfunkciulo, kiu rekviziciis la ĉefajn maŝinojn de la uzino. Vane S-ro Martinot-Lagarde protestis, dirante :

- Sed vi ne rajtas...!

La alia milde respondis, kun plej ĝentila tono :  
- Sinjoro Generalo, mi ĉion rajtas.

Tio estis ja konforma al la milita juro (kaj ne nur milita...), nome al la "leĝo de la pli forta".

4. Tuj post la militfino S-ro Ŝidlovski revenis de sia ĝeneva ekzilo. Li kunportis en sia pakajo stokon da novaj ideoj, teknikaj kaj aliaj.

Unue li veturis al Germanio kaj esploris uzinojn, en kiuj li retrovis siajn rekviziciitajn maŝinojn. Kun permeso de la okupantaj aŭtoritatoj, li reprenis ilin - plus kelkajn aliajn.

Krome li diris al si : la germanoj kreis V1, V2, ke : do ili estas tre progresintaj en la tekniko pri jetmotoroj. De tiu progreso ni devas profiti (same rezonis pri jetoj kaj raketoj la usonaj kaj sovetiaj gvidantoj). Ankaŭ la angloj jam akiris sperton pri jetoj, multe pli ol la usonanoj : plia motivo por ĉi tiuj rekruti germanajn specialistojn. Ŝidlovski pli rapidis ol ili. Li haste dungis 160 fakulojn diversnivelajn : de la mondfama D-ro Eckert, elstara termodinamika scienculo, ĝis desegno-reproduktistinoj kaj tajpistinoj, sub aŭtoritato de S-ro Nallinger, la teknika direktoro de la stutgarta firmo Mercedes-Benz. Li instalis ilin en studburoo en Bregenz ĉe Konstanta Lago.

Tiu taĉmento konsistis ĉefe el fakuloj komisiitaj de Goering (tiel megalomania kiel Hitler mem) por konstrui jeton kapablan atingi Nov-Jorkon en kelkaj horoj kaj

bombardi la usonan urbegon. Ŝidlovski reprenis la grandiozan projekton en paca versio : transatlantika transport-maŝino (kia estis poste "Konkordo"). Al tiu ambicia projekto li sukcesis interesi la francan registaron kaj ricevis gravan subvencion.

Kelkajn monatojn poste, li intencis venigi la germanan kolegaron al Pireneoj. Tiel li havos ilin tute apud si, kaj evitos oftegajn vojaĝojn al Bregenz. Sed li celis pli: li volis, ke per senpera kontakto kun tiuj fakuloj, ni akiru ilian scion kaj ilian kapablon.

Tiu projekto komence renkontis malfavoran akcepton de la francaj laboristoj, tre sentemigitaj de la freŝdata milito kaj de la germana subprema okupado. Ni, sindikataj delegitoj kaj membroj de la entrepren-komitato, devis uzi multe da diplomatia persvadado por mildigi tiun senton kaj venki la rezistemon de niaj kamaradoj. Venis Charles Tillon, eks-ĉefkomandanto de la francaj partizanoj, komunista armad-ministro en la Degola registaro, kaj persona amiko de nia laborista ĉefdelegito. En tiu okazo, unikan fojon en mia vivo, mi interŝanĝis manpremon kun ministro.

La influo de Tillon estis decidiga, ĝi forbalais la lastan kontraŭstaron. Nur unu kondiĉo klare difinita : neniam iu germano havu ordonrajton al francoj. Tion solene promesis la mastro kaj la direktoroj, kaj la sindikataj delegitoj deklaris, ke ili zorgos pri skrupula observado de tiu promeso.

Alvenis la germanoj. Mi estis komisiita por ilia akcepto. La unua interkontakto estis ne tro malvarma, mi dirus eĉ sufiĉe korbvena. Oni instalas la tutan kolegaron en apuda urbeto, en vasta halo, kun mia dudeko da kunlaborantoj. Mi devis traktadi sur egalnivela ŝtupo kun direktoro Nallinger. Tiu ĉi ricevis apartan kabineton kun sia sekretariino. Mi rifuzis similan, kaj instaliĝis meze de la dunacia aro da inĝenieroj kaj desegnistoj : unue por pli facile plenumi la mision al mi difinitan, due por eventuale glatigi la rilatojn inter la anoj de la finvenkita eks-"sinjora raso" kaj la eks-venkitoj kaj subpremitoj sub la hitlera boto.

Mi diris : dunacia, mi devus diri plurnacia : ĉar

inter la germanoj estis pluraj aŭstroj kaj unu hungara ĉekoslovakiano, kaj en mia franca studburoo estis unu belgo, unu sviso, unu hispano, unu besarabiano kaj du poloj. Unu el tiuj ĉi estis inĝeniero Tupalski, adjunkto mia. Li estis multon travivinta, kaj spertinta eksterordinarajn aventurojn. Dum la milito, vaginte tra Hungario, Rumanio kaj Turkio, li atingis Palestinon, tiam sub angla mandato. En Jerusalemo li renkontis amikojn. Per ili li eksciis, ke lia edzino, de kiu li estis jam de monatoj sen novaĵoj, ĵus alvenis en tiu sama urbo post vojaĝo tra Svedio, Britio, Kanado kaj Usono. La hazarda retroviĝo en la hebrea lulilo de tiu nejuda pola paro estas unu el la neantaŭimageblaj okazoj de tiu kaprice drama epoko.

Miaj rilatoj kun S-ro Nallinger estis glataj, faciligitaj per lia sekretariino, kiu bone parolis france. Cetere, mi baldaŭ retrovis mian kutimon, iom perditan, pri la germana lingvo praktikita pli ol dudek jarojn antaŭe, kaj jam ne bezonis interpretadon.

D-ro Eckert, la ĉefa scienculo, ne bone komprenis la francan lingvon. Por la interparoloj kun li ni rezignis la helpon de alzaca interpretistino: ŝi ja perfekte majstris ambaŭ lingvojn koncerne komunan vortaron, sed ne sciis la sciencan kaj teknikan terminaron. Feliĉe Tupalski kaj mia alia adjunkto, la juna inĝeniero Gorel (kiu estis vivinta du jarojn en Germanio kiel deviga laboristo) parolis germane eĉ pli flue ol mi.

Ofte okazis konferencoj kun la germana teknika stabo sub gvidado de S-ro Ŝidlovski. Komence oni parolis du-lingve, kun pena interpretado, baldaŭ tute nature germane. Kiel la aliaj, mi alparolis la mastron per la vortoj "Herr Praesident". Li strabe rigardis al mi, eble suspektante, ke mi intencas moki lin, - sed mi restis seriozmiena kiel papo.

5. Mi estis sendita al Parizo por liveri dikan pakon da desegnoj al la ministerio de aerforto ĉe bulvardo Victor. Min akceptis juna inĝeniero-oficiro. Li prenis la pakon, eĉ ne malfermis ĝin, metis ĝin en murŝrankon, kaj interŝanĝe donis al mi grandsuman ĉekon.



Okaze de tiu vojaĝo mi konatiĝis kun S-ro Jung, konstanta reprezentanto de la firmo ĉe la registaraj instancoj. 75-jara, li perfekte ĝustigis sian nomon\* : svelta, rekta kiel I, korpe kaj mense vigla. Kun admiro mi demandis lin pri la sekreto de tiel konservita juneco. - Ĉion uzi, nenion trouzi, kaj ĉiam dormi kun malfermita fenestro.

Malgraŭ la poluita aero, kium li spiris tra sia pariza fenestro, la recepto, ŝajne, bone taŭgis al lia sano.

Estis dungita iu S-ro Brühl, en ne klare difinita funkcio : fakte mi neniam sciis, el kio nome konsistas lia laboro. Sed kiel interesa kaj brila estis lia konversacio ! Li estis siatempe partopreninta en la aŭta ekspedicio organizita de Citroën sub la nomo "Flava Krozado" : de Parizo al Pekino tra landoj kaj dezertoj, tra malfacilegajoj, burleskaj aŭ dramaj incidentoj, akcidentoj, mortdanĝeroj. Pri ĉio ĉi li povis paroli horojn longe sen lacigo por la aŭskultantoj, kiuj aŭdis tion kiel nekrediblajn fabelojn. Tamen mi iam vidis la filmon de tiu fama ekspedicio, kaj konstatis, ke li ne troigis en siaj mirindaj rakontoj.

En Ĉinio li vizitis iun mandarenon, kiu perfekte parolis france. Tiu ĉi estis studinta en Parizo kaj en aliaj universitataj urboj en Eŭropo, kaj akirinta plurajn doktorajn diplomojn pri diversaj sciencoj. Reveninte en sian landon, li reprenis la nacian kostumon kaj la tradiciajn kutimojn de ĉina klerulo (la revolucio de 1912 ne estis multon ŝanĝinta en la moroj de tiu antikve civilizita popolo). Li modere fumis opion ("ĉion uzi, nenion trouzi!"), kaj tio neniel nebuligis lian menson.

S-ro Brühl mire demandis lin :

- Vi ne utiligas la sciencojn, kium vi akiris en okcidento. Pro kio do, kaj por kio vi ĝin studadis ?

Enigma rideto flirtetis sur la glata vizaĝo de la mandareno, dum liaj belaj fingroj distriĝe manipulis bastoneton, per kiu li rulis rostiĝe bruetantan buleton da opio.

- Pro kio ? Nu, pro nura scivolemo kaj amuziĝo. Por kio ?

Por certigi per propra sperto, kiom facile ĉio tio estas... Kaj kiom malmulte grava...

\* Jung (germane) = juna.

Ĉu iam tiu orienta saĝo estos komprenebla de ni, en nia materialista kaj teknikista civilizacio ?

Sed ĉu ĝi estas ankoraŭ valida en la post-Maŭa Ĉinio?

Dum la tuta daŭro de la milito estis malpermesita zono laŭlonge de la hispana limo. En 1946 ĝi estis malfermita. Tiam la firmo povis organizi por la personaro ekskursojn per aŭtoĉaro al la naturaj vidindaĵoj de tiu belega montara regiono, kiel la Cirko de Gavarnie aŭ la Artouste-lago. Vintre ni veturis al proksimaj neĝokampoj. Tie mi unufoje ekzerciĝis pri skiado ; sed mi estis jam tro maljuna por akiri en tiu sporto la lertecon, kiun atingis miaj gefiloj kaj poste miaj genepoj.

S-ro Ŝidlovski havas du filinojn. La unua, Dorotea, restadis kun li en lia ĝeneva ekzilo, kaj revenis kiel lia sekretariino. Ŝi estis eble dudekjara, kiam, en okazo de laborkonflikto, mi kiel sindikato-delegito parolis al ŝi severe, se ne kruele. Mi vidis larmojn en ŝiaj okuloj. Mi bedaŭris mian malmildecon, sed ne povis konfesi mian bedaŭron. Ne ŝin celis miaj vortoj, nek ankaŭ ŝian patron kiel homon, kiun mi persone estimis : nur la mastron kiel klasbatalan kontraŭulon. Kredeble ŝi tamen komprenis : ĉar ŝi ne konservis resenton kontraŭ mi.

Ŝi edziniĝis ĝuste tiam, kiam disfalis la nazia "tria Reich". Tiun tagon okazis granda festo, en kiu partoprenis la tuta personaro de la firmo kaj la tuta vilaĝo. Oni dancis sur la iluminita korto de la uzino, kaj ĉerpis laŭplaĉe Juranĉon-vinon el bareloj.

La edzo de Dorotea, S-ro Wittwer, estas svisa inĝeniero : simpatia homo, fortika viro, atleto, sportulo, eĉ iom akrobato, kaj, kiel aviadisto, specialiĝinta pri alpa flugado kaj alteriĝo sur neĝo kaj glacio. La svisaj gazetoj nomas lin "la piloto de la glaciejoj". Ili loĝas en Svisio, sed ni ofte revidis ilin : Dorotea estas membro de la firma administra konsilantaro.

Ŝia fratino Sonia estas vera bubo, vera "mistrafita knabo"\*. Apenaŭ 18-jara, ĵus ricevinte la aŭto-stiristan

---

\* france "garçon manqué" : kvazaŭ estulo antaŭdestinita por esti knabo, en kiu kaprico de la naturo faris knabinon. Ne temas pri ia devio de la seksa instinkto, sed pri gusto: al tiaj knabinoj plaĉas danĝeraj knabaj ludoj.

permes-ateston, ŝi iun matenon aŭtoritate prenis aŭton el la uzina garaĝo, kaj senaverte forveturis. La patro ekstrangoliĝis de kolero. Sed lia patra koro moliĝis, kiam vespere ŝi telefonis al li de Parizo, kie ŝi sola alvenis senincidente post pli-ol-700-kilometra veturado. Tiam, grumblante sed fiere, li diris al mi :

- Nu, ŝi estas ja mia filino.

Sonia edziniĝis kun la juna direktoro de la malgranda filia uzino apud Mantes-la-Peleta, proksime de Parizo. Tiu ĉi rifuzis altan postenon en la ĉefuzino, preferante resti aŭtonoma (Prefere la unua en vilaĝo ol la dua en Romo\*). Precipe li ne deziris troviĝi en tro senpera kontakto kun la aŭtoritata kaj kolereza mastro-bopatro.

6. En 1947 mi ricevis leteron de mia amiko Bladier. Li informis min, ke en nia komuna naskiĝ-urbo Aleso ekvakis interesa posteno ĉe la Kompanio de Minoj, Gisejoj kaj forĝejoj. Temis pri gvidado de grandmekanika fako : tute nova afero per mi, ĉiam laborinta pri preciz-mekaniko, krom en fervojo kaj en Klermono. Tiu perspektivo, kaj la senpera kontakto kun manlaboristoj en produkta laboro, logis min. Mi kandidatis, kaj estis dungita.

Kiam mi anoncis mian eksigon, direktoro Crémieux insistis, ke mi restu, dirante :

- Vi jam bone komencis plenumi vian mision, sed restas ankoraŭ por fari en tiu direkto.
  - Mi lasas al vi Tupalski kaj Gorel, tre kapablaj anstataŭi min.
  - Teknike ja eble ; sed ili ne havas sufiĉan moralan pezon por kontraŭekvilibri la influon de Nallinger kaj liaj leŭtenantoj. Sen via ĉeesto la germanoj baldaŭ regos la uzinon.
  - Nu, vi tamen estas ĉi tie por vigli...
- La mastro diris :
- Se vi opinias vian salajron nesufiĉa, ni povas aranĝi tion...
  - Ne temas pri salajro, sed pri persona afero kaj familia motivo.
  - Do iru... sed iam vi revenos al ni.
- Pri tio ĉi mi ne kredis. Kaj tamen...

---

\* Vortoj de Julio Cezaro : "Mi preferus esti la unua inter tiuj ĉi barbaroj ol la dua en Romo".

## VII. Reveno al la nesto.

### 1. Nova metio.

Ĉefoj, kolegoj, laboristoj. "Ne pendigota".  
Kadroj.

Teknikaj problemoj. Delikata provo.

### 2. Sociala konflikto en la minejoj.

Tankoj kaj kanonoj kontraŭ laboristoj.

### 3. Kiel sinkas prospera afero.

De profito al perdo. Financistoj en industrio.

La etoso malboniĝas. Eksiĝo.

Ree sur migrovojo.

1. Forlasinte, ne sen bedaŭro, la belegajn Pireneojn, ni retrovis niajn severaspektajn Cevenojn kaj mian nigran landon. Ni loĝis en inĝeniera vilao en la plej nigra kvartalo Tamaris, kiu estas kvazaŭ aparta urbeto kelkajn kilometrojn for de la urbocentro, proksime de la karbo-kaj fer-minoj kaj de la vasta uzino ; proksime de la skori-amasegoj, ĉe kies piedo estis mortpafitaj eks-kunlaborantoj de la nazioj, kune kun kelkaj senkulpuloj false denuncitaj, ĉu pro eraro ĉu pro persona malamo kaj venĝemo.

Agrabla estis la labora etoso. Mi ĝuis estimon de la sesdekjara direktoro ; ankaŭ de la ĉefinĝeniero kaj de lia adjunkto, ambaŭ gadzartoj pliaĝaj ol mi. Same de la kolegoj, ĉefoj de aliaj fakoj. La mia konsistis el tri laborejoj. En unu estis uzinataj dikaj pecoj el giso aŭ el gisŝtalo : grandaj kuvoj, stevenoj, rudroj, padelradoj kc. En alia oni fabrikis ŝtonpisto-maŝinojn, muldo-maŝinojn k.a. En la tria fervojajn trak-aparatojn. Plus la "brakforĝejo", en kiu skipoj da fortikaj viroj manipulis per grandaj tenajloj dikajn ferpecojn forĝatajn per martelmaŝinoj.

Kun tiuj ĉi iom krudaj laboristoj, kiel kun la pli inteligentaj mekanikistoj, mi havis simpatiajn rilatojn. La sindikatanoj sciis, ke mi komprenas ilin, kaj neniam provas ilin trompi, kaj ofte helpas por akcepto de iliaj depostuloj. Ili ŝatis mian grandan zorgemon pri la preventado kontraŭ labor-akcidentoj, eĉ se mi foje severe admonis ilin pri neglekto de necesa antaŭzorgo. Iam unu el ili diris al mia edzino :

- Kiam venos la granda vespero, via edzo ne estos inter la pendigotaj.

Tamen ni loĝis en bela vilao, fronte al modestaj dometoj de laboristoj, kaj multaj vivis eĉ en senkomfortaj domaĉoj. Ili estis kutimigitaj, kaj troviĝis normala tiun malegalecon en la vivkondiĉoj. Antaŭ 50 jaroj, ĉiu inĝeniero en Tamaris ricevis senpage kaleŝon kun koĉero kaj ĝardeniston, kaj lia familio disponis rezervitajn seĝojn en la preĝejo. Tiujn superĉecajn signojn ni jam ne havis, sed en la rilatoj restis profunda hierarkia sento. Multaj laboristoj, eĉ (kaj precipe) maljunaj, respektis alparolis min "Sinjoro Inĝeniero", kun la kaskedo en la mano, kaj la Prezidanto-Ĝeneraldirektoro estis "Lia Barona Moŝto".

Juna inĝeniero freŝbakita de la Centra Lernejo, filo de unu el miaj kolegoj, diris al sia patro :

- Kiam mi pasas sur strato en blanka flanelkostumo, kun tenisrakedo sub la brako, kaj iras renkonte al laboristoj en eluzitaj vestoj, mi sentas min ĝenata.
- Kial ? respondis la patro. Ĉi estas privilegiulo, kaj devas pri tio ne honti, sed male fieri.

Tiaj "superaj kadroj" ankoraŭ kredis, ke pro sia merito ili apartenas al aristokrata kasto. Ili ne komprenis, ke ili estas nur salajruloj, ekspluatataj kiel la aliaj, kvankam pli milde ; blindigitaj per la sankta "hierarkio", ili ne vidis, ke en la klasbatalo ilia intereso estas komuna kun la laborista. Eĉ organizite en kadra sindikato, ili pli-malpli konscie konsistigis - kaj ankoraŭ ofte konsiatigas - efikan armeon objektivite ligitan kun la mastrara potenco.

Kiam okazis laborista striko por salajra plialtigo, la inĝenieroj neniam kunstrikis, kvankam ili bone sciis, ke se la striko sukcesos, ankaŭ ili profitos (pro la hierarkia principo) ; kaj ili rifuzis monhelpon al la strik-

komitato. Mi devas tamen diri, ke ili volonte donis monon, por ke la laboristaj familioj ricevu senpagajn pan-kupon-ojn.

La ses unuaj jaroj pasis por mi en interesa laboro. La gisŝtalaj muldaĵoj fanditaj en cementsablaj formuloj prezentis treege malmolan vitrigitan surfacon, tre malfacile uzineblan. Tio devigis nin ĉiam serĉadi pli efikajn ilojn kaj rimedojn.

Iafoje mi estis alfrontita ankaŭ al apartaj problemoj. Mi diros pri unu el ili.

Estis fandita el griza giso granda inerci-rado. Ĉe la uzinado aperis fendoj, kiujn ni devis ripari per elektra veldado. Poste tiu rado estis fiksota sur akso el forĝita ŝtalo, kies diametro, en normala temperaturo, estis iom pli granda ol tiu de la rad-alezaĵo.

En tia okazo, oni ĝenerale varmigas la femalan pecon ĝis ĝi sufiĉe dilatigu por ebligi penetron de la maskla. Tiel estis planite : varmigi la radon kuŝantan sur tavolo el inkandeska karbo. Sed la varmigo liberigus internajn streĉojn kaŭzitaĵajn de la veldado, kaj la rado, nepre, ree fendigus. Kiam ĝi turnigos en rapida movo, la centrifuga forto riskus rompi ĝin, kaj kaŭzi gravan akcidenton. Resti elektebla nur unu alia<sup>solve</sup> anstataŭ dilatigi la femalon per varmo, kuntirigi la masklon per malvarmo.

Mi sciis, ke tiu procedo estas banale uzata en iuj grandaj uzinoj; ekzemple la aŭto-fabriko Renault, por kumunti malgrandajn pecojn; sed en la teknika literaturo mi neniam legis mencion pri apliko al akso de 160 milimetro diametro, pezanta pli ol tricent kilogramojn. Mi devis provi eksterpolon\* - kaj en tia okazo oni neniam estas certa pri la rezulto. Nu, neceso ne estas kareso: mi nepre devis fari la eksperimenton.

Kalkulo min konvinkis, ke likva karbona bioksido, ĝenerale uzata ĉe Renault, ne estus sufiĉe malvarma por tiu speciala kazo. Mi elektis likvan nitrogenon, kalkulis la necesan kvanton, kaj mendis ĝin. Atendante la liveron, mi dume pretigis cilindran kuvon kun varm-izola ĉirkaŭvolvo, en kiu oni verŝos la malvarmegan likvaĵon kaj trempos la akson.

\* eksterpoli (PIV) = ekstrapoli (PV).

Venis la tago. La rado kuŝis sur subapogiloj. La akso pendis per hoko sub la rulponto. Mergi ĝin en la likvaĵon, relevi ĝin post la precize antaŭkalkulita tempo, transporti ĝin al vertikala pozicio super la centro de la rado, tie lasi ĝin malsupreniĝi : ĉio ĉi devis esti senhaste, sed rapide farata. Starante sur la rado, mi pergeste komandis la manovron. La pontkondukisto, ok metrojn pli alte, precize sekvis miajn gestojn. Dum la akso iom balanciĝante malsupreniĝis, mi gvidis ĝin per la manoj en mufgantoj el dika asbesto. El la kuvo kaj el la surfaco mem de la akso eliĝis blanka vaporo de nitrogeno. Miksite kun la ekstera aero, ĝi fluis laŭlonge de miaj kruroj. Tra miaj skiŝuoj el remburita fokledo, mi sentis miajn piedojn frostiĝi.

La akso glite eningiĝis kaj atingis la difinitan pozicion. Venko! Mi eksaltis de mia malkomforta pozicio. La delikata manipulado saldiĝis per sukceso teknika ; ankaŭ komerca, ĉar tiel ni povis plenumi la mendon per livero de bonkvalita peco en la fiksita tempolimo ; kaj per financa defecito, pro la alta prezo de la likva nitrogeno. Sed refando de rado estus estinta eĉ pli multekosta, kaj certe rekaŭzinta saman problemon.

## 2. Striko ĉe la najbaraj karboministoj.

Niaj metallaboristoj ne strikis, sed ofte sonis alarme la sireno de la uzino : ĝi vokis ilin por helpo al la kamaradoj ministoj atakataj de policaĵ fortoj. Tiam ili forlasis la laboron kaj ekkuris al la tre proksima minejo. Post fino de la incidento ili revenis al sia interrompita tasko.

Iun nokton nin vekis la bruo de tankraŭpoj sur la strataĵ pavimoj. La registaro sendis kirastrupojn kontraŭ la strikantojn. En la sekvanta tago mi havis okazon interparoli kun unu el la oficiroj de tiu taĉmento. Li konfidence diris al mi :

- Ni ne estas fieraj pri tiu tasko al ni ordonita.

En la urbo estis starigitaj barikadoj. La tankoj atakis ilin per siaj kanonoj. Inter la ministoj estis pluraj vunditoj, kaj unu dudekjara knabino, hazarde pasanta, estis mortigita.

La popola kolero cementis la solidarecon de la urbanoj al la strikantoj. La afero daŭris ankoraŭ plurajn tagojn, kaj finiĝis per relativa venko de la ministoj, al kiuj la ŝtata entrepreno konsentis salajran plialtigon.

3. Ses jaroj pasis en prospero. Poste la situacio de la firmo komencis difektiĝi. La profitoj malpliigis; iom post iom ili turniĝis al perdoj. Nia tro malnova ilaro ne povis plu rezisti al juna entreprenema konkurenco.

Aprobate kaj subtenate de la ĉefinĝeniero kaj de la direktoro, mi pretigis planon por aĉeto de modernaj ŝinmaŝinoj. Sed la direktoro emeritiĝis. Nova pli juna alvenis kun precizaj instrukcioj de la pariza supera estraro, mem freŝdate ŝanĝita. La prezidanto barono André Reille, komprenema al novaj ideoj kaj socialema, estis anstataŭigita per lia pli aĝa frato Ludovic, eks-kolonelo. La nova estraro konsistis ne el industriistoj, sed nur el financistoj interesataj nur pri tuja profito. Ĝi rifuzis ĉiujn investojn, kaj decidis likvidi la pligrandan parton de la uzino, komencante per la laminatejo (kiu tamen freŝe ricevis pli modernajn instalaĵojn, kaj tiel povis refariĝi konkurenckapabla). Poste ĝi decidis maldungi multajn laboristojn el la aliaj fakoj. Rifuzante partopreni en tiu fiago, mi ekŝiĝis, unua inter pluraj inĝenieroj, kiuj baldaŭ sekvis.

Kaj mi reprenis la vagulan bastonon...

\* \*  
\*



## VIII. Purgatorio ĉe Uazo.

1. Retroviĝo kun pariza regiono.
2. Alta posteno, sed neplenumebla tasko.  
"Virinoj, kurĉevaloj kaj inĝenieroj".  
Ĉu la leono manĝos la dresiston ?
3. Pena dungsplorado.

1. Mi dungigis ĉe Benoto, fabriko de buldozoj, mekanikaj ŝovliŝegoj, ks., en Persan-Beaumont ĉe Uazo, 30 km-jn norde de Parizo. Ni loĝis provizore en Beaumont, malnova urbeto parte detruita de la lasta milito kaj ne rekonstruita. En malkomfortaj kondiĉoj ni pasigis tie la malvarmegan vintron 1953-54. Poste ni trovis malgrandan loĝejon apud tiu de nia filino en Issy-les-Moulineaux, antaŭurba kvartalo ĉe la pariza sudokcidenta limo. Per metroo kaj trajno mi bezonis unu horon kaj duonon por veturi de tie al mia laborejo. Iafoje mi uzis mian aŭton ; matene mi tre facile trairis la urbegon de sudo al nordo en duonhoru, kaj alia duonhoru sufiĉis por atingi la Uazo-bordon ; sed vespere, la reveno tra la intensega urba trafiko daŭris multe pli longe (ankoraŭ ne ekzistis la evita ĉirkaŭvojo).

En sabatoj kaj dimanĉoj mia edzino kaj mi retrovis kun plezuro nian amatan Parizon. Tra la stratoj kaj avenuoj, aŭ laŭlonge de la Sejno-kajoj, ni longe piedpromenadis. Aŭ, kune kun la filino kaj bofilo, ni vizitadis la proksiman arbaron de Meudon, ankoraŭ ne voritan de la invada konstruado de domoj. Tre agrable estis tie vagi en printempo kaj kolekti majkonvalojn.

2. Malpli agrablaj estis la etoso en la firmo. En la daŭro de la dek lastaj jaroj, ĝi forkonsumis naŭ sinsekvajn direktorojn kaj la inĝenieroj sin sekvadis en sama ritmo.

Mi ricevis altan postenon tute flanke de la nova direktoro, kun kiu mi tuj simpatiis. Mia oficiala tasko estis organizi la tutan produktadon.

La ilaro kaj maŝinaro estis arkaika, la konstruaĵoj kadukaj, malkomfortaj, eĉ malsanigaj. Mi do vidis antaŭ mi multe da interesa laboro.

Mi sukcesis enkonduki pli modernajn metodojn, kaj, post mallongtempa rezistado de rutinemaj laboristoj, anstataŭigi la eksmodajn ilojn el "rapida" ŝtalo per novaj kun karbida ekstremaĵo, pli efikaj. Baldaŭ la uzantoj de tiuj iloj konstatis, ke per plialtigo de la rendimento ili plibonigas sian salajron same kiel la profiton de la firmo.

Sed, kiam temis pri moderniga transformado de la konstruaĵoj kaj instalaĵoj, kaj aĉeto de novaj maŝinoj, la mastro restis surda al miaj proponoj. Li estis memfarita homo, bonkora sed malmilda al aliaj kiel al si mem; tre kompetenta pri sia fako kaj afero, kiu riĉigis lin: tial li ne komprenis la utilon de multekostaj investadoj cele al profito post longa tempo. Verŝajne li pensis kiel tiu alia mastro, kiu diris: "Ekzistas miascie tri rimedoj por rapide ruiniĝi: nome virinoj, vetkur-ĉevaloj kaj inĝenieroj. El tiuj tri la lasta estas la malplej agrabla, sed la plej rapidefika."

Post kelkaj monatoj mi konsciis, ke en tiu firmo kun tia mastro, mi ne povos efektiviĝi ion utilan. Reznigante grandajn organiz-projektojn, mi limigis mian aktivecon al teknikaj taskoj, kiuj devigis min solvi detalajn problemojn. Mi rakontos pri unu el tiuj bataloj kontraŭ malfacilaĵoj, en kiuj multaj inĝenieroj rekonos sian ĉiutagan panon.

Iam mi devis hardi dikan ŝtalpecon per varmigo ĝis 1000 gradoj kaj trempo en olea bano. Kalkulo pri la necesa kvanto da oleo konvinkis min, ke ni ne disponas sufiĉe grandvolumenan kuvon. Mi fosigis en la grundo de la laborejo kavon de sufiĉaj dimensioj, ŝmirigis ĝiajn parietojn per argilo, verŝigis en ĝin la necesan kvanton da oleo. Restis demando: kiam oni trempos la inkandeskan pecegon, ĉu la varmo disiĝos sufiĉe rapide tra la likva maso, por ke la libera surfaco de la oleo ne atingu la temperaturon de spontanea ekbrulo? Neniu teoria kalkulo povis certigi min pri tio: nur praktika provo.

Mi postenigis ĉirkaŭ la bankavo kelkajn virojn kun estingiloj, kaj ekkomandis la manovron. Kelkaj kolegoj, interesataj, gape observis. Ĉu mi eraras ? Ĉu ili ne havis en la okuloj tiun brileton, kiun oni vidas en cirko ĉe iuj spektantoj, kiuj atendas, ĉu la leono voros la dresiston ?

Kiam la blindige luma metalmaso penetris en la verdnigran likvaĵon, aŭdiĝis akuta siblo kaj krepitado. La peco rapide mergiĝis, la oleo supraĵe ekbolis, sed ne ekbrulis. La kolegoj sportece gratulis min. La mastro, S-ro Allard, diris : - Mi estis certa, ke vi sukcesos.

Li estis obstina kiel mulo, sed ne azene stultita. Li sciopovis rekoni teknikan kompetenton kaj apreci riskemajn karakterojn.

Malgraŭ tiaj epizodoj, kiuj rompis la monotonecon de la tagoj, mi sentis, ke mi pli kaj pli enprofundiĝus en rutinon, kaj rustiĝus. Mi decidis serĉi alilokan laboron.

Tiam mi ekspertis la malfacilaĵon, kiun frontas en simila okazo pli-ol-kvardekjara inĝeniero (mi estis eĉ pli ol kvindekjara).

3. Mi skribis centon da leteroj, vizitis plurajn dekojn da firmoj. Ĉie oni akceptis min ĝentile. Oni diris :

- Bedaŭrinde ni ne havas vakan postenon konvenan al via kompetento.

Mi respondis, ke mi estas preta akcepti malpli altan postenon ; sed ili kredeble pensis : Jes, li akceptus ĝin provizore, ĉar li estas nun senlabora, sed tuj kiam li trovus alian pli altan, li forlasus nin. Oni konkludis :

- Via kandidateco interesas nin. Ni skribos al vi.

Neniu skribo venis : nek akcepta, nek eĉ rifuza.

Fine, memorante pri la lastaj vortoj de S-ro Ŝidlovski antaŭ sep jaroj, mi skribis al li. Sen granda espero.

La morgaŭon, estis vendredo, la respondo alvenis telegrame, ĝojiga en sia lakoneco :

"Venu stop ni atendos vin ĉe Paŭ-stacidomo sabaton matene."

Mi estis savita.

## IX. Lasta etapo en Bearno.

1. Rea ekkontaktiĝo.  
Profetaĵo realigita.  
Komploteto.
2. Ankoraŭ unu nova metio.  
Vicfabrikantoj. Vojaĝoj.  
Vortoj de kontraŭulo.  
65-jara. La Ossaŭ-monto.
3. Emeritiĝo.  
"Morti starante".  
Kortuŝa adiaŭo.  
Fidela memoro.

1. Dum mia sepjara forestado la uzino multe evoluis. Mi retrovis S-ron Crémieux en lia administra-direktora posteno. La komerca kaj la produkta direktoroj estis francaj. S-ro Nallinger reiris al Stutgarto, kie li refariĝis teknika direktoro ĉe Mercedes. Tamen la profetaĵo de S-ro Crémieux estis realiĝinta : ĉiuj estroj de teknikaj fakoj estis germanoj.

Tiuj ĉi, kaj ankaŭ kelkaj el miaj eks-kunlaborantoj, dume ricevintaj promociojn, ŝajnis subflari en mia reveno ian minacon : ĉu mi ne reprenos estrecon super ili ? Sed mi ne tenis tian ambicion. Mi aŭdis, ke iuj provis oponi al mia redungo, kaj ekkomplotis kontraŭ min. Mi ne volis scii pri iliaj nomoj. Ĉiujn mi volis trankviligi per plej lojala sinteno, kaj mi deziris trovi kun ĉiuj bonajn rilatojn.

Mi petis, ke oni akceptu min kiel simplan inĝenieron en la studburoo estrata de mia eks-konkuranto, ĉefinĝeniero Syring : tie mi instruiĝos pri la kreitaĵoj de la lastaj jaroj.

La grandega projekto pri transatlantika flugmaŝino kun

jetmotoro de sep-tuna forto (tiam la plej granda en la mondo) estis forlasita. La kreditoj por ĝi konsentitaj servis por konstrui modernan uzinon kun tute ĝisdata maŝinaro. Anstataŭ la plej granda, Turboméca kreis la plej malgrandan, kaj specialiĝis pri etdimensiaj motoroj kaj turbinoj destinitaj al trejnaj aviadiloj kaj al helikopteroj. En tiu fako la firmo akiris tutmondan famon. Ĝiaj jetmotoroj kaj turbinoj estas disvendataj en tuta Eŭropo kaj aliaj kontinentoj. En Usono iu koncesia firmo fabrikadis kaj vendadis ilin eĉ pli grandkvante, kaj pagis por tio multajn dolarojn kiel "royalties". La afero fariĝis tre prospera.

2. Kiam mi estis akirinta sufiĉe ĝisdatan konadon pri la produktoj de la firmo kaj pri ĝiaj fabrikrimedo, mi pasis de la studa fako en la fabrikon. La iama produktodirektoro, la angla S-ro Gardner, estis mortinta. La nova, S-ro Martin-Neuville, estis pli juna, inĝeniero el la Alta Lernejo pri Aeronautiko, kompetenta, tre aktiva kaj simpatia.

Estis instalitaj ĉiam pli modernaj maŝinoj, pli precizaj, pli aŭtomataj, pli efikaj. La kerno el specialistoj venintaj de Parizo en 1939 instruis bearnajn kamparanojn kaj formis el ili kvalifikitajn laboristojn, kaj la firmo kreis sian propran laboristan lernejon. Nun la dua generacio de tiuj lokaj fakuloj atingis plej altan nivelon. Foje-foje venis de la ĉefurbo spertuloj kun profesora mensostato ; post kelktaga restado ili foriris, konfesante :

- Ni havas nenion por instrui al viaj laboristoj : ili estas tiel kapablaj kiel la plej kompetentaj el la parizanoj.

La lernantoj egaliĝis al la majstroj.

Junaj fakaj inĝenieroj konstante studis kaj elvolvis novajn fabrik- kaj kontrolmetodojn ; jen per esplorado de la tutmonda teknika literaturo, jen per originala serĉado, ili daŭre tenis sin ĉe la pinto de la progreso.

Mi naĝis kun plezuro en tiu etoso tiel malsimila je tiu de miaj antaŭaj laborejoj en Aleso kaj en Persan. Mi ankaŭ kutimiĝis kun la komputero freŝdate instalita. Mi vidis, kiel potencajn rimedojn oni povas ricevi de tiu nova help-

ilo per inteligenta uzado. Kaj kiel singardeme oni devas rilati kun ĝi : ĉar kiel ajn fidinda ĝi estas, kaj ĝuste pro tiu fidindeco, se oni metas en ĝin malĝustajn donitaĵojn, ĝi flegme liveras plej absurdajn rezultojn.

La mendoj kreskis pli rapide ol la propraj rimedoj de la uzino. La produkto-direktoro decidis voki al helpo eksterajn fabrikantojn. Tiuj uzinis unuopajn pecojn, kiuj, post kontrolo, estis uzataj en la muntlaborejo. Necesis zorge testi kaj elekti tiujn vicfabrikantojn. Komence ili estis nur kelkaj lokaj aŭ najbaraj. Ĉar la afero rapide pliampleksiĝis, oni sentis la bezonon kunordigi ĝin per kreo de nova fako, kies ĉefo mi estis nomumita. Tio plaĉis al mi pro du motivoj. Unue, tiu posteno situigis ekstere de la interna konkurado : mi jam ne povos fari ombbron al iu ajn. Due, jen estis por mi nova metio : voki ofertojn de proviz-aspirantoj, diskuti kun ili pri prezoj kaj tempolimoj, elekti, mendi ; poste, kontroli la marŝon de la laboro ĉe ĉiu el la fabrikantoj, la akuratan liveron de la menditaĵoj, sekvi la kontroladon, la eventualajn retuŝojn aŭ refarojn, kontroli la fakturojn, ktp.

Niaj provizantoj estis unuopaj metiistoj, malgrandaj firmoj kun kelkaj laboristoj. Baldaŭ la reto etendiĝis al pli gravaj industriaj entreprenoj, ĝi kovris tutan Francion, elbordiĝis en eksterajn landojn, Belgio, Germanio, Italio, Izraelio. Mi kaj miaj ĉefaj kunlaborantoj korespondadis per leteroj, telekso\* kaj telefono, kaj ofte vojaĝis tra Francio kaj Eŭropo. Ni veturis aŭte, fervoje, per la privataj aviadiloj de la firma aŭ per la flugmaŝinaj de la aertransportaj linioj.

Iam mi trajne forveturis de Stutgarto posttagmeze por rendezuo en Munkeno je la 22a. Noktomeze mi reenvoniĝis. Mi dormis kvar horojn en litkupeo, vekigis je matenruĝo por admiri la belegajn dolomitajn pejzaĝojn, kaj alvenis en Milano, kie min atendis matene nova rendezuo. Posttagmeze mi forflugis al Parizo. Pasante super la Monto Blanka, la piloto, por la plezuro de la pasaĝeroj, rondirigis sian maŝinon ĉirkaŭ la altega neĝkovrita pinto. Pro tiu kompleza gesto mi esprimis al li dankon pere de la afabla stevardino.

Okaze de tiaj vojaĝoj, kiam mi disponis pli da libera

tempo, mi vizitis aŭ renkontis samideanojn. Pri kelkaj el tiuj renkontoj mi rakontis en "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo".

Mia nova posteno metis min fronte al industriaj firm-estroj aŭ al ties reprezentantoj : fortaj kontraŭuloj, ofte ruzaj, kup kiu necesis streĉe ludi. Pri tiaj bataladoj mi havis ian sperton de post la sindikataj debatoj en 1945-46. Iam S-ro Mitton, prezidanto de la mastra sindikatĉambro en Paŭo, diris al mi :

- Ĉu vi memoras pri niaj diskutadoj en tiu tempo ?

Mi sciis, ke tiam li diris pri mi :

- Li estas lojala, estiminda sed timinda kontraŭulo, ne facile primanovrebla. Li scias precize, kion li volas, kaj ne estas cedema. Li estas forto.

Mi penis esti ankaŭ tia en la novaj negocadoj.

Mi atingis mian 65an jaron.

Jam longe mi karesis la revon alsupri la plej altan monton de okcidentaj pireneoj, la Ossaŭ-pinton (alt. 2885m), la plej belan, fiere starantan meze de la ĉenoparto videbla de Paŭo. Mi profitis de kelktaga restado inter du vojaĝoj por realigi tiun revon.

Mi foriris frumatene kun kvar gejunuloj, spertaj pireneistoj. Ni supreniris tra densa nebulo, pene, lacige. Subite ni elmergiĝis el la nubtavolo, kiu de tiam etendiĝis ĉe niaj piedoj kiel nuba maro. Super ĝi, brilantaj en la sunlumo sub intense blua ĉielo, pintis la ĉefaj suproj de la tuta centra kaj okcidenta parto de la montoĉeno.

Restis la lasta grimpado, harda, kun du "kamenoj" 10 kaj 15 metrojn altaj ; tamen facilaj dank'al kelkaj ferstangoj fikse plantitaj en la vertikalaj rokmuroj. La dudekjaraj geknaboj tre zorgis pri mi, atentis ne tro rapidi per miaj maljunulaj kruroj.

Ni atingis la mallarĝan supron, tie tagmanĝis per la proviantoj de niaj dorsosakoj, longe admiris la ĉirkaŭan pejzaĝon, kaj revenis en la valon.

En sufiĉe freŝa stato mi retrovis la urbon, kontenta pri tiu bela tago pasigita sur la altaĵoj en tiel simpatia juna kompanio ; kaj, ĉu konfesi ? iomete fiera. Ho ! tio estas neniel heroa faro, ĝi estas eĉ facila ; tamen, krom harditaj montaranoj, nemultaj sesdekjaruloj kuraĝas provi ĝin.

Mia 65-jara datreveno estis en februaro. Mi decidis emeritiĝi fine de septembro. Dum tiuj lastaj monatoj mi trejniis kaj preparis miajn kunlaborantojn, por ke ili sen mi daŭrigu la laboron. Du el ili akompanis min en lastaj vojaĝoj por viziti la Heinkel-uzinon en Stutgarto kaj la gigantan FIAT en Torino.

Kiam mi estis unuafoje foririnta en 1947, la uzino enhavis 200 laboristojn plus la 160 germanoj. En 1965 ni estis pli ol 3000, kaj miaj mendoj okupis ekstere pli ol mil personojn. Nun, kun la filioj en la pariza regiono, en Vaskolando kaj en Izraelio, la personaro altiĝis ĝis 5000. Tiam la firmo povis repreni per propraj rimedoj la tutan produktadon, kaj la vicfabrikado estis likvidita. Miaj eks-kunlaborantoj reensorbiĝis en la interna cirkvito.

Kiam mi anoncis al S-ro Ŝidlovski mian decidon emeritiĝi, li diris al mi :

- Kial vi volas foriri ? Vi estas ja fortika kaj tre laborkapabla. Rigardu min : kvar jarojn pli aĝa ol vi, mi ne haltas. Mi volas morti starante.
- Bela formulo, mi respondis. Ankaŭ mi esperas morti starante. Sed la profesia aktiveco ne estas la sola ebla. Al mi ne mankos aliaj okupoj.

Tio estis ekster lia komprenpovo. Lia afero, kreita antaŭ trideko da jaroj de li sola kun kvar kunlaborantoj, kaj kreskinta ĝis la nuna amplekso, estas nedisigebla de lia vivo. Nun 84-jara, li restas la ĉefmastro, kiu ĉion superrevizias. Ofte li vojaĝas afercele al diversaj eŭropaj landoj, al Usono aŭ al sia dorlotata filio en Tel-Aviv.

Dorotea Ŝidlovski-Wittwer venis al mi :

- Nu, ĉu vere vi volas forlasi nin ? Vi ja ne faros tion al ni !

Ŝia voĉo metis en tiuj vortoj vere amikecan tonon. Do ŝi forgesis - aŭ ne volis memori - mian krudan sintenon kontraŭ ŝi antaŭ dudek jaroj ?

La 30an de septembro mi definitive ĉesis labori. Miaj kolegoj kaj amikoj oferis al mi kiel memordonacon belajn librojn kaj diskojn, kaj grandiozan adiaŭfeston. Tie estis,



kune kun miaj tiamaj kunlaborantoj, ankaŭ ĉiuj malnovaj. Mi povis konstati, ke la timoj kaj suspektoj estas forbalaitaj, kaj ke mi konservis ĉies estimon.

Malfrue finiĝis la festa vespero. Mi aŭte rekondukis al ŝia hejmo mian junan sekretariinon. Ŝi apogis sian kapon sur mian ŝultron, kaj ellasis larmojn ĝis tiu momento retenitajn. Ĉu am-idilio inter malpli-ol-30-jara virino kaj 65-jarulo? Bonvolu ŝpari al mi tiel ridindan supozon. (Cetere, se tiel estus, mi ne fanfaronus pri tio). Simpla vero estas, ke dekjara kunlaborado naskis kaj kreskigis reciprokan simpatian ĝis vera amikeco tute pura, ĝis kvazaŭ patra-filina interrilato sen ia konfuza mikso.

Mi konservas amikajn rilatojn kun miaj eks-kunlaborantoj kaj kolegoj, ne nur el Bearno, sed ankaŭ el Klermonto, Joinville, eĉ Rejnlando.

El miaj superuloj, ĝenerale pli aĝaj, la pli multaj jam ne vivas. Mortis ankaŭ pluraj el miaj samaĝaj aŭ pli junaj amikoj. Mia fidela penso gardas ilin vivaj en la freŝa memoro pri la komunaj laboroj kaj la kundividitaj plezuroj.

\* \*  
\*

## Epilogo.

Jam dek kvin jarojn mi estas emerito.

Nun de sufiĉe malproksime mi ĉirkaŭprenas per superfluga rigardo mian karieron. Kion mi vidas ? Sin trudas frapanta evidentajo : mi pacisto, mi kontraŭmilitisto, kiom da tempo kaj kiom da fervora laboro mi oferis al milita industrio !

Amara konstato.

Tamen, se ĝuste konsideri kaj analizi la aferojn : kiu - krom kelkaj margenuloj vivantaj ekster la socio - kiu povas eviti helpi, pere aŭ senpere, al la militpotenco ? Kiu ne kontribuas, se eĉ nur per pago de rektaj kaj nerektaj impostoj, al la ĝenerala militpreparado ? Per tia argumento, eble iom sofisma, mi provas trankviligi mian konsciencen.

Cetere, al tiu ĉi malproksima rigardopunkto mia tuta vivo aperas teksita el kontrastoj, mia persono knedita el memkontraŭdiroj. Mi estas kontraŭmilitisto, kaj mi estis dek du jarojn rezerv-oficiro. Mi amas konkretajn manlaborojn, kaj mi praktikis precipe metiojn de matematika ekzercado, kvankam aplikataj al materiaj efektivigoj. Mi estas prolettenenca, kaj mi vivas per sufiĉe sekuriga kaj monproviza pensio, en sufiĉe komforta loĝejo, kiel etburĝo. Maldekstrema intelektulo, malŝate dirus iaj kritikantoj ; salona anarkisto, rikanus aliaj. Ĉu ne prave ?

Mi revivas per la memoro miajn sinsekvajn metiojn. La unua kaj plej amata, la vapor-lokomotiva, jam preskaŭ ne ekzistas, anstataŭite de la elektra traktio. Pri la aliaj mi legas en teknikaj revuoj. Por sin teni vere informata, necesus multe legi, kaj scii almenaŭ la anglan lingvon, se ne ankaŭ la rusan, la germanan, la japanan, kaj pli kaj pli multajn aliajn. Jen estas grava problemo. Kiam la

homoj ekkomprenos, ke ekzistas unu solvo ?

Tial, inter aliaj motivoj, mi dediĉas tempon kaj reston da energio al la esperanta afero. Bedaŭrinde ne tre efike, kaj sen espero mem vidi rezultojn, sed almenaŭ kun profunda konvinko, "pri l'tempoj estontaj pensante".

Mi ne scipovis esti profeto en mia familio, mi ne sukcesis varbi miajn gefilojn kaj miajn proprajn genepojn.

Tamen mi lulas min per la kredo, ke el la estontaj generacioj sin levos pli kaj pli multaj adeptoj, kaj ke

" la nepoj nin benos,  
se ni pacience eltenos."

FINO

Florako-Nimo 1980-1981.

## Glosaro.

## 1. Vortoj ne troveblaj en PV kun suplemento, troveblaj en PIV.

akmeo	insurekcio	metroo	rezervo 3,-isto
apreci	itinerio	objeti	scintili
asidua	kárbido	operaco	sinistra
bioksido	katenario	piloto 2	skipo
daktilografi	klamido	plotono	solfeĝo
defetisto	kojono	politekniko	staĝo
diktato	kompano	poriĝo	stroboskopo
fakultativa	kompresoro	pragmata	suspensio
fantasio	komputero	prizono	svaga
fiki	lido	rabeleza	teknokrato
fragila	limuzino	remorki	testi
hitlera	lokalo	rendimento	toasto
homera	meteo	restaŭri	trakcio
			vori

## 2. Neologismoj ne troveblaj en PIV.

- frankismo : hispana faŝismo sub gvidado de generalo Franco (Franko).
- golisto : ano de de Gaulle (Degol).
- goŝisto : ekstrem-maldekstra revoluciano.
- hobia : amatora okupaĵo, amata ĉevaleta.
- polui (Neergard) = polucii 2 (PIV).
- sikambro : franka nobelo. Baptante Klodvigon, episkopo Remiĝo diris al li :  
" - Klinu la kapon, fiera sikambro; bruligu tion, kion ci adoris, adoru tion, kion ci bruligis."
- anarkismo, anarkisto.  
Mi opinias, ke la 15a regulo de la Fundamento permesas uzi tiujn simplajn radikvortojn apud la derivaĵoj anarkiismo, anarkiisto (PIV).

## 3. Fremdaj vortoj.

\* anglaj :

- five o'clock tea (kvinahora teo) : manĝeto kun teo je la 17a horo.

- jogging : amatora piedkura ekzercado.
- pub : publika trinkejo (aŭ drinkejo).
- royaltie : monkompenso pagata de ekspluatanto de patento.

\* germanaj :

- Burg : malnova kastelo.
- Fraŭ : sinjorino.
- Gestapo : sekreta ŝtatpolico en la nazia reĝimo.
- Herr Praesident : Sinjoro Prezidanto, Via Prezidanta Moŝto.
- Kurhaus : kuracdomo kun kromaj instalaĵoj (kazino, teatro, kc).
- Lok(omotiv)fŭhrer : kondukisto de lokomotivo.
- Reich : regno.
- Reichsbahn : la germana ŝtatfervoja administracio.
- Schutzpolizei (Schupo) : la germana ĝendarmaro.

\* arabaj :

- medina : centra malnova kvartalo en araba urbo.
- spahi : alĝeria kavaleriano.
- suk : komerca strateto en medina.

#### 4. Propraj nomoj.

- Avejrono, Lozero : francaj departementoj en la suda parto de la Centra Montaro.
- Florako : urbeto en Lozero.
- Aleso : karbomina kaj industria urbo, ĉefurbo de Cevenoj.

La aliaj geografiaj nomoj estas aŭ esperantigitaj laŭ PIV, aŭ konservitaj en la nacia ortografio. Same la historiaj nomoj.

#### 5. Aparta klarigo.

Gadzarto estas lernanto aŭ ekslernanto de "Artoj-kaj Metioj". En mia juneco estis 6 lernejoj de Artoj-kaj Metioj : en Châlons-sur-Marne, Angers, Aikso-la-Provenca, Klunizo, Lille kaj Parizo. Nun (kun plie Bordoza kaj en plano Strasburgo) ili konsistigas regionajn fakojn de la "Supera Lernejo de Inĝenieroj A & M", kun kvara lernojaro en Parizo.

"Frateco" estas la devizo de la gadzartoj.

## Tabelo de enhavo.

Enkonduko.	3
Prologo.	5
I. Miaj lokomotivoj.	7
II. Pariza Foiro.	41
III. Serve al la Sepa Arto.	48
IV. Trapaso en optiko.	66
V. En la ĉefurbo de kaŭĉuk-industrio.	71
VI. Ĉe Pirenea montpiedo.	80
VII. Reveno al la nesto.	93
VIII. Purgatorio ĉe Uazo.	98
IX. Lasta etapo en Bearno.	101
Epilogo.	107
Glosaro.	109

Directeur de publication  
& imprimeur : Chr. Baudé  
F 47340 Laroque Timbaut.